

Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj

*

Universala Deklaro de Homrajtoj

*

Konsilantaro pri Homrajtoj

*

**Internacia Traktato pri Ekonomiaj, Sociaj kaj
Kulturaj Rajtoj**

*

**Internacia Traktato pri la Civilaj
kaj Politikaj Rajtoj**

*

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

*

Konvencio pri la Rajtoj de Handikapitoj

*

Protokolo pri Abolo de Mortpuno

*

Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj

Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj

*

Universala Deklaro de Homrajtoj

*

Konsilantaro pri Homrajtoj

*

**Internacia Traktato pri Ekonomiaj, Sociaj kaj
Kulturaj Rajtoj**

*

**Internacia Traktato pri la Civilaj kaj Politikaj
Rajtoj**

*

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

*

Konvencio pri la Rajtoj de Handikapitoj

*

Protokolo pri abolo de mortpuno

*

Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj

Monda Asembleo Socia (MAS)

Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj
Universala Deklaro de Homrajtoj
Konsilantaro pri Homrajtoj
Internacia Traktato pri Ekonomiaj, Sociaj kaj
Kulturaj Rajtoj
Internacia Traktato pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj
Konvencio pri la Rajtoj de la Infano
Konvencio pri la Rajtoj de Handikapitoj
Protokolo pri abolo de mortpuno
Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj

Tekstoj Esperantigitaj de Vilhelmo Lutermano

ISBN 978-2-9529537-9-5

Monda Asembleo Socia (MAS)

(ĉe Unesko-Grupo Narbonia), Embres-et-Castelmaure
2009

Enhavo

La internaciaj dokumentoj pri homrajtoj.....9

Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj.....13

[Antaŭparto].....13

Ĉapitro I – Celoj kaj principoj.....14

Ĉapitro II – Membreco.....16

Ĉapitro III – Organoj.....17

Ĉapitro IV – Ĝenerala Asembleo.....18

Ĉapitro V – Konsilantaro pri Sekureco.....24

Ĉapitro VI – Paca regulado de disputoj.....28

Ĉapitro VII – Disponoj ĉe minaco al la paco aŭ ties rompo
kaj ĉe agresaj agoj.....30

Ĉapitro VIII – Regionaj interkonsentoj.....34

Ĉapitro IX – Internacia kunlaborado en ekonomia kaj socia
kampo.....36

Ĉapitro X – La Konsilantaro pri Ekonomio kaj Socio.....38

Ĉapitro XI – Deklaro pri la suverenecaj regionoj sen
memregado.....42

Ĉapitro XII – La internacia kuratorecosistemo.....44

Ĉapitro XIII – La Kuratoreca Konsilantaro.....48

Ĉapitro XIV – La Internacia Kortumo.....50

Ĉapitro XV – La Konsilantaro pri Sekureco.....52

Ĉapitro XVI – Diversaĵoj.....	53
Ĉapitro XVII – Transiraj disponoj koncerne la sekurecon.	54
Ĉapitro XVIII – Ŝanĝoj.....	55
Ĉapitro XIX – Ratifo kaj subskribo.....	56
Universala Deklaro de Homrajtoj.....	59
Notoj de la tradukinto.....	67
La Konsilantaro pri Homrajtoj.....	69
Rezolucio 60/251 adoptita de la Ĝenerala Asembleo	
Konsilantaro pri Homrajtoj.....	70
Internacia traktato pri ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj	
rajtoj.....	77
ANTAŬPARTO.....	77
Unua parto.....	78
Dua parto.....	79
Tria parto.....	80
Kvara parto.....	87
Kvina parto.....	90
Noto de la tradukinto.....	93
Internacia Traktato pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj.	95
Antaŭparto.....	95
Unua parto.....	96
Dua parto.....	97

Tria parto.....	99
Kvara parto.....	110
Kvina parto.....	121
Sesa parto.....	121
Konvencio pri la Rajtoj de la Infano.....	125
Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj.....	157
NOTO.....	199
Dua nedevisa protokolo rilate al la Internacia Traktato pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, celanta aboli la mortpunon.....	201
Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj, 1989 (n-ro 169).....	207
PARTO I. ĜENERALA POLITIKO.....	208
PARTO II. TEROJ.....	214
PARTO III. REKRUTADO KAJ DUNGOKONDIĈOJ.....	217
PARTO IV. PROFESIA FORMADO, METIO KAJ KAMPARAJ INDUSTRIOJ.....	219
PARTO V. SOCIA SEKURECO KAJ SANO.....	220
PARTO VI. EDUKADO KAJ KOMUNIKILOJ.....	221
PARTO VII. KONTAKTOJ KAJ KUNLABORADO TRA LA LIMOJ	224
PARTO VIII. ADMINISTRACIO.....	224
PARTO IX. ĜENERALAJ DISPOZICIOJ.....	225

PARTO X. FINAJ DISPOZICIOJ.....225

Postparolo de la tradukinto.....229

La internaciaj dokumentoj pri homrajtoj

- La Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj
- La internacia ĉarto pri homrajtoj
 - Universala Deklaro de Homrajtoj
 - Internacia Traktato pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj
 - Internacia Traktato pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj
 - Nedevisa Protokolo pri la Internacia Traktato pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj
 - Dua Nedevisa Protokolo pri la Internacia Traktato pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj celanta Aboli la Mortpunon

La internaciaj instrumentoj de la homrajtoj

Dato

ICERD	Internacia Konvencio pri Eliminado de Ĉiaj Rasaj Diskriminacioj	21 dec 1965	CERD
ICCPR	Internacia Traktato pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj	16 dec 1966	HRC

La internaciaj dokumentoj pri homrajtoj

ICESCR	Internacia Traktato pri Ekonomiaj kaj Kulturaj Rajtoj	16 dec 1966	ICESCR
CEDAW	Konvencio pri Eliminado de Ĉiaj Diskriminacioj rilata virinojn	18 dec 1979	CEDAW
CAT	Konvencio Kontraŭ Torturo kaj aliaj kruelaj, malhuma- naj aŭ sendignigaj traktad- oj	10 dec 1984	CAT
CRC	Konvencio pri la InfanRajt- oj	20 nov 1989	CRC
ICRMW	Internacia Konvencio pri la protekto de la Rajtoj de ĉiuj Migraj Laboristoj kaj de membroj de ilia familio Internacia Konvencio pri la Protekto de ĉiuj homoj kontraŭ forkondukoj Konvencio pri la Rajtoj de Handikapitoj (ekvalido: 3-a de majo 2008)	18 dec 1990	CMW
ICCPR- OP1	Nedeviga Protokolo pri la Internacia Traktato pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj	16 dec 1966	HRC
ICCPR- OP2	Dua Nedeviga Protokolo pri la Internacia Traktato pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj cele al abolo de Mortpuno	15 dec 1989	HRC
OP- CEDAW	Nedeviga Protokolo pri la Konvencio pri Eliminado de ĉiaj Diskriminacioj	10 dec 1999	CEDAW

La internaciaj dokumentoj pri homrajtoj

OP- CRC-AC	koncerne Virinojn Nedeviga Protokolo pri la Konvencio pri Infanrajtoj, koncerne implikiĝon de infano en Armitaj Konfliktoj	25 maj 2000	CRC
OP- CRC-SC	Nedeviga Protokolo pri la Konvencio pri Infanrajtoj, koncerne Infanvendo, infanprostituado kaj pornografio ensceniganta infanojn	25 maj 2000	CRC
OP-CAT	Nedeviga Protokolo pri la Konvencio Kontraŭ Torturo kaj aliaj kruelaj, malhumanaj aŭ sendignigaj punoj	18 dec 2002	CAT

Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj

[De la 26-a de junio 1945]

[Antaŭparto]

NI, LA POPOLOJ DE LA UNUIĜINTAJ NACIOJ - FIRME DECIDITAJ,

gardi generaciojn kontraŭ la plago de milito, kiu dufoje dum nia vivotempo alportis nedireblan suferon al la homaro,

denove konfirmi nian kredon je la fundamentaj rajtoj de la homo, je digno kaj valoro de la homa persono, je la samrajteco de viro kaj virino kiel de ĉiuj nacioj, ĉu grandaj aŭ malgrandaj,

krei kondiĉojn, sub kiuj justeco kaj la respekto al la devoj el traktatoj kaj aliaj fontoj de la popoljuro povas esti certigataj,

antaŭenigi la socian progreson kaj pli bonan vivnivelon en pli granda libereco,

Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj

KAJ POR TIUJ CELOJ

praktiki toleremon kaj vivi kiel bonaj najbaroj kune en paco,

unuigi niajn fortojn por gardi la mondan pacon kaj la internacian sekurecon,

adopti principojn kaj enkonduki metodojn kiuj garantii, ke armforto estu aplikata jam nur en la komuna intereso kaj uzi internaciajn instituciojn por antaŭenigi la ekonomian kaj socian progreson de ĉiuj popoloj

DECIDIS KUNLABORI EN NIA KLOPODADO POR ATINGO DE TIUJ CELOJ.

Laŭ tio niaj registaroj, per siaj en la urbo San-Francisko kuniĝintaj reprezentantoj, kies plenpotencoj estis prezentitaj kaj konsiderataj esti en bona kaj ĝusta formo, akceptis tiun ĉi Ĉarton de la Unuiĝintaj Nacioj kaj per tio starigas internacian organizaĵon, kiu havu la nomon „Unuiĝintaj Nacioj”.

Ĉapitro I – Celoj kaj principoj

Artikolo 1

La Unuiĝintaj Nacioj metas al si jenajn celojn:

1. gardi la mondpacon kaj la internacian sekurecon kaj tiucele fari efikajn kolektivajn disponojn por malhelpi kaj forigi minacojn al la paco, subpremi atakajn agojn kaj aliajn pacrompojn kaj realigi, per pacaj rimedoj konforme al la principoj de la justeco kaj de la internacia juro, la alĝustigon aŭ solvon de internaciaj malkonsentoj aŭ de situacioj kiuj povus konduki al pacorom-

Ĉapitro I – Celoj kaj principoj

po.

2. disvolvi inter la nacioj amikajn rilatojn bazitajn sur la respekto de la principo de egaleco de la rajtoj de la popoloj kaj de ilia rajto disponi pri si mem, kaj fari ĉiajn aliajn disponojn taŭgajn por solidigi la pacon de la mondo;
3. realigi la internacian kunlaboradon solvante la internaciajn problemojn de ekonomia, socia, intelekta aŭ homhempa karaktero, disvolvante kaj subtenante la respekton al la homrajtoj kaj al la fundamentaj liberecoj por ĉiuj, sen distingo de raso, de sekso, de lingvo aŭ de religio.
4. esti centro en kiu harmoniiĝas la klopodoj de la nacioj por tiuj komunaj celoj.

Artikolo 2

La Unuiĝintaj Nacioj kaj ĝiaj membroj, en sia klopodado por la celoj eldiritaj en la Artikolo 1, devas agi konforme al la sekvaj principoj:

1. La Unuiĝintaj Nacioj estas bazitaj sur la principo de suverena egaleco de ĉiuj siaj membroj.
2. La membroj de la Unuiĝintaj Nacioj, por certigi al ĉiuj la ĝuadon de la rajtoj kaj avantaĝoj devenantaj el ilia membreco, devas plenumi bonfide la devojn kiujn ili alprenis laŭ la teksto de tiu ĉi Ĉarto.
3. La membroj solvas siajn internaciajn disputojn per pacaj rimedoj, tiel ke la paco kaj la internacia sekureco kaj la justeco ne estu endanĝerigata.
4. La membroj detenas sin, en siaj internaciaj rilatoj, je minaco aŭ uzo de forto, ĉu kontraŭ la teritoria integreco aŭ politika sendependeco de ia ajn ŝtato, ĉu en ia

Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj

alia maniero malkongrua kun la celoj de la Unuiĝintaj Nacioj.

5. Ĉiuj membroj donas al la Unuiĝintaj Nacioj ĉian help-on en ĉia ago entreprenita de tiuj konforme al la dispozicioj de tiu ĉi Ĉarto kaj detenas sin helpi ŝtaton kontraŭ kiu la Unuiĝintaj Nacioj faras antaŭmalhelpan aŭ perfortan agon.
6. La Unuiĝintaj Nacioj faras tiel ke la ŝtatoj kiuj ne estas membroj de la Unuiĝintaj Nacioj agu konforme al tiuj ĉi principoj kiom necese por konservi la internaciajn pacon kaj sekurecon.
7. Nenia dispozicio de tiu ĉi Ĉarto permesas la Unuiĝintajn Naciojn interveni en aferojn kiuj koncernas esence la nacian kompetenton de ŝtato nek devigas la membrojn submeti tiajn aferojn al proceduro de regulado laŭ la teksto de tiu ĉi Ĉarto; tamen, tiu principo neniel malhelpas la aplikadon de pundiĝoj laŭ la ĉapitro VII.

Ĉapitro II – Membreco

Artikolo 3

La originaj membroj de la Unuiĝintaj Nacioj estas la ŝtatoj kiuj, partopreninte en la Konferenco de la Unuiĝintaj Nacioj por la Internacia Organizaĵo en San-Francisko aŭ subskribinte antaŭe la Deklaron de la Unuiĝintaj Nacioj de la 1-a de januaro 1942, subskribas tiun ĉi Ĉarton kaj ratifas ĝin konforme al la Artikolo 110.

Ĉapitro II – Membreco

Artikolo 4

1. Povas fariĝi membroj de la Unuiĝintaj Nacioj ĉiuj aliaj pacaj ŝtatoj kiuj akceptas la devojn de tiu ĉi Ĉarto kaj, laŭ la juĝo de la Unuiĝintaj Nacioj, estas kapablaj kaj emaj fari tion.
2. La akcepto kiel membro de la Unuiĝintaj Nacioj de ĉiu ŝtato plenumanta tiujn kondiĉojn fariĝas per decido de la Ĝenerala Asembleo laŭ rekomendo de la Konsilantaro pri Sekureco.

Artikolo 5

Al membro de la Unuiĝintaj Nacioj, kontraŭ kiu antaŭmalhelpa aŭ perforta ago estas entreprenita fare de la Konsilantaro pri Sekureco, suspendeblas fare de la Ĝenerala Asembleo, laŭ rekomendo de la Konsilantaro pri Sekureco, la uzado de ĝiaj rajtoj kaj privilegioj devenaj de ĝia membreco. La uzado de tiuj rajtoj kaj privilegioj restarigeblas per la Konsilantaro pri Sekureco.

Artikolo 6

Se membro rompas persiste la principojn eldiritajn en tiu ĉi Ĉarto, ĝi povas esti ekskludita el la Unuiĝintaj Nacioj per la Ĝenerala Asembleo laŭ rekomendo de la Konsilantaro pri Sekureco.

Ĉapitro III – Organoj

Artikolo 7

1. Kiel ĉefaj organoj de la Unuiĝintaj Nacioj estas starig-

Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj

itaj: Ĝenerala Asembleo, Konsilantaro pri Sekureco, Ekonomia kaj Socia Konsilantaro, Kuratora Konsilantaro, Internacia Tribunalo kaj Sekretariejo.

2. Kromaj organoj, laŭ neceso, starigeblas konforme al tiu ĉi Ĉarto.

Artikolo 8

La Unuiĝintaj Nacioj neniel restriktas la aliron de viroj kaj de virinoj, en egalaj kondiĉoj, al ĉiuj funkcioj, en siaj ĉefaj kaj kromaj organoj.

Ĉapitro IV – Ĝenerala Asembleo

Konsisto

Artikolo 9

1. La Ĝenerala Asembleo konsistas el ĉiuj membroj de la Unuiĝintaj Nacioj.
2. Ĉiu membro havas maksimume kvin reprezentantojn en la Ĝenerala Asembleo.

Funkcioj kaj povoj

Artikolo 10

La Ĝenerala Asembleo povas diskuti pri ĉiuj demandoj aŭ aferoj en la kadro de tiu ĉi Ĉarto aŭ koncernantaj la povojn kaj funkciojn de iu ajn de la organoj starigitaj laŭ tiu ĉi Ĉar-

Ĉapitro IV – Ĝenerala Asembleo

to, kaj, kun rezervo pri la dispozicioj de la Artikolo 12, formuli pri tiuj demandoj aŭ aferoj rekomendojn por la membroj de la Unuiĝintaj Nacioj, por la Konsilantaro pri Sekureco aŭ por la membroj kaj la Konsilantaro pri Sekureco.

Artikolo 11

1. La Ĝenerala Asembleo povas pritrakti la ĝeneralajn principojn de kunlaborado por konservo de la internaciaj paco kaj sekureco, inkluzive de la principoj pri malarmado kaj regulado pri armiloj kaj fari, laŭ tiuj principoj, rekomendojn ĉu al la membroj ĉu al la Konsilantaro pri Sekureco, ĉu al la membroj kaj al la Konsilantaro pri Sekureco.
2. La Ĝenerala Asembleo povas diskuti pri ĉiaj demandoj koncernantaj la konservadon de la internaciaj paco kaj sekureco submetitaj al ĝi de ia ajn membro de la Unuiĝintaj Nacioj aŭ de la Konsilantaro pri Sekureco aŭ de ŝtato kiu ne estas membro de la Unuiĝintaj Nacioj konforme al la dispozicioj de la paragrafo 2 de la Artikolo 35 kaj, sub rezervo de la Artikolo 12, fari pri ĉiuj tiaj demandoj rekomendojn ĉu al la ŝtato aŭ ŝtatoj interesitaj, ĉu al la Konsilantaro pri Sekureco, ĉu al la ŝtatoj kaj al la Konsilantaro pri Sekureco. Ĉia tia demando kiu alvokas agon estas sendota al la Konsilantaro pri Sekureco fare de la Ĝenerala Asembleo, antaŭ aŭ post diskutado.
3. La Ĝenerala Asembleo povas atentigi la Konsilantaron pri Sekureco pri la situacioj kiuj ŝajnas endanĝerigi la internaciajn pacon kaj sekurecon.
4. La povoj de la Ĝenerala Asembleo nomitaj en tiu ĉi Artikolo ne limigas la ĝeneralan atingopovon de la artikolo 10.

Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj

Artikolo 12

1. Dum la Konsilantaro pri Sekureco plenumas, koncerne disputon aŭ ian ajn situacion, la funkciojn kiuj estas al ĝi atribuitaj de tiu ĉi Ĉarto, la Ĝenerala Asembleo ne rajtas fari ian ajn rekomendon pri la disputo aŭ tiu situacio, almenaŭ se la Konsilantaro pri Sekureco ne petas ĝin de ĝi.
2. La Ĝenerala Sekretario, kun la konsento de la Konsilantaro pri Sekureco, sciigas al la Ĝenerala Asembleo, dum ĉiu sesio, la aferojn pri la konservado de la internaciaj paco kaj sekureco pri kiuj okupiĝas la Konsilantaro pri Sekureco; li ankaŭ informas la Ĝeneralan Asembleon aŭ, se tiu ne kunsidas, la membrojn, ekde kiam la Konsilantaro pri Sekureco ĉesas okupiĝi pri tiuj aferoj.

Artikolo 13

1. La Ĝenerala Asembleo iniciatas studaĵojn kaj faras rekomendojn por:
 - a. disvolvi la internacian kunlaboradon en la politika kampo kaj subteni la iom-post-ioman disvolvadon de la internacia juro kaj de ĝia kodigado;
 - b. disvolvi la internacian kunlaboradon en la kampoj ekonomia, socia, de intelekta kulturo kaj de edukado, de publika sano kaj faciligi por ĉiuj, sen distingo de raso, de sekso, de lingvo aŭ de religio, la ĝuadon de la homrajtoj kaj de la fundamentaj liberecoj.
2. La aliaj respondecoj, funkcioj kaj povoj de la Ĝenerala Asembleo, koncernantaj la demandojn menciitajn en la ĉi-supra paragrafo 1, b, estas eldiritaj en la Ĉapitroj IX kaj X.

Ĉapitro IV – Ĝenerala Asembleo

Artikolo 14

Sub rezervo de la dispozicioj de la Artikolo 12, la Ĝenerala Asembleo povas rekomendi disponojn taŭgajn por certigi la pacan reguladon de ĉia situacio, kia ajn estas ĝia kaŭzo, kiu ŝajnas al ĝi endanĝerigi la ĝeneralan bonon aŭ la amikajn rilatojn inter nacioj, inkluzive de situacioj estiĝintaj pro rompo de la dispozicioj de tiu ĉi Ĉarto en kiuj estas eldiritaj la celoj kaj la principoj de la Unuiĝintaj Nacioj.

Artikolo 15

1. La Ĝenerala Asembleo akceptas kaj konsideras la jar-raportojn kaj la specialajn raportojn de la Konsilantaro pri Sekureco; tiuj raportoj enhavas resumon de la disponoj kiujn la Konsilantaro pri Sekureco decidis aŭ realigis por konservi la internaciajn pacon kaj sekurecon.
2. La Ĝenerala Asembleo akceptas kaj konsideras la raportojn de la aliaj organoj de la Unuiĝintaj Nacioj.

Artikolo 16

La Ĝenerala Asembleo plenumas, koncerne la internacian kuratorec-reĝimon, la funkciojn kiuj estas al ĝi atribuitaj kaŭze de la Ĉapitroj XII kaj XIII; interalie, ĝi aprobas la kuratorec-traktatojn pri la zonoj ne signitaj kiel strategiaj zonoj.

Artikolo 17

1. La Ĝenerala Asembleo kontrolas kaj aprobas la buĝeton de la Unuiĝintaj Nacioj.
2. La elspezoj de la Unuiĝintaj Nacioj estas portataj de la membroj laŭ la dispartigo fiksita de la Ĝenerala Asem-

Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj

bleo.

3. La Ĝenerala Asembleo kontrolas kaj aprobas ĉiujn financajn kaj buĝetajn aranĝojn faritajn kun la specialaj institucioj celataj en la Artikolo 57 kaj kontrolas la mastrumajn buĝetojn de tiuj institucioj kun la celo doni al ili rekomendojn.

Voĉdonado

Artikolo 18

1. Ĉiu membro de la Ĝenerala Asembleo disponas pri unu voĉo.
2. La decidoj de la Ĝenerala Asembleo pri la gravaj demandoj estas farataj per du triona plimulto de la ĉeestaj kaj voĉdonantaj membroj. Kiel gravaj demandoj estas konsiderataj: la rekomendoj pri la konservo de la internaciaj paco kaj sekureco, la elekto de nekonstantaj membroj de la Konsilantaro pri Sekureco, la elekto de la membroj de la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro, la elekto de la membroj de la Konsilantaro pri kuratoreco konforme al la paragrafo 1, c, de la Artikolo 86, la allaso de novaj membroj en la Unuiĝintaj Nacioj, la suspendo de rajtoj kaj privilegioj de membroj, la ekskludo de membroj, la demandoj pri funkciado de la kuratorrec-reĝimo kaj la buĝetaj demandoj.
3. La decidoj pri aliaj demandoj, inkluzive la difino de novaj kategorioj de demandoj decidotaj per du triona plimulto, estas farataj per la plimulto de la ĉeestantaj kaj voĉdonantaj membroj.

Ĉapitro IV – Ĝenerala Asembleo

Artikolo 19

Membro de la Unuiĝintaj Nacioj kun debeto de siaj kontribuajoj al la elspezoj de la Unuiĝintaj Nacioj ne povas partopreni en la voĉdonado de la Ĝenerala Asembleo, se la sumo de ĝiaj debetoj egalas aŭ superas la kontribuajon pagendan de ĝi por la du kompletaj pasintaj jaroj. La Ĝenerala Asembleo povas tamen permesi al tiu membro partopreni en la voĉdonado, se ĝi konstatas, ke la pagomanko okazis pro cirkonstancoj sendependaj de ĝia volo.

Proceduro

Artikolo 20

La Ĝenerala Asembleo faras unu regulan jaran sesion kaj, kiam la cirkonstancoj postulas tion, eksterordinarajn sesiojn. Tiuj estas kunvokataj de la Ĝenerala Sekretario laŭ peto de la Konsilantaro pri Sekureco aŭ de la plimulto de la membroj de la Unuiĝintaj Nacioj.

Artikolo 21

La Ĝenerala Asembleo starigas sian internan reguladon. Ĝi nomumas sian Prezidanton por ĉiu sesio.

Artikolo 22

La Ĝenerala Asembleo povas starigi kromajn organojn kiujn ĝi juĝas necesaj por la plenumado de siaj funkcioj.

Ĉapitro V – Konsilantaro pri Sekureco

Konsisto

Artikolo 23

1. La Konsilantaro pri Sekureco konsistas el dek-kvin membroj de la Unuiĝintaj Nacioj. La Respubliko Ĉinio, Francio, la Unuiĝo de Sovetaj Socialismaj Respublikoj¹, la Unuiĝinta Reĝlando de Granda Britujo kaj Nord-Irlando² kaj la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Nord-Ameriko³ estas konstantaj membroj de la Konsilantaro pri Sekureco. Dek kromaj membroj de la Unuiĝintaj Nacioj estas elektataj nekonstantaj membroj de la Konsilantaro pri Sekureco, fare de la Ĝenerala Asembleo kiu speciale konsideras, unuavice, la kontribuadon de la membroj de la Unuiĝintaj Nacioj al la konservado de la internaciaj paco kaj sekureco kaj al la ceteraj celoj de la Unuiĝintaj Nacioj kaj ankaŭ justan geografian distribuon.
2. La nekonstantaj membroj de la Konsilantaro pri Sekureco estas elektataj por periodo de du jaroj. Dum la unua elekto de la nekonstantaj membroj post kiam la nombro da membroj de la Konsilantaro pri Sekureco estos altigita de dek-unu al dek-kvin, du el la kvar kromaj membroj estos elektataj por periodo de unu jaro. La elirantaj membroj ne tuj reelekteblas.
3. Ĉiu membro de la Konsilantaro pri Sekureco havas unu reprezentanton en la Konsilantaro.

1En la sekvo ankaŭ: Sovetio. (la tradukinto)

2En la sekvo ankaŭ: Britio. (la tradukinto)

3En la sekvo ankaŭ: Usono. (la tradukinto)

Funkcioj kaj povoj

Artikolo 24

1. Por certigi la rapidan kaj efikan agon de la Unuiĝintaj Nacioj, ĝiaj membroj donas al la Konsilantaro pri Sekureco la precipan respondecon por la konservado de la internaciaj paco kaj sekureco kaj agnoskas ke, plenumante siajn devojn kiujn trudas al ĝi tiu respondeco, la Konsilantaro pri Sekureco agas en ilia nomo.
2. En la plenumado de tiuj devoj, la Konsilantaro pri Sekureco agas konforme al la celoj kaj principoj de la Unuiĝintaj Nacioj. La specifaj povoj donitaj al la Konsilantaro pri Sekureco por ebligi al ĝi plenumi tiujn devojn estas difinitaj en la Ĉapitroj VI, VII, VIII kaj XII.
3. La Konsilantaro pri Sekureco submetas por kontrolado jarajn raportojn kaj, laŭokaze, specialajn raportojn al la Ĝenerala Asembleo.

Artikolo 25

La membroj de la Unuiĝintaj Nacioj interkonsentas akcepti kaj apliki la decidojn de la Konsilantaro pri Sekureco konforme al tiu ĉi Ĉarto.

Artikolo 26

Por subteni la starigon kaj konservadon de la internaciaj paco kaj sekureco kun la minimuma devojigo al armado de la homaj kaj ekonomiaj resursoj de la mondo, la Konsilantaro pri Sekureco estas taskita, helpe de la Komitato de ĉefstabo starigita per la Artikolo 47, ellabori planojn submetot-

Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj

ajn al la membroj de la Unuiĝintaj Nacioj por starigi sistemon de regulado de la armaĵoj.

Voĉdonado

Artikolo 27

1. Ĉiu membro de la Konsilantaro pri Sekureco disponas pri unu voĉo.
2. La decidoj de la Konsilantaro pri Sekureco pri proceduraj demandoj estas farataj per jesa voĉo de naŭ membroj.
3. La decidoj de la Konsilantaro pri Sekureco pri ĉiuj aliaj demandoj estas farataj per jesa voĉo de naŭ ĝiaj membroj en kiu estas entenataj la voĉoj de ĉiuj konstantaj membroj, ĉe kio, en la decidoj farataj laŭ la teksto de la Ĉapitro VI kaj de la paragrafo 3 de la Artikolo 52, konfliktpartioj detenas sin voĉdoni.

Proceduro

Artikolo 28

1. La Konsilantaro pri Sekureco estas organizita tiel ke ĝi povas plenumi siajn funkciojn permanente. Por tio, ĉiu membro de la Konsilantaro pri Sekureco devas havi ĉiumomente reprezentanton en la sidejo de la Unuiĝintaj Nacioj.
2. La Konsilantaro pri Sekureco faras regulajn kunvenojn, en kiu ĉiu ĝia membro povas, se li deziras, reprezentigi sin per membro de sia registaro aŭ per ia alia

Ĉapitro V – Konsilantaro pri Sekureco

speciale nomumita reprezentanto.

3. La Konsilantaro pri Sekureco povas kunveni en ĉiuj lokoj aliaj ol la sidejo de la Unuiĝintaj Nacioj kiujn ĝi juĝas taŭgaj por faciligi ĝian taskon.

Artikolo 29

La Konsilantaro pri Sekureco povas krei la kromajn organojn kiujn ĝi juĝas necesaj por la plenumado de ĝiaj funkcioj.

Artikolo 30

La Konsilantaro pri Sekureco starigas sian internan regularon, en kiu ĝi fiksas la manieron nomumi sian Prezidanton.

Artikolo 31

Ĉiu Membro de la Unuiĝintaj Nacioj kiu ne estas membro de la Konsilantaro pri Sekureco povas partopreni, sen voĉdonrajto, en la diskuto de ĉia demando submetita al la Konsilantaro pri Sekureco, ĉiam kiam ĝi opinias ke la intereso de tiu Membro estas aparte tuŝataj.

Artikolo 32

Ĉiu Membro de la Unuiĝintaj Nacioj kiu ne estas membro de la Konsilantaro pri Sekureco aŭ ĉiu ŝtato kiu ne estas Membro de la Unuiĝintaj Nacioj, se ĝi estas partio de disputo ekzamenata de la Konsilantaro pri Sekureco, estas invitata partopreni, sen voĉdonrajto, en la diskutoj pri tiu disputo. La Konsilantaro pri Sekureco determinas la kondiĉojn kiujn ĝi opinias justaj por la partopreno de ŝtato kiu ne estas Membro de la Unuiĝintaj Nacioj.

Ĉapitro VI – Paca regulado de disputoj

Artikolo 33

1. La partioj de ĉia disputo, kies daŭrigo povas minaci la konservadon de la internaciaj paco kaj sekureco, klopodas unue por atingi solvon per intertraktado, esplorado, perado, kompromiso, arbitraciado, tribunala decido, uzado de regionaj institucioj aŭ interkonsentoj aŭ per aliaj pacaj rimedoj de propra elekto.
2. La Konsilantaro pri Sekureco instigas la partiojn, se ĝi opinias tion necesa, solvi siajn disputojn per tiaj rimedoj.

Artikolo 34

La Konsilantaro pri Sekureco povas esplori ĉian disputon kaj ĉian situacion, kiu povus konduki al internaciaj frotiĝoj aŭ kaŭzi disputon, por konstati ĉu la daŭro de la disputo aŭ de la situacio povas endanĝerigi la konservadon de la internaciaj paco kaj sekureco.

Artikolo 35

1. Ĉiu Membro de la Unuiĝintaj Nacioj povas atentigi la Konsilantaron pri Sekureco aŭ la Ĝeneralan Asembleon pri ĉia disputo kaj pri ĉia situacio de la speco karakterizita en Artikolo 34.
2. Ŝtato ne Membro de la Unuiĝintaj Nacioj povas atentigi la Konsilantaron pri Sekureco aŭ la Ĝeneralan Asembleon pri ĉia disputo en kiu ĝi estas partio, se ĝi anticipe koncerne tiun disputon adoptas la devojn je paca solvo fiksitaj en tiu ĉi Ĉarto.
3. La proceduro de la Ĝenerala Asembleo en aferoj pri

Ĉapitro VI – Paca regulado de disputoj

kiuj ĝi estas atentigita laŭ tiu ĉi artikolo, okazas laŭ la artikoloj 11 kaj 12.

Artikolo 36

1. La Konsilantaro pri Sekureco povas en ĉiu stadio de disputo laŭ la senco de la Artikolo 33 aŭ en samspeca situacio rekomendi taŭgajn procedurojn aŭ metodojn por ĝia solvo.
2. La Konsilantaro pri Sekureco devas konsideri ĉiujn procedurojn, kiujn la partioj jam akceptis por solvi la disputon.
3. Ĉe siaj rekomendoj kaŭze de tiu ĉi artikolo la Konsilantaro pri Sekureco devas krome konsideri, ke juraj disputoj estas ĝenerale submetotaj de la partioj al la Internacia Kortumo laŭ ties statuto.

Artikolo 37

1. Se la partioj de disputo de la speco nomita en la artikolo 33 ne sukcesas solvi ĝin per la tie indikitaj rimedoj, ili submetas tiun disputon al la Konsilantaro pri Sekureco.
2. Se laŭ konsidero de la Konsilantaro pri Sekureco la pludaŭro de la disputo povas fakte endanĝerigi la konservadon de la monda paco aŭ de la internacia sekureco, ĝi decidus, ĉu ĝi ekagu laŭ artikolo 36 aŭ doni la rekomendojn laŭ ĝia pritakso taŭgajn por solvi la disputon.

Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj

Artikolo 38

Sendepende de la Artikoloj 33 ĝis 37 la Konsilantaro pri Sekureco povas, se ĉiuj partioj de disputo petas tion, direkti al la partioj de disputo rekomendojn por ties paca solvo.

Ĉapitro VII – Disponoj ĉe minaco al la paco aŭ ties rompo kaj ĉe agresaj agoj

Artikolo 39

La Konsilantaro pri Sekureco konstatas, ĉu temas pri minaco aŭ rompo de la paco aŭ pri agresa ago; ĝi donas rekomendojn aŭ decidas, kiaj disponoj laŭ la artikoloj 41 kaj 42 estas farendaj por konservi aŭ restarigi la mondan pacon kaj la internacian sekurecon.

Artikolo 40

Por antaŭmalhelpi pliakriĝon de la situacio, la Konsilantaro pri Sekureco povas, antaŭ ol doni rekomendon laŭ artikolo 39 aŭ decidi disponojn, postuli de la koncernaj partioj sekvi la provizorajn disponojn kiujn ĝi opinias necesaj aŭ dezirindaj. Tiuj provizoraj disponoj ne tuŝas la rajtojn, pretendojn kaj la pozicion de la koncernataj partioj. Se la provizoraj disponoj ne estas obeataj, la Konsilantaro pri Sekureco taŭge konsideras tiun neplenumon.

Artikolo 41

La Konsilantaro pri Sekureco povas decidi, kiuj disponoj - kun la escepto de armita forto - estas farendaj por doni efektivecon al ĝiaj decidoj; ĝi povas postuli de la Membroj de la Unuiĝintaj Nacioj plenumi tiujn disponojn. Tiuj povas in-

Ĉapitro VII – Disponoj ĉe minaco al la paco aŭ ties rompo kaj ĉe agresaj agoj

kludi la kompletan aŭ partan interrompon de la ekonomiaj rilatoj, de la fervojaj, maraj, aeraj, poŝtaj, telegrafiaj kaj radiaj komunikoj kaj de ceteraj trafikeblecoj kaj la ĉesigon de la diplomaciaj rilatoj.

Artikolo 42

Se la Konsilantaro pri Sekureco opinias, ke la disponoj laŭ la artikolo 41 estus nesufiĉaj aŭ montriĝus nesufiĉaj, ĝi povas per aeraj, maraj aŭ teraj militfortoj realigi la disponojn necesajn por konservado aŭ restarigo de la monda paco kaj de la internacia sekureco. Tiuj disponoj povas inkludi demonstradojn, blokadojn kaj ceterajn operaciojn de la aeraj, maraj aŭ teraj militfortoj de Membroj de la Unuiĝintaj Nacioj.

Artikolo 43

1. Ĉiuj Membroj de la Unuiĝintaj Nacioj devontigas sin kontribui al la konservado de la mondpaco kaj de la internacia sekureco per tio ke ili, laŭ unu aŭ pluraj specialaj interkonsentoj, disponigas al la Konsilantaro pri Sekureco laŭ ties peto militfortojn, donas helpon kaj facilajojn inkluzive de la rajto je tramarŝado, en la mezuro en kiu tio necesas por konservado de la monda paco kaj de la internacia sekureco.
2. Tiuj interkonsentoj devas enteni la nombron kaj specon de la militfortoj, ilian preteco-gradon, ilian ĝeneralan lokiĝon kaj la specon de la facilajoj kaj de la helpo.
3. La interkonsentoj estas ellaborotaj laŭ instigo de la Sekurec-Konsilantaro kiom eble plej baldaŭ per intertraktado. Ili estas farotaj inter la Sekurec-Konsilantaro unuflanke kaj la unuopaj Membroj aŭ

Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj

Membrogrupoj aliflanke kaj ratifotaj de la subskribintaj ŝtatoj laŭ ties konstitucia juro.

Artikolo 44

Se la Konsilantaro pri Sekureco decidis la uzon de la forto, ĝi invitas Membron ne reprezentatan en ĝi, antaŭ ol postuli de ĝi la liveradon de militfortoj laŭ la transprenitaj devontigoj laŭ la artikolo 43, laŭ ties peto, partopreni en ĝiaj decidoj pri la uzo de kontingentoj de la militfortoj de tiu Membro.

Artikolo 45

Por kapabligi la Unuiĝintajn Naciojn plenumi urĝajn militajn disponojn, la Membroj de la Unuiĝintaj Nacioj tenas kontingentojn de siaj aerarmeo pretaj por tuja uzo ĉe komunaj internaciaj truĉdisponoj. Amplekson kaj batalpretecon de tiuj kontingentoj kaj la planoj por la komunaj disponoj estas decidataj de la Sekurec-Konsilantaro kun subteno de la Ĉefstab-Komisiono en la kadro de la specialaj interkonsentoj menciataj en la artikolo 43.

Artikolo 46

La planoj por uzo de armita forto estas starigataj de la Sekurec-Konsilantaro kun subteno de la ĉefstab-komisiono.

Artikolo 47

1. Estas starigata Komisiono de la Ĉefstabo por konsili kaj subteni la Sekurec-Konsilantaron en ĉiuj demandoj kiuj koncernas ties militajn bezonojn por konservado de la mondpaco kaj de la internacia sekureco, la uzon kaj gvidadon de la militfortoj disponigataj al la Sekur-

Ĉapitro VII – Disponoj ĉe minaco al la paco aŭ ties rompo kaj ĉe agresaj agoj

ec-Konsilantaro, la reguladon pri armado kaj eventualan malarmadon.

2. La Ĉefstab-Komisiono konsistas el la ĉefstab-estroj de la konstantaj membroj de la Sekurec-Konsilantaro aŭ de ties reprezentantoj. Membro de la Unuiĝintaj Nacioj ne konstante reprezentata en la Komisiono estas invitata de la Komisiono asociiĝi al ĝi, se la kunlaborado de tiu Membro necesas por efika realigo de la taskoj de la Komisiono.
3. La Ĉefstab-Komisiono respondecas, sub la aŭtoritato de la Sekurec-Konsilantaro, pri la strategia gvidado de ĉiuj militfortoj disponigitaj al la Sekurec-Konsilantaro. La demandoj koncerne la gvidadon de tiuj militfortoj estas reguligitaj pli poste.
4. La Ĉefstab-Komisiono povas, kun permeso de la Sekurec-Konsilantaro post konsultado, starigi per taŭgaj regionaj institucioj regionajn subkomisionojn.

Artikolo 48

1. La disponoj, necesaj por la plenumado de la decidoj de la Sekurec-Konsilantaro por konservado de la mond-paco kaj de la internacia sekureco, estas farataj laŭ la opinio de la Sekurec-Konsilantaro de ĉiuj aŭ de kelkaj Membroj de la Unuiĝintaj Nacioj.
2. Tiuj decidoj estas rekte plenumataj de la Membroj de la Unuiĝintaj Nacioj kaj per disponoj en la konvenaj internaciaj institucioj, en kiuj ili membras.

Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj

Artikolo 49

Ĉe la plenumado de la disponoj deciditaj de la Konsilantaro pri Sekureco la Membroj de la Unuiĝintaj Nacioj donas al si reciproke helpon.

Artikolo 50

Se la Sekurec-Konsilantaro faras antaŭmalhelpajn aŭ trudajn disponojn kontraŭ ŝtato, ĉiu alia ŝtato, ĉu Membro de la Unuiĝintaj Nacioj aŭ ne, al kiu la plenumado de tiuj disponoj kaŭzas apartajn ekonomiajn problemojn, povas konsulti la Sekurec-Konsilantaron por solvi tiujn problemojn.

Artikolo 51

Tiu ĉi Ĉarto neniel malpliigas la naturdonitan rajton je individua aŭ kolektiva memdefendo en kazo de armita atako kontraŭ Membro de la Unuiĝintaj Nacioj, ĝis kiam la Sekurec-Konsilantaro faris la necesajn disponojn por konservado de la mondpaco kaj de la internacia sekureco. Disponoj kiun faras Membro en praktikado de tiu memdefendo-rajto, estas tuj indikendaj al la Sekurec-Konsilantaro; ili neniel tuŝas ties rajton kaj devon laŭ tiu ĉi Ĉarto, ĉiumomente fari la disponojn kiujn ĝi konsideras necesaj por konservado aŭ restarigo de la mondpaco kaj de la internacia sekureco.

Ĉapitro VIII – Regionaj interkonsentoj

Artikolo 52

1. Tiu ĉi Ĉarto ne ekskludas la ekziston de regionaj interkonsentoj aŭ institucioj por pritraktado de aferoj koncernantaj la konservadon de la mondpaco kaj de la in-

Ĉapitro VIII – Regionaj interkonsentoj

ternacia sekureco, ĉe kiuj disponoj de regiona speco estas konsilindaj; kondiĉo por tio estas, ke tiuj interkonsentoj aŭ institucioj kaj ilia agado estas kongruaj kun la celoj kaj principoj de la Unuiĝintaj Nacioj.

2. Membroj de la Unuiĝintaj Nacioj, kiuj faras tiajn interkonsentojn aŭ starigas tiajn instituciojn, per ĉiaj fortoj klopodos, per uzado de tiuj interkonsentoj aŭ institucioj, por pace solvi loke limigitajn disputojn, antaŭ ol taski la Sekurec-Konsilantaron pri tio.
3. La Sekurec-Konsilantaro subtenos la disvolvadon de la proceduro pace solvi loke limigitajn disputojn per uzado de tiuj regionaj interkonsentoj aŭ institucioj, ĉu laŭ instigo de la konfliktpartiaj ŝtatoj aŭ kaŭze de transigoj fare de ĝi mem.
4. La aplikado de la artikoloj 34 kaj 35 ne estas tuŝataj de tiu ĉi artikolo.

Artikolo 53

1. La Konsilantaro pri Sekureco laŭokaze uzas sub sia aŭtoritato tiujn regionajn interkonsentojn aŭ instituciojn por realigo de trud-disponoj. Sen permeso de la Sekurec-Konsilantaro trud-disponoj kaŭze de regionaj interkonsentoj aŭ flanke de regionaj institucioj ne rajtas esti realigataj; esceptataj estas disponoj kontraŭ malamika ŝtato en la senco de la alineo 2, se ili estas menciitaj en la artikolo 107 aŭ en regionaj interkonsentoj direktitaj kontraŭ la reaktivigo de la agrespolitiko de tia ŝtato; la escepto validas ĝis kiam, laŭ peto de la koncernataj registaroj, la Unuiĝintaj Nacioj estas taskita malhelpi novajn agresojn de tia ŝtato.
2. La esprimo „malamika ŝtato” en la alineo 1 signifas ĉiun ŝtaton kiu dum la Dua Mondmilito estis malamiko de subskribinto de tiu ĉi Ĉarto.

Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj

Artikolo 54

La Sekurec-Konsilantaro estas ĉiumomente komplete ĝisdate informenda pri la disponoj farataj aŭ planataj por konservado de la mondpaco kaj de la internacia sekureco surbaze de regionaj interkonsentoj aŭ flanke de regionaj institucioj.

Ĉapitro IX – Internacia kunlaborado en ekonomia kaj socia kampo

Artikolo 55

Por alkonduki tian staton de stabileco kaj de prospero, kiu estas necesa por ke inter la nacioj regu pacaj kaj amikecaj rilatoj sur la bazo de respekto al la principo de la rajtegaleco kaj memdispono de la popoloj, la Unuiĝintaj Nacioj subtenas

- a) la plibonigon de la vivnivelo, la plendungecon kaj la kondiĉojn por ekonomia kaj socia progreso kaj supreniro;
- b) la solvon de internaciaj problemoj de ekonomia, socia, sana kaj simila speco kaj la internacian kunlaboradon sur la kampoj de kulturo kaj edukado;
- c) la ĝeneralan respekton kaj realigon de la homrajtoj kaj fundamentaj liberecoj por ĉiuj sen distingo de raso, sekso, lingvo aŭ religio.

Artikolo 56

Ĉiuj Membroŝtatoj devontigas sin kunlabori kune kaj ĉiu unuope kun la Unuiĝintaj Nacioj, por atingi la celojn

Ĉapitro IX – Internacia kunlaborado en ekonomia kaj socia kampo

difinitajn en la artikolo 55.

Artikolo 57

1. La diversaj specialaj organizoj starigitaj per interŝtataj interkonsentoj, kiuj devas plenumi, sur la kampoj de ekonomio, socia subteno, kulturo, edukado, sano kaj similaj kampoj ampleksajn internaciajn taskojn preskribitajn en iliaj respektivaj statutoj, estas laŭ la artikolo 63 rilatigitaj kun la Unuiĝintaj Nacioj.
2. Tiuj organizoj rilatigitaj kun la Unuiĝintaj Nacioj estas en la sekvo nomataj „specialaj organizoj”.

Artikolo 58

La Unuiĝintaj Nacioj donas rekomendojn por kunordigi la klopodojn kaj agadojn de tiuj specialaj organizoj.

Artikolo 59

La Unuiĝintaj Nacioj instigas laŭokaze inter la koncernaj ŝtatoj intertraktadojn por starigo de novaj specialaj organizoj, en la mezuro en kiuj ili estas necesaj por la atingo de la celoj nomataj en la artikolo 55.

Artikolo 60

Por la plenumado de la taskoj de la Unuiĝintaj Nacioj nomataj en tiu ĉi ĉapitro respondecas la Ĝenerala Asembleo kaj sub ties aŭtoritato la Konsilantaro pri Ekonomio kaj Socio; tiu posedas tiucele la rajtojn atribuitajn al ĝi en la ĉapitro X.

Ĉapitro X – La Konsilantaro pri Ekonomio kaj Socio

Konsisto

Artikolo 61

1. La Konsilantaro pri Ekonomio kaj Socio konsistas el kvindek-kvar Membroj de la Unuiĝintaj Nacioj elektitaj de la Ĝenerala Asembleo.
2. Kun rezervo de la alineo 3, ĉiujare dek-ok membroj de la Konsilantaro pri Ekonomio kaj Socio estas elektataj por tri jaroj. Eliranta membro tuj reelekteblas.
3. Ĉe la unua elekto, kiu okazas post altigo de la nombro da konsilianoj de dudek-sep al kvindek-kvar, estas aldone al tiuj membroj, kiuj estas elektataj anstataŭ la naŭ membroj kies oficoperiodo finiĝas kun la koncerna jaro, elektataj dudek-sep kromaj membroj de la Konsilantaro pri Ekonomio kaj Socio. La oficoperiodo de naŭ el tiuj dudek-sep kromaj membroj finiĝas post unu jaro, tiu de naŭ kromaj membroj post du jaroj; la ceteron reguligas la Ĝenerala Asembleo.
4. Ĉiu membro de la Konsilantaro pri Ekonomio kaj Socio havas en tiu unu reprezentanton.

Taskoj kaj rajtoj

Artikolo 62

1. La Konsilantaro pri Ekonomio kaj Socio povas, pri internaciaj aferoj surkampe de ekonomio, socio, kulturo, edukado, sano kaj similaj kampoj realigi aŭ

Ĉapitro X – La Konsilantaro pri Ekonomio kaj Socio

iniciati studaĵojn kaj fari aŭ iniciati raportojn; ĝi povas pri ĉiu tia afero fari rekomendojn al la Ĝenerala Asembleo, la Membroj de la Unuiĝintaj Nacioj kaj al la koncernataj specialaj organizoj.

2. Ĝi povas fari rekomendojn por antaŭenigi la respekton kaj realigon de la homrajtoj kaj fundamentaj liberecoj por ĉiuj.
3. Ĝi povas, pri aferoj pri kiu ĝi kompetentas, ellabori interkonsentojn kaj prezenti ilin al la Ĝenerala Asembleo.
4. Ĝi povas, laŭ la reguloj fiksitaj de la Unuiĝintaj Nacioj, kunvoki internaciajn konferencojn pri aferoj pri kiuj ĝi kompetentas.

Artikolo 63

1. La Konsilantaro pri Ekonomio kaj Socio povas, kun ĉiu el la organizoj nomataj en la artikolo 57, fari interkonsentojn, en kiuj reguliĝas la rilatoj de la koncernaj organizoj kun la Unuiĝintaj Nacioj. Tiuj interkonsentoj bezonas la konsenton de la Ĝenerala Asembleo.
2. Ĝi povas kunordigi la agadon de la specialaj organizoj, per konsultadoj kun ili kaj per rekomendoj al ili, al la Ĝenerala Asembleo kaj al la Membroj de la Unuiĝintaj Nacioj.

Artikolo 64

1. La Konsilantaro pri Ekonomio kaj Socio povas fari taŭgajn paŝojn por ricevi regule raportojn de la specialaj organizoj. Ĝi povas interkonsenti kun la Membroj de la Unuiĝintaj Nacioj kaj kun la specialaj organizoj por ricevi raportojn pri la disponoj, kiuj estas farataj por plenumi ĝiajn rekomendojn kaj la rekomendojn de la Ĝen-

Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj

erala Asembleo pri aferoj de ĝia kompetento.

2. Ĝi povas sciigi al la Ĝenerala Asembleo rimarkojn pri tiuj raporto.

Artikolo 65

La Konsilantaro pri Ekonomio kaj Socio povas doni informojn al la Sekurec-Konsilantaro kaj subteni ĝin laŭ ties peto.

Artikolo 66

1. La Konsilantaro pri Ekonomio kaj Socio plenumas ĉiujn taskojn por kiuj ĝi kompetentas en kunteksto kun la plenumado de rekomendoj de la Ĝenerala Asembleo.
2. Ĝi povas, kun permeso de la Ĝenerala Asembleo, liveri ĉiujn servojn pri kiuj ĝi estas petata de la Membroj de la Unuiĝintaj Nacioj aŭ de specialaj organizoj.
3. Ĝi plenumas ĉiujn ceterajn taskojn, pri kiuj ĝi estas taskitaj en tiu ĉi Ĉarto aŭ de la Ĝenerala Asembleo.

Voĉdonado

Artikolo 67

1. Ĉiu membro de la Konsilantaro pri Ekonomio kaj Socio havas unu voĉon.
2. Decidoj de la Konsilantaro pri Ekonomio kaj Socio bezonas la plimulton de la ĉeestantaj kaj voĉdonantaj membroj.

Ĉapitro X – La Konsilantaro pri Ekonomio kaj Socio

Proceduro

Artikolo 68

La Konsilantaro pri Ekonomio kaj Socio starigas komisionojn pri ekonomiaj kaj sociaj demandoj kaj por la antaŭenigo de la homrajtoj kaj por ĉiuj aliaj bezonoj por plenumi siajn taskojn.

Artikolo 69

Se la Konsilantaro pri Ekonomio kaj Socio pritraktas aferon kiu havas apartan gravecon por iu Membro de la Unuiĝintaj Nacioj, ĝi invitas tiun partopreni sen voĉdonrajto en ĝiaj diskutoj.

Artikolo 70

La Konsilantaro pri Ekonomio kaj Socio povas fari interkonsentojn por ke reprezentantoj de la specialaj organizoj partoprenu sen voĉdonrajto en ĝiaj diskutoj kaj en la diskutoj de la komisionoj starigitaj de ĝi kaj ke ĝiaj propraj reprezentantoj partoprenu en la diskutoj de tiuj specialaj organizoj.

Artikolo 71

La Konsilantaro pri Ekonomio kaj Socio povas fari interkonsentojn pri konsultado kun neŝtataj organizoj, kiuj okupiĝas pri aferoj de ĝia kompetento. Tiaj interkonsentoj fareblas kun internaciaj organizoj kaj, se oportune, post konsultado de la koncerna Membro de la Unuiĝintaj Nacioj ankaŭ kun naciaj organizoj.

Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj

Artikolo 72

1. La Konsilantaro pri Ekonomio kaj Socio donas al si regularon; en tiu ĝi reguligas ankaŭ la proceduron de elektado de sia prezidanto.
2. La Konsilantaro pri Ekonomio kaj Socio kunsidas laŭbezone laŭ sia regularo; en tiu estas ankaŭ regulenda la kunvokado de sesioj laŭ peto de la plimulto de ĝiaj membroj.

Ĉapitro XI – Deklaro pri la suverenecaj regionoj sen memregado

Artikolo 73

Membroj de la Unuiĝintaj Nacioj, kiuj havas aŭ transprenas la respondecon pri la administrado de suverenecaj regionoj, kies popoloj ankoraŭ ne atingis la plenan memregadon, agnoskas la principon ke la interesoj de la loĝantoj de tiuj suverenecaj regionoj havas prioritaton; ili transprenas kiel sanktan komision la devon, en la kadro de la sistemo de monda paco kaj de la internacia sekureco starigita per tiu ĉi Ĉarto, antaŭenigi ĝisekstreme la bonfarton de tiuj loĝantoj; tiucele ili devontigas sin,

- a) certigi la politikan, ekonomian, socian kaj edukan progreson, la ĵustan traktadon kaj la protekton de tiuj popoloj kontraŭ misuzoj, kun la necesa respekto de ilia kulturo;
- b) disvolvi la memregadon, sufiĉe konsideri la politikajn strebojn de tiuj popoloj kaj subteni ilin ĉe la progresanta disvolvado de iliaj liberaj politikaj institucioj, kaj

Ĉapitro XI – Deklaro pri la suverenecaj regionoj sen memregado

tio laŭ la apartaj kondiĉoj de ĉiu suverenecaj regionoj, de ilia loĝantaro kaj de ties respektiva disvolvo-nivelo;

- c) firmigi la mondan pacon kaj la internacian sekurecon;
- ĉ) [*en aliaj lingvoj: d*] antaŭenigi disponojn por konstruado kaj disvolvado, subteni la esploradon kaj kunlabori kune kun ili kaj laŭokaze kun internaciaj fakorganizoj, por realigi la sociajn, ekonomiajn kaj sciencajn celojn deklaritajn en tiu ĉi artikolo;
- d) [*alilingve: e*] transdoni al la Ĝenerala Sekretario, konsidere al la limigoj necesaj rilate al sekureco kaj konstitucio, por lia informado regule statistikajn kaj aliajn teĥnikajn informojn pri la ekonomia, socia kaj eduka sistemo en la suverenecaj regionoj ne koncernataj de la ĉapitroj XII kaj XIII, pri kiuj ili estas respondecaj.

Artikolo 74

La membroj de la Unuiĝintaj Nacioj krome interkonsentas en tio, ke la politiko kiun ili faras por la suverenecaj regionoj koncernataj de tiu ĉi ĉapitro, devas baziĝi ne malpli sur la ĝenerala principo de bona najbareco en sociaj, ekonomiaj kaj komercaj afero ol tiu politiko, kiun ili faras por sia propra lando; ĉe tio la interesoj kaj la bonfarto de la cetera mondo estas sufiĉe konsiderendaj.

Ĉapitro XII – La internacia kuratorecosistemo

Artikolo 75

La Unuiĝintaj Nacioj starigas sub sia aŭtoritato internacian sistemon de kuratoreco por la administrado kaj superregado de la suverenaj teritorioj, kiuj surbaze de postaj unuopaj interkonsentoj estas aligitaj al tiu ĉi sistemo. Tiuj suverenecaj teritorioj estas en la sekvo nomataj teritorioj sub kuratoreco.

Artikolo 76

En akordo kun la celoj de la Unuiĝintaj Nacioj nomataj en la artikolo 1 de tiu ĉi Ĉarto la kuratorecosistemo servas precipe al jenaj celoj:

- a) firmigi la mondpacon kaj la internacian sekurecon;
- b) antaŭenigi la politikan, ekonomian, socian kaj edukan progreson de la loĝantoj de la teritorioj sub kuratoreco tiel ke tio respondas al la apartaj kondiĉoj de ĉiu el tiuj suverenecaj teritorioj kaj de ties loĝantaro kaj al ties libere esprimitaj deziroj kaj kiel projektite en la tiurilataj kuratorecaj interkonsentoj;
- c) stimuli la respekton al la homrajtoj kaj fundamentaj liberecoj por ĉiuj sen distingo de raso, de sekso, de lingvo aŭ de religio kaj fortigi la konscion de reciproka dependeco de la popoloj de la mondo;
- ĉ) [*alilingve: d*)] certigi la egalecan traktadon de ĉiuj membroj de la Unuiĝintaj Nacioj kaj de iliaj ŝtatanoj en sociaj, ekonomiaj kaj komercaj aferoj kaj la egalecan traktadon de tiuj ŝtatanoj en la jura administro, tamen sen ĝeni la realigon de la antaŭe nomitaj celoj; la

Ĉapitro XII – La internacia kuratorecosistemo

artikolo 80 restas netuŝita.

Artikolo 77

1. La kuratorecosistemo aplikiĝas al la suverenecaj teritorioj apartenantaj al la sekvaj grupoj, en la mezuro en kiu ili estas surbaze de kuratorecaj interkonsentoj aligitaj al tiu ĉi sistemo
 - a) aktuale ekzistantaj mandat-teritorioj;
 - b) suverenecaj teritorioj, kiuj sekve al la Dua Mondmilito estas detranĉataj de malamikaj ŝtatoj;
 - c) suverenecaj teritorioj, kiuj de la ŝtatoj respondecaj pri ilia administrado estas libervole aligitaj al la sistemo.
2. La determinado, kiuj suverenecaj teritorioj el la nomitaj grupoj estas aligitaj al la kuratorecosistemo kaj kiuj dispozicioj validas por ili, estas rezervita al posta interkonsento.

Artikolo 78

La kuratorecosistemo ne aplikiĝas al suverenecaj teritorioj, kiuj fariĝis membro de la Unuiĝintaj Nacioj; la rilatoj inter membroj baziĝas sur la respekto de la principo de la suverena egaleco.

Artikolo 79

Por ĉiu suverena teritorio aligota al la kuratorecosistemo la kuratorecaj disponoj inkluzive de ĉiuj iliaj ŝanĝoj kaj kompletigoj estas interkonsentotaj de la rekte koncernataj ŝtatoj, al kiuj apartenas ankaŭ, ĉe mandataj teritorioj de membro de la Unuiĝintaj Nacioj, la mandatpotenco, en formo de traktato; ili bezonas la permeson laŭ la artikoloj 83 kaj 85.

Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj

Artikolo 80

1. En la mezuro en kiu en apartaj, surbaze de la artikoloj 77, 79 kaj 81 faritaj kuratorecaj traktatoj por aligo de la kuratora teritorio en la kuratorecosistemon ne estas disponita io alia kaj en la mezuro en kiu tiaj traktatoj ankoraŭ ne estas faritaj, tiu ĉapitro estas interpretenda ne tiel kvazaŭ ĝi ŝanĝus rekte aŭ nerekte la rajtojn de ŝtatoj aŭ popoloj aŭ validajn internaciajn interkonsentojn, kies subskribintoj estas membroj de la Unuiĝintaj Nacioj.
2. El alineo 1 dedukteblas pravigo atendigi aŭ prokrasti intertraktadojn pri traktatoj pri la en la artikolo 77 menciita aligo de mandataj teritorioj kaj aliaj suverenecaj teritorioj en la kuratorecosistemon aŭ la subskribon de tiaj traktatoj.

Artikolo 81

Ĉiu kuratoreca traktato entenas disponojn, laŭ kiuj la kuratoreca teritorio estas administrenda, kaj nomas la administrantan suveremon. Tiu, en la sekvo nomata „administra potenco”, povas esti ŝtato aŭ ŝtataro aŭ la Unuiĝintaj Nacioj mem.

Artikolo 82

Ĉiu kuratoreca traktato povas nomi unu aŭ plurajn strategiajn zonojn, kiuj ampleksas la tutan kuratorecan teritorion, por kiu validas la traktato, aŭ parton de ĝi; apartaj traktatoj laŭ artikolo 43 restas netuŝataj.

Ĉapitro XII – La internacia kuratorecosistemo

Artikolo 83

1. Ĉiujn taskojn de la Unuiĝintaj Nacioj rilate strategiajn zonojn, inkluzive de la permeso de la kuratorecaj traktatoj kaj de iliaj ŝanĝoj kaj aldonoj, prizorgas la Konsilantaro pri Sekureco.
2. La ĉefaj celoj nomataj en la artikolo 76 validas ankaŭ por la loĝantaro de ĉiu strategia zono.
3. Kun konsidero de la kuratorecaj traktatoj la Konsilantaro pri Sekureco uzas, kun rezervo de la sekurecaj necesoj, la subtenon de la Kuratoreca Konsilantaro, por plenumi, en la kadro de la kuratorecosistemo, tiuj taskojn de la Unuiĝintaj Nacioj, kiuj koncernas politikajn, ekonomiajn, sociajn kaj edukajn aferojn en la strategiaj zonoj.

Artikolo 84

La administra potenco havas la devon zorgi pri tio ke la kuratoreca teritorio faru sian kontribuojn por la konservado de la mondpaco kaj de la internacia sekureco. Tiucele ĝi povas uzi libervolajn militfortojn, facilaĵojn kaj subtenon de la kuratoreca teritorio, por plenumi la devojn, kiuj ĝi transprenis tiurilate antaŭ la Konsilantaro pri Sekureco, kaj por certigi la lokan defendon kaj la konservadon de juro kaj ordo ene de la kuratoreca teritorio.

Artikolo 85

1. La taskoj de la Unuiĝintaj Nacioj rilate la kuratorecajn teritoriojn por ĉiuj regionoj ne nomatajn strategiaj, inkluzive de la permeso de la kuratorecaj traktatoj kaj iliaj ŝanĝoj kaj kompletigoj, estas prizorgataj de la Ĝenerala Asembleo.
2. Ĉe la plenumado de tiuj taskoj la Ĝenerala Asembleo

Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj

estas subtenata de la Kuratoreca Konsilantaro kiu agas sub ĝia aŭtoritato.

Ĉapitro XIII – La Kuratoreca Konsilantaro

Konsisto

Artikolo 86

1. La Kuratoreca Konsilantaro konsistas el la sekvaj membroj de la Unuiĝintaj Nacioj:
 - a) la membroj, kiuj administras kuratorecajn teritoriojn;
 - b) la membroj nome listigitajn en la artikolo 23, en la mezuro en kiu ili ne administras kuratorecajn teritoriojn;
 - c) tiom da pliaj membroj elektitajn de la Ĝenerala Asembleo por po tri jaroj, kiom necesas por ke la Kuratoreca Konsilantaro konsistu entute duone el membroj de la Unuiĝintaj Nacioj, kiuj administras kuratorecajn teritoriojn, kaj duone el tiaj kiuj ne administras tiajn.
2. Ĉiu membro de la Kuratoreca Konsilantaro nomumas aparte taŭgan personon kiel sian reprezentanton en la Kuratoreca Konsilantaro.

Taskoj kaj rajtoj

Artikolo 87

La Ĝenerala Asembleo kaj sub ĝia aŭtoritato la Kuratoreca Konsilantaro povas ĉe plenumado de siaj taskoj

- a) kontroli raportojn deponitajn de la administra potenco;
- b) akcepti petojn kaj ekzameni ilin en konsultado kun la administra potenco;
- c) instigi al regulaj vojaĝoj al la kuratorecaj teritorioj, kies dato estas interkonsentota kun la administra potenco;
- ĉ) [alilingve: d)] fari tiujn kaj aliajn disponojn en kongrueco kun la kuratorecaj traktatoj.

Artikolo 88

La Kuratoreca Konsilantaro ellaboras demandaron pri la politika, ekonomia, socia kaj eduka progreso de la loĝantoj de ĉiu kuratoreca teritorio; la administra potenco de ĉiu kuratoreca teritorio, por kiu kompetentas la Ĝenerala Asembleo, faras al tiu surbaze de la demandaro ĉiujaran raporton.

Voĉdonado

Artikolo 89

1. Ĉiu membro de la Kuratoreca Konsilantaro havas unu voĉon.
2. Decidoj de la Kuratoreca Konsilantaro bezonas la plimulto de la ĉeestantaj kaj voĉdonantaj membroj.

Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj

Proceduro

Artikolo 90

1. La Kuratoreca Konsilantaro donas al si regularon; en tiu ĝi reguligas ankaŭ la proceduron por la elekto de ĝia prezidanto.
2. La Kuratoreca Konsilantaro kunvenas laŭbezone laŭ sia regularo; en tiu estas reguligenda ankaŭ la kunvokado al kunvenoj laŭ peto de la plimulto de ĝiaj membroj.

Artikolo 91

La Kuratoreca Konsilantaro uzas laŭokaze la subtenon de la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro kaj de la apartaj organizaĵoj ĉe aferoj, pri kiuj ili kompetentas.

Ĉapitro XIV – La Internacia Kortumo

Artikolo 92

La Internacia Kortumo estas la ĉefa juĝa organo de la Unuiĝintaj Nacioj. Ĝi plenumas siajn taskojn laŭ la apudmetita statuto, kiu baziĝas sur la Statuto de la Konstanta Internacia Kortumo kaj estas parto de tiu ĉi Ĉarto.

Artikolo 93

1. Ĉiuj membroj de la Unuiĝintaj Nacioj estas senpere kontraktantoj de la statuto de la Internacia Kortumo.
2. Ŝtato, kiu ne estas membro de la Unuiĝintaj Nacioj,

Ĉapitro XIV – La Internacia Kortumo

povas fariĝi kontraktanto de la statuto de la Internacia Kortumo laŭ kondiĉoj, kiujn fiksas la Ĝenerala Asembleo ĉiufoje laŭ rekomendo de la Konsilantaro pri Sekureco.

Artikolo 94

1. Ĉiu membro de la Unuiĝintaj Nacioj devontigas sin obei, ĉe ĉia disputo en kiu ĝi estas partio, la decidon de la Internacia Kortumo.
2. Se disput-partio ne obeas la devojn el verdikto de la Kortumo, la alia partio povas turni sin al la Konsilantaro pri Sekureco; tiu povas, se ĝi konsideras tion necesa, doni rekomendojn aŭ decidi disponojn, por efektiviĝi la verdikton.

Artikolo 95

Tiu ĉi Ĉarto ne ekskludas, ke membroj de la Unuiĝintaj Nacioj surbaze de ekzistantaj aŭ estontaj traktatoj taskas la solvodon de siaj disputoj al aliaj kortumoj.

Artikolo 96

1. La Ĝenerala Asembleo aŭ la Konsilantaro pri Sekureco povas mendi pri ĉia jura afero ekspertizon de la Internacia Kortumo.
2. Aliaj organoj de la Unuiĝintaj Nacioj kaj de apartaj organizaĵoj povas kun respektiva rajtigo fare de la Ĝenerala Asembleo ankaŭ mendi ekspertizon de la Kortumo pri juraj demandoj, kiuj stariĝas en sia agadokampo.

Ĉapitro XV – La Konsilantaro pri Sekureco

Artikolo 97

La Konsilantaro pri Sekureco konsistas el la Ĝenerala Sekretario kaj la ceteraj dungitaj bezonataj de la organizaĵo. La Ĝenerala Sekretario estas nomata de la Ĝenerala Asembleo, laŭ rekomendo de la Konsilantaro pri Sekureco. Li estas la plej alta administra oficisto de la organizaĵo.

Artikolo 98

La ĝenerala sekretario oficas en tiu eco ĉe ĉiuj kunsidoj de la Ĝenerala Asembleo, de la Konsilantaro pri Sekureco, de la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro kaj de la Kuratoreca Konsilantaro kaj plenumas ĉiujn ceterajn taskojn pri kiuj taskas lin tiuj organoj. Li raportas al la Ĝenerala Asembleo ĉiujare pri la agado de la Unuiĝintaj Nacioj.

Artikolo 99

La Ĝenerala Sekretario povas atentigi la Sekureco-Konsilantaro pri ĉia afero, kiu laŭ lia konsidero povas endanĝerigi la konservadon de la mondpaco kaj de la internacia sekureco.

Artikolo 100

1. La Ĝenerala Sekretario kaj la ceteraj oficistoj ne rajtas, ĉe la plenumado de siaj devoj, peti nek akcepti instrukciojn de registaro aŭ de aŭtoritato ekster la Unuiĝintaj Nacioj. Ili devas rezigni ĉian agon kiu povus kompromiti ilian funkcion kiel internaciaj oficistoj respondecaj nur al la Unuiĝintaj Nacioj.

Ĉapitro XV – La Konsilantaro pri Sekureco

2. Ĉiu membro de la Unuiĝintaj Nacioj devontigas sin respekti la ekskluzive internacian karakteron de la respondecado de la Ĝenerala Sekretario kaj de la ceteraj oficistoj kaj ne provi influi ilin ĉe la plenumado de siaj taskoj.

Artikolo 101

1. La oficistoj estas nomumataj de la Ĝenerala Sekretario kongrue kun reguloj kiujn dekretas la Ĝenerala Asembleo.
2. Al la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro, al la Kuratoreca Konsilantaro kaj laŭnecese al aliaj organoj de la Unuiĝintaj Nacioj estas donataj taŭgaj konstantaj oficistoj. Ili apartenas al la Sekretariejo.
3. Ĉe dungo de la oficistoj kaj la regulado de ilia ofica rilato estas decida la vidpunkto ke necesas certigi plej altan gradon da laborkapablo, de faka taŭgeco kaj de honesteco. La cirkonstanco, ke gravas fari la elekton de la oficistoj sur laŭeble larĝa geografia bazo, estas dece konsiderenda.

Ĉapitro XVI – Diversaĵoj

Artikolo 102

Se la devoj de membroj de la Unuiĝintaj Nacioj el tiu ĉi Ĉarto kaj iliaj devoj el aliaj internaciaj interkonsentoj kontraŭdiras, antaŭrangas la devoj el tiu ĉi Ĉarto.

Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj

Artikolo 103

La Unuiĝintaj Nacioj ĝuas en la suvereneca teritorio de ĉiu membro la jurajn kapablon kaj rajton necesajn por la plenumado de ĝiaj taskoj kaj por la realigo de ĝiaj celoj.

Artikolo 105

1. La Unuiĝintaj Nacioj ĝuas en la suvereneca teritorio de ĉiu membro la prerogativojn kaj imunecojn necesajn por la realigo de ĝiaj celoj.
2. La reprezentantoj de la membroj de la Unuiĝintaj Nacioj kaj oficistoj de la Unuiĝintaj Nacioj ĝuas ankaŭ la prerogativojn kaj imunecojn kiuj ili bezonas por povi plenumi siajn taskojn lige kun la Unuiĝintaj Nacioj en tuta sendependeco.
3. La Ĝenerala Asembleo povas doni rekomendojn por detale reguligi la aplikadon de la alineoj 1 kaj 2, aŭ ĝi povas proponi al la membroj de la Unuiĝintaj Nacioj interkonsenton por tiu celo.

Ĉapitro XVII – Transiraj disponoj koncerne la sekurecon

Artikolo 106

Ĝis kiam la ekvalido de apartaj interkonsentoj de la speco indikitaj en la artikolo 43 kapabligas la Sekurec-Konsilantaron laŭ ties konsidero komenci la plenumadon de la respondecujo atribuitaj al ĝi en artikolo 42, la partioj de la deklaro de la kvar potencoj kaj Francio subskribitan la 30-an de oktobro 1943 en Moskvo konsultas sin reciproke laŭ alineo 5 de tiu deklaro kaj laŭokaze aliajn membrojn de la Un-

Ĉapitro XVII – Transiraj disponoj koncerne la sekurecon

uiĝintaj Nacioj, por komune fari ĉiujn eble necesajn disponojn por konservi la mondpacon kaj la internacian sekurecon en la nomo de la Unuiĝintaj Nacioj.

Artikolo 107

Disponoj, kiujn la por tio respondecaj registaroj faras aŭ permesas kiel sekvon de la Dua Mondmilito koncerne iun ŝtaton kiu dum tiu milito estis malamiko de la ŝtato subskribinta de tiu ĉi Ĉarto, estas per tiu ĉi Ĉarto nek eksvalidigitaj nek malpermesitaj.

Ĉapitro XVIII – Ŝanĝoj

Artikolo 108

Ŝanĝoj de tiu ĉi Ĉarto ekvalidas por ĉiuj membroj de la Unuiĝintaj Nacioj, kiam ili estas akceptitaj per du-triona plimulto de la membroj de la Ĝenerala Asembleo kaj ratifitaj de du trionoj de la membroj de la Unuiĝintaj Nacioj inkluzive de ĉiuj konstantaj membroj de la Sekurec-Konsilantaro laŭ la konstitucia juro.

Artikolo 109

1. Por revizii tiun ĉi Ĉarton povas kunveni Ĝenerala Konferenco de la membroj de la Unuiĝintaj Nacioj; dato kaj loko estas fiksotaj per decido de du-triona plimulto de la membroj de la Ĝenerala Asembleo kaj per decido de naŭ ajnaj membroj de la Sekurec-Konsilantaro. Ĉiu membro de la Unuiĝintaj Nacioj havas ĉe la Konferenco unu voĉon.
2. Ĉia ŝanĝo de tiu ĉi Ĉarto, kiu estas rekomendita de la

Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj

Konferenco per du-triona plimulto, ekvalidas, kiam ĝi estas ratifita de du trionoj de la membroj de la Unuiĝintaj Nacioj inkluzive de ĉiuj konstantaj membroj de la Sekureco-Konsilantaro laŭ la konstitucia juro.

3. Se tia Konferenco ne kunvenis antaŭ la deka jarkunveno de la Ĝenerala Asembleo post ekvalido de tiu ĉi Ĉarto, la propono kunvoki tian Konferencon estas metota sur la tagordon de tiu jarkunveno; la Konferenco okazas, se tio estas decidita per decido de la plimulto de la membroj de la Ĝenerala Asembleo kaj per decido de sep ajnaj membroj de la Sekureco-Konsilantaro.

Ĉapitro XIX – Ratifo kaj subskribo

Artikolo 110

1. Tiu ĉi Ĉarto bezonas la ratifon de la subskribintaj ŝtatoj laŭ ties konstitucia juro.
2. La ratifo-dokumentoj estas deponataj ĉe la registaro de Usono; tiu sciigas ĉiun deponon al ĉiuj subskribintaj ŝtatoj kaj al la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj, ekde kiam li estas nomumita.
3. Tiu ĉi Ĉarto ekvalidas, ekde kiam la Respubliko Ĉinio, Francio, Sovetunio, Britio kaj Usono kaj la plimulto de la aliaj subskribintaj ŝtatoj estas deponintaj la ratifajn dokumentojn. La registaro de Usono faros tiam protokolon pri la deponado de la ratifaj dokumentoj, de kiu ĝi transdonas kopiojn al ĉiuj subskribintaj ŝtatoj.
4. La subskribintaj ŝtatoj de tiu ĉi Ĉarto, kiuj ratifos ĝin post ĝia ekvalido, fariĝas en la tago de la depono de sia ratifo-dokumento originaj membroj de la Unuiĝintaj Nacioj.

Ĉapitro XIX – Ratifo kaj subskribo

Artikolo 111

Tiu ĉi Ĉarto, kies ĉina, franca, rusa, angla kaj hispana versio estas same deviga, estas deponota en la arĥivo de la registaro de Usono. Tiu transdonas dece legitimitajn kopiojn al la registaroj de la ceteraj subskribintaj ŝtatoj.

TION DOKUMENTANTE la reprezentantoj de la registaroj de la Unuiĝintaj Nacioj subskribis tiu ĉi Ĉarton.

OKAZINTA en la urbo San-Francisko la 26-an de junio 1945.

Universala Deklaro de Homrajtoj

**Adoptita kaj proklamita de la Rezolucio
217 A (III) de la Ĝenerala Asembleo, la 10-an
de decembro 1948**

Antaŭkonsideroj

Konsiderante, ke agnosko de la esence propra digno de ĉiuj membroj de la homa familio kaj de iliaj egalaj kaj nece-deblaj rajtoj konsistigas la fundamenton de la libereco, just-eco kaj paco en la mondo,

Konsiderante, ke malagnosko kaj malestimo de la homrajtoj rezultigis barbarajn agojn, kiuj ofendegis la konsciencon de la homaro, kaj ke la apero de mondo, en kiu la homoj estos liberaj paroli kaj kredi, liberigitaj el teroro kaj mizero, estas proklamita la plej alta aspiro de la homo,

Konsiderante, ke esence gravas ke la homrajtoj estu protektataj de jurŝtata reĝimo por ke la homoj ne estu devigataj, kiel lasta solvo, ribeli kontraŭ tiranismo kaj subpremo,

Konsiderante, ke nepras disvolvi amikajn rilatojn inter la nacioj,

Konsiderante, ke la popoloj de la Unuiĝintaj Nacioj en la Ĉarto reasertis sian firman kredon je la fundamentaj homrajtoj, je la digno kaj valoro de la homa persono kaj je la

Universala Deklaro de Homrajtoj

egalaj rajtoj de viroj kaj virinoj, kaj firme decidis antaŭenigi socian progreson kaj pli bonajn vivkondiĉojn en pli granda libereco,

Konsiderante, ke la membroŝtatoj sin devigis atingi, en kunlaboro kun la Unuiĝintaj Nacioj, la antaŭenigon de universala respekto al kaj observado de la homrajtoj kaj de la fundamentaj liberecoj,

Konsiderante, ke komuna koncepto de tiuj rajtoj kaj liberecoj estas plej grava por plenumi plene tiun sindevigon,

La Ĝenerala Asembleo

deklaras tiun ĉi Universalan Deklaron de Homrajtoj la komuna idealo atingenda de ĉiuj popoloj kaj ĉiuj nacioj por ke ĉiuj individuoj kaj ĉiuj organoj de la socio, konstante konsciaj pri tiu ĉi Deklaro, strebu, per instruado kaj edukado, al respektigo de tiuj ĉi rajtoj kaj liberecoj, kaj per laŭgradaj paŝoj naciaj kaj internaciaj certigu ilian universalan kaj efektivan agnoskon kaj observadon, same tiel inter la popoloj de la membroŝtatoj mem, kiel inter la popoloj de teritorioj sub ilia jursistemo.

Artikolo 1

Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj. Ili posedas racion kaj konsciencon, kaj devas kondukti unu al alia en spirito de frateco.

Artikolo 2

Ĉiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en tiu ĉi Deklaro validas same por ĉiuj homoj, sen ia ajn distingo, ĉu laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato. Plie, nenia distingo estu farata surbaze de la politika, jursistema aŭ internacia pozicio de la lando aŭ teritorio, al kiu apartenas

Universala Deklaro de Homrajtoj

la koncerna persono, senkonsidere ĉu ĝi estas sendependa, sub kuratoreco, neaŭtonoma aŭ sub ia ajn alia limigo de la suvereneco.

Artikolo 3

Ĉiu havas la rajtojn je vivo, libereco kaj persona sekureco.

Artikolo 4

Neniu estu tenata en sklaveco aŭ servuteco; ĉiaj sklaveco kaj sklavkomerco estas malpermesitaj.

Artikolo 5

Neniu suferu torturon aŭ kruelan, nehuman aŭ sendignigan traktadon aŭ punon.

Artikolo 6

Ĉiu rajtas esti ĉie agnoskita jure kiel persono.

Artikolo 7

Ĉiuj homoj estas jure egalaj, kaj rajtas sen diskriminacio al egala jura protekto. Ĉiuj rajtas ricevi egalan protekton kontraŭ ia ajn diskriminacio, kiu kontraŭas tiun ĉi Deklaron, kaj kontraŭ ia ajn instigo al tia diskriminacio.

Artikolo 8

Ĉiu rajtas ricevi de la kompetentaj naciaj tribunaloj efikan riparon pro agoj, kiuj kontraŭas la fundamentajn rajtojn, kiujn li havas laŭ la konstitucio aŭ la leĝoj.

Universala Deklaro de Homrajtoj

Artikolo 9

Neniu suferu arbitrajn areston, malliberigon aŭ ekzilon.

Artikolo 10

Ĉiu en plena egaleco rajtas je justa kaj publika proceso antaŭ sendependa kaj senpartia tribunalo, por prijuĝo de liaj rajtoj kaj devoj kaj de iu ajn kriminala akuzo kontraŭ li.

Artikolo 11

Ĉiu akuzita pro punebla faro rajtas, ke oni supozu lin senkulpa, ĝis oni pruvos laŭleĝe lian kulpon en publika proceso, en kiu li ricevis ĉiujn garantiojn necesajn por sia defendo.

Neniu estu konsiderata krimkulpa pro ia ajn ago aŭ neago, kiu ne konsistigis puneblan faron, laŭ nacia aŭ internacia juro, en la tempo, kiam ĝi estis farita. Same tiel, ne estu aljuĝita pli severa puno ol tiu, kiu estis aplikebla en la tempo, kiam la punebla faro estis plenumita.

Artikolo 12

Neniu suferu arbitrajn intervenojn en sian privatecon, familion, hejmon aŭ korespondadon, nek atakojn kontraŭ sia honoro aŭ reputacio. Ĉiu rajtas ricevi juran protekton kontraŭ tiaj intervenoj aŭ atakoj.

Artikolo 13

1. Ĉiu havas la rajton libere moviĝi kaj loĝi interne de la limoj de iu ajn ŝtato.
2. Ĉiu rajtas eliri el iu ajn lando, inkluzive la propran, kaj reveni en sian landon.

Universala Deklaro de Homrajtoj

Artikolo 14

1. Ĉiu rajtas peti kaj ricevi en aliaj landoj azilon kontraŭ persekuto.
2. Tiu rajto ne estas alvokebla en kazoj de persekutaj akuzoj malfalse levitaj pro ne-politikaj krimoj aŭ pro agoj kontraŭaj al la celoj kaj principoj de la Unuiĝintaj Nacioj.

Artikolo 15

1. Ĉiu rajtas havi ŝtatanecon.
2. Al neniu estu arbitre forprenita la ŝtataneco, nek rifuzita la rajto ŝanĝi sian ŝtatanecon.

Artikolo 16

1. Plenaĝaj viroj kaj virinoj, sen ia ajn limigo pro raso, nacieco aŭ religio, rajtas edziĝi kaj fondi familion. Iliaj rajtoj estas egalaj koncerne la geedziĝon, dum la geedzeco kaj koncerne eksedziĝon.
2. Geedziĝo okazu sole laŭ libera kaj plena konsento de la geedziĝontoj.
3. La familio estas la natura kaj fundamenta grupunuo de la socio, kaj ĝi rajtas ricevi protekton de la socio kaj de la ŝtato.

Artikolo 17

1. Ĉiu rajtas proprieti havaĵon, kaj sola kaj en asociiĝo kun aliaj.
2. Al neniu estu arbitre forprenita lia proprieto.

Universala Deklaro de Homrajtoj

Artikolo 18

Ĉiu havas la rajton je libereco de penso, konscienco kaj religio; tiu ĉi rajto inkluzivas la liberecon ŝanĝi sian religion aŭ kredon, kaj liberecon manifesti, ĉu sola ĉu kune kun aliaj, ĉu publike ĉu private, sian religion aŭ kredon per instruado, praktikado, adorado kaj observado.

Artikolo 19

Ĉiu havas la rajton je libereco de opinio kaj esprimado; ĉi tiu rajto inkluzivas la liberecon havi opiniojn sen intervenoj de aliaj, kaj la rajton peti, ricevi kaj havigi informojn kaj ideojn per iu ajn rimedo kaj senkonsidere pri la landlimoj.

Artikolo 20

1. Ĉiu havas la rajton je libereco de pacema kunvenado kaj asociiĝo.
2. Neniu estu devigita aparteni al asocio.

Artikolo 21

1. Ĉiu homo rajtas partopreni la regadon de sia lando, aŭ rekte aŭ pere de libere elektitaj reprezentantoj.
2. Ĉiu rajtas je egala aliro al publika servo en sia lando.
3. La volo de la popolo estu la bazo de la aŭtoritato de la registaro; tiu volo estu esprimata per regulaj kaj aŭtentaj elektoj, kiuj okazu per universala kaj egala balotrajto, kaj per sekreta voĉdono aŭ ekvivalentaj liberaj voĉdonaj proceduroj.

Universala Deklaro de Homrajtoj

Artikolo 22

Ĉiu, kiel membro de la socio, havas rajton je socia sekureco kaj povas postuli la realigon, per naciaj klopodoj kaj internacia kunlaboro, kaj konforme al la organizo kaj disponeblaj rimedoj de ĉiu ŝtato, de tiuj ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj, kiuj estas nepre necesaj por lia digno kaj por la libera disvolviĝo de lia personeco.

Artikolo 23

1. Ĉiu havas rajton je laboro, je libera elekto de sia okupo, je justaj kaj favoraj laborkondiĉoj kaj je protekto kontraŭ senlaboreco.
2. Ĉiu, sen ia ajn diskriminacio, rajtas ricevi egalan salaron pro egala laboro.
 1. Ĉiu, kiu laboras, rajtas ricevi justan kaj favoran kompencon, kiu certigu por li mem kaj por lia familio ekziston konforman al homa digno, kaj kiun suplementu, laŭnecese, aliaj rimedoj de socia protekto.
 2. Ĉiu rajtas formi kaj aliĝi sindikatojn por protekto de siaj interesoj.

Artikolo 24

Ĉiu havas rajton je ripozo kaj libertempo, inkluzive racian limigon de la laborhoroj kaj periodajn feriojn kun salajro.

Artikolo 25

1. Ĉiu havas rajton je vivnivelo adekvata por la sano kaj bonfarto de si mem kaj de sia familio, inkluzive de nutraĵo, vestaĵoj, loĝejo kaj medicina prizorgo kaj necesaj sociaj servoj, kaj la rajton je sekureco en okazo de senlaboreco, malsano, nekapablo, vidvineco, maljuneco aŭ

Universala Deklaro de Homrajtoj

alia perdo de la vivrimedoj pro cirkonstancoj ekster sia povo.

2. Patrineco kaj infaneco rajtigas al specialaj prizorgoj kaj helpo. Ĉiuj infanoj, egale ĉu ili naskiĝis en aŭ ekster geedzeco, ricevu saman socian protekton.

Artikolo 26

1. Ĉiu havas rajton je edukiĝo. La edukado estu senpaga, almenaŭ en la elementa kaj fundamenta stadioj. La elementa edukado estu deviga. La teĥnika kaj porprofesia edukado estu ĝenerale akirebla, kaj pli alta edukado estu egale akirebla por ĉiuj laŭ liaj meritoj.
2. Edukado celu la plenan disvolvon de la homa personeco kaj plifortigon de la respekto al la homrajtoj kaj fundamentaj liberecoj. Ĝi kreskigu komprenon, toleron kaj amikecon inter ĉiuj nacioj, rasaj aŭ religiaj grupoj, kaj antaŭenigu la agadon de la Unuiĝintaj Nacioj por konservado de paco.
3. Gepatroj havas unuavican rajton elekti la specon de la edukado, kiun ricevu iliaj infanoj.

Artikolo 27

1. Ĉiu rajtas libere partopreni la kulturalan vivon de la komunumo, ĝui la artojn kaj partopreni sciencajn progresojn kaj ties fruktojn.
2. Ĉiu havas rajton je protekto de la moralaj kaj materiaj interesoj rezultantaj el eventualaj sciencaj, literaturaj aŭ artaj produktaĵoj, kiujn li aŭtoris.

Universala Deklaro de Homrajtoj

Artikolo 28

Ĉiu havas rajton je socia kaj internacia organizo, en kiu la rajtoj kaj liberecoj difinitaj en ĉi tiu Deklaro povas esti plene realigitaj.

Artikolo 29

1. Ĉiu havas devojn al la komunumo, en kiu, sole, estas ebla la libera kaj plena disvolviĝo de lia personeco.
2. En la uzado de siaj rajtoj kaj liberecoj, ĉiu estu subigita sole al tiuj limigoj, kiuj estas jure difinitaj ekskluzive kun la celo certigi adekvatan rekonon kaj respekton por la rajtoj kaj liberecoj de aliaj kaj por konformiĝi al justaj postuloj de moralo, publika ordo kaj ĝenerala bonfarto en demokratia socio.
3. Tiuj ĉi rajtoj kaj liberecoj estas en neniu okazo efektiveblaj kontraŭe al la celoj kaj principoj de la Unuiĝintaj Nacioj.

Artikolo 30

Nenio en ĉi tiu Deklaro estu interpretita kiel implico, ke iu ajn ŝtato, grupo aŭ persono iel ajn rajtas entrepreni ian ajn agadon aŭ plenumi ian ajn agon, kiu celus detrui iun ajn el la rajtoj kaj liberecoj ĉi-ene difinita.

Notoj de la tradukinto

Tiu ĉi versio baziĝas sur tiu kiun ni aperigis en la oficiala teksejo, tamen reviziita, korektita kaj kun kelkaj sistemecaj ŝanĝoj:

Universala Deklaro de Homrajtoj

Deklaro: Mi uzas la vorton *deklaro*. Iuj asertas ke ekzistas nialingve la vorto *deklaracio* (ja efektive agnoskita per la 3-a oficialigo – kio dubigas la valoron de akademiaj decidoj) kaj ke tiu havas alian sencon ol la vere Esperanta vorto *deklaro*. Mi sekvas la indikon de la Reta Vortaro ReVo, kiu, ĉe *deklaracio*, resendas al *deklaro*. La signifo de *deklaro* de alta ŝtata aŭ internacia institucio ne estas alia ol tiu de ĉiu ajn alia deklaro de simpla homo. La rangon de deklaro ne donas la vorto *deklaro*, sed la mencio de la rango de la deklaranto, do, deklaro de altranga institucio havas ties rangon. Sed la vorto *deklaracio* estas ne nur nenecesa. Uzi kaj konsili la vorton *deklaracio* donas alian sencon al la Fundamenta vorto *deklaro* kaj tiel falsas la Fundamenton – kio ne vere kontribuas al pli bona internacia kompreniĝo ...

Homrajtoj: Bedaŭrinde en nia lingvo disvastiĝis la fuŝa esprimo *homaj rajtoj*, paŭsita el la angla *human rights* (kiun sekvis ankaŭ la hispana *derechos humanos*), kvazaŭ tiuj rajtoj estus homaj aŭ homecaj. Sed tiuj rajtoj ne havas ian homan econ, ili estas nek homaj nek ĝentilaj, ili estas rajtoj de la homo, homrajtoj, kiel esprimas ja ankaŭ ekzemple la franclingva *droits de l'homme* (ne *droits humains*) kaj la germana *Menschenrechte* (kaj ne: *menschliche Rechte*).

Unuiĝintaj Nacioj (sen artikolo): En kelkaj tekstoj troviĝas la formulo „La Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj”, do ĉie *Unuiĝintaj Nacioj* sen artikolo. Tio estas miskompreno de nia gramatiko. Temas pri propra nomo konsistanta el ĝenerallingvaj elementoj kaj do postulas la artikolon.

Eraroj: Kompreneble la tekstoj de tiu ĉi eldono ne estas sen eraroj. Bonvolu trovi ilin kaj indiki ilin al mi, por ke ili estu elsarkigitaj en estonta eldono.

Vilhelmo Lutermano

La Konsilantaro pri Homrajtoj

La Konsilantaro pri Homrajtoj estas interregistara organo de la sistemo de la Unuiĝintaj Nacioj, konsistanta el 47 ŝtatoj kiuj havas la respondecon fortigi la disvastigon kaj la protektadon de la homrajtoj ĉie sur la planedo. La Konsilantaro estis starigita de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj, la 15-an de marto 2006, kun la ĉefa celo pritrakti situaciojn de malrespekto al homrajtoj kaj fari rekomendojn kontraŭ tiuj malrespektoj.

Unu jaron post sia unua kunsido, la 18-an de julio 2007, la Konsilantaro adoptis sian „starigon de la institucioj” kiuj liveras al ĝi la elementojn por trovi la novan meĥanisman de universala perioda ekzamenado kiu ebligas pritaksi la situaciojn de la homrajtoj en ĉiu el la 192 membroŝtatoj de la UN. Inter aliaj instrumentoj troviĝas nova Konsulta Komitato kiu servas al la Konsilantaro kiel „pensadgrupo” kaj liveras al ĝi ekspertizojn kaj konsilojn pri laŭtemaj demandoj de la homrajtoj, kaj la reviziita plendmeĥanismo kiu ebligas al individuoj kaj al organizaĵoj sciigi al la Konsilantaro plendojn pri malrespektoj al homrajtoj. La Konsilantaro pri Homrajtoj dense kunlaboras ankaŭ daŭre kun la specialaj proceduroj de la UN, starigitaj de la antaŭa Komisiono pri Homrajtoj kaj akceptitaj de la Konsilantaro.

Rezolucio 60/251 adoptita de la Ĝenerala Asembleo Konsilantaro pri Homrajtoj

La Ĝenerala Asembleo,

Reasertante la celojn kaj principojn esprimitajn en la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj kaj aparte tiujn kiuj strebas stariĝi inter la nacioj amikajn rilatojn bazitajn sur la respekto de la principo de rajtegaleco de la popoloj kaj de ilia rajto disponi pri si mem, kaj realigi la internacian kunlaboradon por solvi la internaciajn ekonomiajn, sociajn, kulturajn aŭ homhelpajn problemojn kaj por disvolvi kaj subteni la respekton al la homrajtoj kaj la fundamentaj liberecoj por ĉiuj.

Reasertante ankaŭ la Universalan Deklaron de Homrajtoj¹ kaj la Deklaron kaj la agadplanon de Vieno², kaj memorigante la Internacian Traktaton pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj³, la Internacian Traktaton pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj⁴ kaj la ceterajn instrumentojn pri homrajtoj,

Reasertante krome ke ĉiuj homrajtoj estas universalaj, nedivideblaj, necedeblaj kaj interdependaj kaj fortigante sin reciproke, ke ĉiuj homrajtoj konsiderendas kiel same gravaj kaj ke oni devas gardi sin hierarĥiigi ilin aŭ privilegii iujn el ili,

Reasertante ke, kvankam necesas konscii pri la graveco de la naciaj kaj regionaj apartecoj kaj pri la diverseco de la historiaj, kulturaj kaj religiaj kuntekstoj, ĉiuj ŝtatoj, kia ajn estas ilia politika reĝimo, ilia ekonomia sistemo kaj ilia kul-

1 Rezolucio 217 A (III).

2 A/Conf.157.24 (Part. I), ĉap. III.

3 Vd la rezolucion 2200 A (XXI), anekso.

4 Vd la rezolucion 2200 A (XXI), anekso.

Rezolucio 60/251 adoptita de la Ĝenerala Asembleo
Konsilantaro pri Homrajtoj

tura heredaĵo, havas ne malpli la devon antaŭenigi kaj defendi ĉiujn homrajtojn kaj ĉiujn fundamentajn liberecojn,

Emfazante ke estas la devo de ĉiuj ŝtatoj, kaŭze de la Ĉarto, respekti la homrajtojn kaj la fundamentajn liberecojn de ĉiuj, sen ajna distingo bazita sur raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politikaj aŭ aliaj opinioj, nacia aŭ socia deveno, havaĵoj, naskiteco aŭ aliaj konsideroj,

Konsiderante ke la paco kaj la sekureco, la disvolvado kaj la homrajtoj estas la soklo sur kiu staras la sistemo de la Unuiĝintaj Nacioj kaj la bazoj de la kolektivaj sekureco kaj bonfarto, kaj sciante ke disvolvado, paco, sekureco kaj homrajtoj estas nedisigeblaj kaj fortigas sin reciproke,

Asertante ke ĉiuj ŝtatoj devas daŭrigi la klopodojn faratajn sur internacia nivelo por profundigi la dialogon kaj favori pli bonan komprenon inter la civilizacioj, kulturoj kaj religioj, kaj emfazante ke la ŝtatoj, la regionaj organizaĵoj, la neregistaraj organizaĵoj, la religiaj organismoj kaj la komunikiloj devas ludi gravan rolon en la instigado al toleremo, al respekto de la religioj kaj konvinkoj kaj de la libereco je religio kaj konvinko,

Konscia pri la laboro farita de la Komisiono pri Homrajtoj kaj pri la neceso konservi kaj solidigi ĝiajn atingojn kaj korekti ĝiajn mankojn,

Konscia ankaŭ ke gravas certigi la universalecon, objektecon kaj neselektecon de la ekzamenado de la homrajtaj demandoj kaj ĉesigi la praktikon de malegalaj mezuroj kaj ĉian politikigon,

Konscia krome ke la antaŭenigo kaj defendo de la homrajtoj bazendas sur la principojn de kunlaborado kaj aŭtenta dialogo kaj la strebado fortigi la kapablon de la membroŝtato plenumi siajn devojn rilate la homrajtojn en la intereso de ĉiuj homaj estuloj,

La Konsilantaro pri Homrajtoj

Rekonante ke la neregistaraj organizaĵoj ludas gravan rolon sur nacia, regiona kaj internacia nivelo en la antaŭenigo kaj defendo de la homrajtoj,

Reasertante sian sindevigon fortigi la organismojn de la Unuiĝintaj Nacioj por la homrajtoj, kun la celo certigi la efektivan kaj universalan uzadon de la homrajtoj, civilaj, politikaj, socialaj kaj kulturaj, inkluzive de la rajto je disvolvado, kaj, en tiu senco, sian decidon starigi konsilantaron pri homrajtoj,

1. *Decidas* starigi la Konsilantaron pri Homrajtoj, kun sidejo en Genevo, kaj kiu anstataŭas la Komisionon pri Homrajtoj, kiel subsidiara organo de la Ĝenerala Asembleo, kiu devas reekzameni la statuton de la Konsilantaro en kvin jaroj;
2. *Decidas* ke la Konsilantaro estas taskita antaŭenigi la universalan respekton kaj la defendon de ĉiuj homrajtoj kaj de ĉiuj fundamentaj liberecoj, por ĉiuj, sen ajna distingo kaj juste kaj egalece;
3. *Decidas ankaŭ* ke la Konsilantaro ekzameni la malrespektojn al la homrajtoj, speciale se ili estas evidentaj kaj sistemaj, kaj faru rekomendojn pri tio; ĝi agos por ke la agadoj de la sistemo de la Unuiĝintaj Nacioj koncerne homrajtojn estu kunordigataj kaj ke la demando de homrajtoj estu sisteme konsiderata de ĉiuj organismoj de la sistemo;
4. *Decidas krome*, ke, en sia agado, la Konsilantaro orientiĝu laŭ la principoj de universaleco, nepartieco, objektiveco kaj neselekto, de konstruivaj dialogo kaj kunlaborado sur internacia nivelo tiel ke ĝi favoras la antaŭenigon kaj defendon de ĉiuj homrajtoj - civilaj, politikaj, ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj, inkluzive de la rajto je disvolvado;
5. *Decidas*, ke la Konsilantaro havas aparte la taskon:

Rezolucio 60/251 adoptita de la Ĝenerala Asembleo
Konsilantaro pri Homrajtoj

- a) Antaŭenigi la edukadon kaj formadon en la kampo de homrajtoj kaj la konsultajn servojn, teĥnikan helpadon kaj la fortigon de la kapablecoj alportotajn laŭ konsultoj kaj konsento de la koncernataj membroŝtatoj;
- b) Esti loko de dialogo pri la laŭtemaj demandoj koncerne ĉiujn homrajtojn;
- c) Fari al la Ĝenerala Asembleo rekomendojn daŭre disvolvi la internacian juron en la kampo de la homrajtoj;
- ĉ) *[alilingve: d)]* Instigi al integra respekto de la devigoj subskribitaj de la ŝtatoj en la kampo de homrajtoj kaj al realigo de la fiksitaj celoj kaj al respekto de la sindevigoj koncerne la antaŭenigo kaj defendo de la homrajtoj devenaj el la konferencoj kaj kunvenoj ĉe la pinto de la Unuiĝintaj Nacioj;
- d) *[alilingve: e)]* Fari universalan periodan ekzamenadon, surbaze de objektivaj kaj fidindaj informoj, de la respekto, fare de ĉiu ŝtato, de siaj devoj kaj sindevigoj koncerne la homrajtojn, en maniero kiu garantias la universalecon de sia agado kaj la egalecon de la traktado de ĉiuj ŝtatoj; komprenante sin kiel entreprenon de kunlaborado bazitan sur dialogo en kiu la koncernata lando plene partoprenas kaj kiu konsideras ties bezonojn pri fortigo de ĝiaj kapabloj, tiu ekzamenado kompletigas la laboron de la konvenciaj organoj sen fari duoban laboron; la Konsilantaro decidis pri la manieroj de la universala perioda ekzamenado kaj pri la necesa tempo por tio, en la jaro kiu sekvas ĝian unuan sesion;
- e) *[alilingve: f)]* Kunlabori, favore al dialogo kaj kunlaborado, por antaŭmalhelpi la malrespektojn al homrajtoj kaj interveni tuj en urĝaj kazoj en la kampo de homrajtoj;

La Konsilantaro pri Homrajtoj

- f) [*alilingve: g*] Plenumi la taskojn de respondecoj de la Komisiono pri Homrajtoj koncerne la agadon de la Alta Komisariejo de la Unuiĝintaj Nacioj pri Homrajtoj, kiel decidis la Ĝenerala Asembleo en sia rezolucio 48/141 de la 20-a de decembro 1993;
 - g) [*alilingve: h*] Agi en densa kunlaborado kun la registaroj, la regionaj organizaĵoj, la naciaj organizaĵoj de defendo al homrajtoj kaj la civila socio en rilato kun homrajtoj;
 - h) [*alilingve: i*] Formuli rekomendojn pri antaŭenigo kaj defendo de la homrajtoj;
 - i) [*alilingve: j*] Prezenti jaran raporton al la Ĝenerala Asembleo;
6. *Decidas ankaŭ* ke la Konsilantaro alprenu, reekzamenu kaj laŭbezone plibonigu kaj raciigu ĉiujn mandatojn, meĥanismojn, funkciojn kaj atribuaĵojn de la Komisiono pri Homrajtoj en maniero taŭga por daŭrigi la reĝimon de la specialaj proceduroj, kaj konsil- kaj plend-meĥanismon; la Konsilantaro finu tiun ekzamenadon en la jaro kiu sekvas ĝian unuan sesion;
7. *Decidas krome* ke la Konsilantaro konsistu el kvardek-sep membroŝtatoj elektotaj rekte kaj individue je sekreta voĉdonado per plimulto de la voĉoj de la Ĝenerala Asembleo; ĝia konsisto respektu egalecan geografian disdividon; la seĝoj estu inter la regionaj grupoj jene disdividitaj: dek-tri por la Grupo de Afrikaj Ŝtatoj; dek-tri por la Grupo de la Aziaj Ŝtatoj; ses por la Grupo de Orienteŭropaj Ŝtatoj; ok por la Grupo de Latinamerikaj kaj Karibiaj Ŝtatoj; kaj sep por la Grupo de Okcident-eŭropaj Ŝtatoj kaj Aliaj Ŝtatoj; elektataj por trijara mandato, la membroj de la Konsilantaro ne reelekteblas post du sinsekvaj mandatoj;
8. *Decidas* ke ĉiuj membroŝtatoj de la Unuiĝintaj Nacioj

Rezolucio 60/251 adoptita de la Ĝenerala Asembleo Konsilantaro pri Homrajtoj

povas kandidati por seĝo de la Konsilantaro; dum elektado de la Konsilantaro la membroŝtatoj konsideras la kontribuajon kiun faris ĉiu kandidato por la celo de antaŭenigo kaj defendo de la homrajtoj kaj la libervolajn kontribuojn kiujn li anoncis kaj la sindevigojn kiujn li faris pri tio; la Ĝenerala Asembleo povas, je du triona plimulto de la voĉoj de la ĉeestantaj kaj voĉdonantaj membroj, suspendi la rajtojn de membro de la Konsilantaro, kiu faris evidentajn kaj sistemajn malrespektajn al la homrajtoj, kunsidi en ĝi;

9. *Decidas ankaŭ* ke la elektitaj membroj de la Konsilantaro observu la plej striktajn normojn koncerne antaŭenigo kaj defendo de homrajtoj, plene kunlaboru kun la Konsilantaro kaj estu submetataj al la proceduro de universala perioda ekzamenado dum sia mandato;
10. *Decidas krome* ke la Konsilantaro kunvenu regule dum la tuta jaro kaj faru almenaŭ tri sesiojn jare, el kiuj unu ĉefsesio kiu daŭru entute almenaŭ dek semajnojn, kaj povas fari laŭbezzone eksterordinarajn sesiojn se membro petas tion kun apogo pri tio de triono de la Konsilantaro;
11. *Decidas* ke la Konsilantaro apliku la disponojn de la Interna Regularo koncerne la grandajn komisionojn de la Ĝenerala Asembleo escepte se poste, tiu aŭ la Konsilantaro mem decidas alie; kaj decidas ankaŭ ke observantoj, inkluzive de la ŝtatoj kiuj ne estas membroj de la Konsilantaro, la specialaj institucioj, la aliaj interregistaraj organizaĵoj, la naciaj institucioj pri defendo de la homrajtoj kaj la neregistaraj organizaĵoj povu partopreni en la laboro de la Konsilantaro kaj estu konsulteblaj de tiu, laŭ la reĝimo, nome la rezolucio 1996/31 de la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro, de la 25-a de julio 1996, kaj la praktikoj observataj de la Komisiono pri Homrajtoj, tiel ke ili povu doni la kiom eble plej bo-

La Konsilantaro pri Homrajtoj

nan kontribuaĵon;

12. *Decidas ankaŭ* ke la labormetodoj de la Konsilantaro estu travideblaj, egalecaj kaj senpartiecaj kaj ebligu veran dialogon, estu orientitaj al la rezultoj kaj ebligu postajn debatojn pri la traktado de la adoptitaj rekomendoj kaj pri ties aplikado kaj substancan interagadon kun specialaj procedoj kaj meĥanismoj:
13. *Rekomendas* ke la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro petu la Komisionon pri Homrajtoj ke ĝi finu siajn laborojn en sia 62-a sesi-periodo kaj ke ĝi malfondu la Komisionon la 16-an de junio 2006;
14. *Decidas* elekti la novajn membrojn de la Konsilantaro, kies mandatoj estu disŝovitaj, laŭ reguloj difinitaj de la unua elekto per lotumo, kun konsidero al egaleca geografia disdivido;
15. *Decidas ankaŭ* ke la elektoj de la unuaj membroj de la Konsilantaro okazu la 9-an de majo 2006 kaj ke la unua sesio de la Konsilantaro okazu la 19-an de junio 2006;
16. *Decidas krome* ke la Konsilantaro reviziu sian laboron kaj sian funkciadon kvin jarojn post sia stariĝo kaj informu pri tio la Ĝeneralan Asembleon.

72-a plensesio

la 15-an de marto 2006

Internacia traktato pri ekonomiaj, sociaj kaj kul- turaj rajtoj

de la Unuiĝintaj Nacioj

**Adoptita kaj malfermita al subskribo, ratifo
kaj aliĝo de la Ĝenerala Asembleo en sia re-
zolucio 2200 A (XXI) de la 16-a de decembro
1966**

Ekvalida: la 3-an de januaro 1976,

konforme al la dispozicioj de la artikolo 27

ANTAŬPARTO

La membroŝtatoj de tiu ĉi traktato [*en la sekvo nomataj traktatoŝtatoj*],

Konsiderante ke, konforme al la principoj eldiritaj en la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, la agnosko de la digno esence propra al ĉiuj membroj de la homa familio kaj de iliaj egalaj kaj necedeblaj rajtoj konsistigas la fundamenton de la libereco, de la justeco kaj de la paco en la mondo,

Agnoskante ke tiuj rajtoj devenas el la digno esence propra al la homo,

Agnoskante ke, konforme al la Universala Deklaro de la Homrajtoj, la idealo de la libera homa estulo, liberigita el timo kaj mizero, realigeblas nur se estas kreitaj kondiĉoj

Internacia traktato pri ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj

kiuj ebligas al ĉiu ĝui siajn ekonomiajn, sociajn kaj kulturajn rajtojn, same kiel siajn civilajn kaj politikajn rajtojn,

Konsiderante ke la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj trudas al la ŝtatoj la devon disvolvi la universalan kaj efektivan respektadon de la homaj rajtoj kaj liberecoj,

Ekkonsiderante la fakton ke la individuo havas devojn al aliaj kaj al la komunumo al kiu li apartenas kaj devas nepre klopodi subteni kaj respekti la rajtojn de tiu ĉi traktato,

Interkonsentis pri la sekvaj artikoloj:

Unua parto

Artikolo 1

1. Ĉiuj popoloj havas la rajton disponi pri si mem. Kaŭze de tiu rajto, ili decidas libere pri sia politika statuso kaj determinas libere sian ekonomian, socian kaj kulturen disvolvadon.
2. Por atingi siajn celojn, ĉiuj popoloj povas libere disponi pri siaj riĉaĵoj kaj siaj naturresursoj, sen malutilo por la devoj devenaj el la internacia ekonomia kunlaborado, fondita sur la principo de reciproka intereso, kaj el la internacia juro. Neniaokaze popolo povos esti senigita de siaj propraj vivrimedoj.
3. La traktatoŝtatoj, inkluzive de tiuj kiuj havas la respondecon administri neaŭtonomajn teritoriojn kaj prokurajn teritoriojn, nepre devas faciligi la realigon de la rajto de la popoloj disponi pri si mem, kaj respekti tiun rajton, konforme al la dispozicioj de la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj.

Dua parto

Artikolo 2

1. Ĉiu traktatoŝtato devigas sin agi, same per sia propra klopodo kiel per internacia helpo kaj kunlaborado, nome sur la ekonomia kaj teĥnika kampo, per la maksimumo de siaj disponeblaj resursoj, por pli kaj pli certigi la plenan plenumadon de la rajtoj agnoskitaj en tiu ĉi traktato per ĉiuj taŭgaj rimedoj, inkluzive aparte la adoptado de leĝdonaj disponoj.
2. La traktatoŝtatoj devigas sin garantii ke la rajtoj tie esprimitaj estu uzataj sen ajna diskriminacio fondita sur raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika opinio aŭ ia alia opinio, nacia aŭ socia deveno, riĉeco, naskiteco aŭ ia alia situacio.
3. La evolulandoj, jure konsiderante la homrajtojn kaj sian nacian ekonomion, povas decidi, kiumezure ili garantios la ekonomiajn rajtojn, agnoskitajn en tiu ĉi traktato, al neŝtatanoj.

Artikolo 3

La traktatoŝtatoj devigas sin certigi la egalan rajton kiun havas viro kaj virino profite de ĉiuj ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj elnomataj en tiu ĉi traktato.

Artikolo 4

La traktatoŝtatoj agnoskas ke, en la uzado de la rajtoj certigitaj de la ŝtato konforme al tiu ĉi traktato, la ŝtato povas submeti tiujn rajtojn nur al limoj starigitaj de la leĝo, nur en la mezuro kongrua kun la naturo de tiuj rajtoj kaj ekskluzive por favori la ĝeneralan bonfarton en demokratia socio.

Internacia traktato pri ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj

Artikolo 5

1. Neniu dispozicio de tiu ĉi traktato interpreteblas kiel implicanta por ŝtato, grupo aŭ individuo ian rajton por agado, aŭ por plenumi agon, cele al detruo de la rajtoj aŭ liberecoj agnoskitaj en tiu ĉi traktato aŭ al pli ampleksaj limigoj ol tiuj nomataj en tiu ĉi traktato.
2. Ne allaseblas ajna restrikto aŭ malobeco al la fundamentaj homrajtoj agnoskitaj aŭ validaj en ĉiu lando kaŭze de leĝoj, konvencioj, reglamentoj aŭ kutimoj, sub preteksto ke tiu ĉi traktato ne agnoskas ilin aŭ agnoskas ilin en malpli granda grado.

Tria parto

Artikolo 6

1. La traktatoŝtatoj agnoskas la rajton je laboro, kiu entenas la rajton por ĉiu homo akiri la eblecon perlabori sian vivon per laboro libere elektita aŭ akceptita, kaj faros taŭgajn disponojn por protekti tiun rajton.
2. La disponoj kiun ĉiu traktatoŝtato faros por certigi la plenan uzadon de tiu rajto devas inkludi la teĥnikajn kaj profesiajn orientadon kaj formadon, la ellaboradon de taŭgaj programoj, de politikoj kaj teĥnikoj por certigi konstantan ekonomian, socian kaj kulturen disvolvadon kaj produktivan plendungecon en kondiĉoj kiuj konservas al la individuoj la uzadon de la fundamentaj politikaj kaj ekonomiaj liberecoj.

Tria parto

Artikolo 7

La traktatoŝtatoj agnoskas la rajton kiun havas ĉiu homo ĝui justajn kaj favorajn laborkondiĉojn, kiuj certigas nome:

- a) La kompensaĵon kiu donas, minimume, al ĉiuj laboristoj:
 - I. Justan salajron kaj egalan kompensaĵon por laboro de egala valoro sen ajna distingo; aparte, la virinoj devas havi la garantion ke iliaj laborkondiĉoj ne estu malpli altaj ol tiuj kiujn ĝuas la viroj kaj ricevi la saman kompensaĵon kiel ili por sama laboro;
 - II. Decan ekzistadon por ili kaj ilia familio konforme al la dispozicioj de tiu ĉi traktato;
- b) Sekurecon kaj higienon de la laboro;
- c) Saman eblecon por ĉiuj esti promociataj, en sia laboro, al konvena supera kategorio, sen alia konsidero ol la daŭro de la plenumitaj servoj kaj la kapablecoj;
- ĉ) Ripozon, libertempojn, konvenan labordaŭron kaj periode pagatajn feriojn, kaj pagojn por feriaj tagoj.

Artikolo 8

1. La traktatoŝtatoj devigas sin certigi:
 - a) La rajton kiun havas ĉiu homo formi kun aliaj sindikatojn kaj aliĝi al la sindikato de sia elekto, sub la sola rezervo de la reguloj fiksitaj de la interesata organizaĵo, por favori kaj protekti liajn ekonomiajn kaj sociajn interesojn. La uzado de tiu rajto restrikteblas nur laŭ la leĝo kaj nur en necesaj mezuroj, en demokratia socio, en la intereso de la nacia sekureco aŭ de la publika ordo, aŭ por protekti la rajtojn kaj la liberecojn de aliuloj.

Internacia traktato pri ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj

- b) La rajton kiun havas la sindikatoj formi naciajn federaciojn aŭ konfederaciojn kaj la rajton kiun havas tiuj formi internaciajn sindikatajn organizaĵojn kaj aliĝi al ili.
 - c) La rajton kiun havas la sindikatoj libere plenumi sian aktivecon, sen aliaj limoj ol tiuj entenataj en la leĝo kaj kiuj konsistigas necesajn disponojn, en demokratia socio, en la intereso de la nacia sekureco aŭ de la publika ordo, aŭ por protekti la rajtojn kaj liberecojn de aliuloj.
 - ĉ) La rajton je striko, uzeblan konforme al la leĝoj de ĉiu lando.
2. Tiu ĉi artikolo ne malhelpas submeti al leĝaj restriktaj la uzadon de tiuj ĉi rajtoj per la membroj de la armitaj fortoj, de la polico aŭ de la publika servo.
 3. Neniu dispozicio de tiu ĉi artikolo permesas al la membroŝtatoj de la Konvencio de 1948 de la Internacia Organizaĵo de Laboro koncerne la sindikatan liberecon kaj la protekton de la sindikata rajto fari leĝajn disponojn kiuj lezas – aŭ apliki la leĝon tiel ke ĝi lezas – la garantiojn esprimitajn en la menciita konvencio.

Artikolo 9

La traktatoŝtatoj agnoskas la rajton de ĉiu homo je socia sekureco, inkluzive de la sociaj asekuroj.

Artikolo 10

La traktatoŝtatoj agnoskas ke:

1. Kiom eble plej larĝaj protekto kaj helpo donendas al la familio, kiu estas la natura kaj fundamenta elemento de la socio, aparte por ĝia formado kaj tiom longe ki-

Tria parto

om ĝi havas la respondecon pri vivtenado kaj edukado de infanoj. Geedziĝo devas esti libere interkonsentita de la estontaj geedzoj.

2. Speciala protekto donendas al la patrinoj dum periodo de konvena tempo antaŭ kaj post la nasko de la infanoj. La salajrataj patrinoj devas ĝui, dum tiu sama periodo, pagatan feriadon aŭ feriadon akompanatan de adekvataj prestaĵoj de la socia asekuro.
3. Specialaj disponoj de protekto kaj de helpo estas farendaj favore al ĉiuj infanoj kaj adoleskantoj, sen ajna diskriminacio pro kialoj de familia deveno aŭ aliaj. La infanoj kaj adoleskantoj estas protektendaj kontraŭ ekonomia kaj socia ekspluatado. La faro dungi ilin por laboroj kiuj povas damaĝi ilian moralon aŭ ilian sanon, endanĝerigi ilian vivon aŭ malutili al ilia normala evoluo estas leĝe punenda. La ŝtatoj devas ankaŭ fiksi aĝajn limojn sub kiuj salajrata dungo de infanlaboro estos malpermesata kaj leĝe punenda.

Artikolo 11

1. La traktatoŝtatoj agnoskas la rajton de ĉiu homo je vivnivelo sufiĉa por li mem kaj lia familio, inkluzive de sufiĉaj nutraĵo, vestaĵo kaj loĝado, kaj je konstanta plibonigo de liaj ekzistokondiĉoj. La traktatoŝtatoj faros taŭgajn disponojn por certigi la realigon de tiu rajto kaj ili agnoskas tiucele la esencan gravecon de libere interkonsentita internacia kunlaborado.
2. La traktatoŝtatoj, agnoskante la fundamentan rajton kiun havas ĉiu homo esti ŝirmata kontraŭ malsato, adoptos, individue aŭ per internacia kunlaborado, la necesajn disponojn, inkluzive de la konkretaj programoj:
 - a) Por plibonigi la metodojn de produktado, de konservado kaj de distribuado de la nutraĵoj per plena uzado de

Internacia traktato pri ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj

la teĥnikaj kaj sciencaj konoj, per disvastigo de principoj de edukado pri nutraĵo kaj per disvolvado aŭ reformado de kampkulturaj reĝimoj, en maniero taŭga por certigi kiom eble plej bone la valorigon kaj uzadon de la naturresursoj;

- b) Por certigi justan dispartigon de la mondaj nutraĵ-resursoj laŭ la bezonoj, konsidere al la problemoj kiuj aperas same al la importlandoj de nutraĵoj kiel al la eksportlandoj.

Artikolo 12

1. La traktatoŝtatoj agnoskas la rajton kiun havas ĉiu homo ĝui la plej bonan korpan kaj mensan sanstaton kiun li kapablas atingi.
2. La disponoj kiujn la traktatoŝtatoj faros por certigi la plenan uzadon de tiu rajto devas enteni la necesajn disponojn por certigi:
 - a) Malpliigo de mortnaskiteco kaj de infanmortiĝo, kaj sanan evoluon de la infano;
 - b) Plibonigon de ĉiuj aspektoj de higieno de la medio kaj de la industria higieno;
 - c) Profilakson kaj la traktadon de la epidemiaj, endemiaj, profesiaj kaj aliaj malsanoj, kaj luktadon kontraŭ tiuj malsanoj;
- ĉ) Kreadon de taŭgaj kondiĉoj por certigi al ĉiuj kuracajn servojn kaj medicinan helpon en kazo de malsano.

Artikolo 13

1. La traktatoŝtatoj agnoskas la rajton de ĉiu homo je edukado. Ili interkonsentas ke la edukado devas celi al plena evoluo de la homa personeco kaj de la sento

Tria parto

pri lia digno kaj fortigi la respekton al la homrajtoj kaj al la fundamentaj liberecoj. Ili interkonsentas krome ke la edukado devas kapabligi ĉiun personon ludi utilan rolon en libera socio, favori la komprenemon, la toleremon kaj la amikecon inter ĉiuj nacioj kaj ĉiuj rasaj, etnaj aŭ religiaj grupoj kaj kuraĝigi la disvolvadon de la agadoj de la Unuiĝintaj Nacioj por konservado de la paco.

2. La traktatoŝtatoj agnoskas ke, por certigi la plenan uzadon de tiu rajto:
 - a) La baza instruado devas esti deviga kaj senpage alirebla por ĉiuj;
 - b) La meza instruado, en diversaj formoj, inkluzive de la teĥnika kaj profesia meza instruado, devas esti ĝeneraligita kaj alirebligita por ĉiuj per ĉiuj taŭgaj rimedoj kaj aparte per iom-post-ioma starigo de ĝia senpageco;
 - c) La supera instruado estas alirebligenda por ĉiuj en plena egaleco, laŭ la kapableco de ĉiu, per ĉiuj taŭgaj rimedoj kaj aparte per iom-post-ioma starigo de ĝia senpageco;
 - ĉ) [*alilingve: d*] La baza edukado devas esti kuraĝigata aŭ intensigata, kiom eble plej, por la homoj kiuj ne ricevis bazan instruadon aŭ kiuj ne ricevis ĝin ĝisfine;
 - d) [*alilingve: e*] Necesas aktive daŭrigi la disvolvadon de ĉiunivela lerneja sistemo, starigi taŭgan sistemon de stipendioj kaj kontinue plibonigi la materiajn kondiĉojn de la instruistaro.
3. La traktatoŝtatoj devigas sin respekti la liberecon de la gepatroj kaj, okaze, de la laŭleĝaj zorgantoj, elekti por siaj infanoj aliajn establojn ol tiuj de la publikaj potencoj, sed konformajn al la minimumaj normoj kiuj

Internacia traktato pri ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj

povas esti preskribitaj aŭ aprobitaj de la ŝtato pri edukado, kaj certigi la religian kaj moralan edukadon de siaj infanoj, konforme al siaj propraj konvinkoj.

4. Neniu dispozicio de tiu ĉi artikolo interpreteblas kiel lezanta la liberecon de la individuoj kaj de la moralaj personoj krei kaj gvidi instruajn establojn, sub rezervo ke la principoj esprimitaj en la paragrafo 1 de tiu ĉi artikolo estu observataj kaj ke la edukado donata en tiuj establoj estu konforma al la minimumaj normoj kiuj povas esti preskribitaj de la ŝtato.

Artikolo 14

Ĉiu traktatoŝtato kiu, en la momento de sia aliĝo, ankoraŭ ne povis certigi, en sia metropolo aŭ en la teritorioj metitaj sub ĝia jursistemo, la devigecon kaj senpagecon de la baza instruado, devigas sin starigi kaj adopti, ene de du jaroj, detalan planon de la necesaj disponoj por realigi iom post iom, en konvena nombro da jaroj fiksita de tiu plano, la plenan aplikadon de la principo de baza instruado deviga kaj senpaga por ĉiuj.

Artikolo 15

1. La traktatoŝtatoj agnoskas al ĉiu la rajton:
 - a) Partopreni en la kultura vivo;
 - b) Profiti la sciencan progreson kaj ties aplikaĵojn;
 - c) Profiti la protektadon de la moralaj kaj materialaj interesoj devenaj de ĉia scienca, literatura aŭ arta produktado de kiu li estas aŭtoro.
2. La disponoj kiujn la traktatoŝtatoj faros por certigi la plenan uzadon de tiu rajto devos enteni tiujn kiuj estas necesaj por certigi la flegadon, disvolvadon kaj disvas-

Tria parto

tigon de la scienco kaj de la kulturo.

3. La traktatoŝtatoj devigas sin respekti la liberecon nepran por la scienca esplorado kaj por la kreaĵ agadoj.
4. La traktatoŝtatoj agnoskas la bonaĵojn kiuj devas rezulti el la subteno kaj disvolvado de la internaciaj kunlaborado kaj kontaktoj en la kampo de la scienco kaj de la kulturo.

Kvara parto

Artikolo 16

1. La traktatoŝtatoj devigas sin prezenti, konforme al la dispozicioj de tiu ĉi parto de la traktato, raportojn pri la disponoj kiujn ili estos adoptitaj kaj pri la farita progreso por certigi la respekton de la rajtoj agnoskitaj en la traktato.
2.
 - a) Ĉiuj raportoj estas adresotaj al la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj, kiuj transdonas kopion de ili al la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro, por ekzamenado, konforme al la dispozicioj de tiu ĉi traktato;
 - b) La Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj transdonas ankaŭ al la specialaj institucioj kopion de la raportoj, aŭ de ĉiuj koncernaj partoj de la raportoj, senditaj de la traktatoŝtatoj kiuj estas ankaŭ membroj de tiuj specialaj institucioj, en la mezuro laŭ kiu tiuj raportoj, aŭ partoj de raportoj, rilatas al demandoj pri kiuj kompetentas tiuj institucioj laŭ siaj respektivaj konsistigaj aktoj.

Internacia traktato pri ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj

Artikolo 17

1. La traktatoŝtatoj prezentas siajn raportojn laŭetape, laŭ programo kiun starigos la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro ene de jaro ekde la ekvalido-dato de tiu ĉi traktato, post konsulti la membroŝtatojn kaj la interesitajn specialajn instituciojn.
2. La raportoj povas konigi la faktorojn kaj malfacilaĵojn kiuj malhelpas tiujn ŝtatojn plene plenumi la devojn es-primatajn en tiu ĉi traktato.
3. En la kazo en kiu tiutemaj informoj estas jam adresitaj al la Unuiĝintaj Nacioj aŭ al speciala institucio fare de traktatoŝtato, ne necesos reprodukti tiujn informojn kaj preciza referenco al tiuj informoj sufiĉos.

Artikolo 18

Kaŭze de la respondecoj kiuj estas al ĝi donitaj de la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj en la kampo de la homrajtoj kaj de la fundamentaj liberecoj, la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro povos interkonsenti aranĝojn kun la specialaj institucioj, por ke ili prezentu raportojn pri la faritaj progresoj en la observado de la dispozicioj de tiu ĉi traktato kiuj troviĝas en la kadro de iliaj aktivecoj. Tiuj raportoj povas enhavi donitaĵojn pri la decidoj kaj rekomendoj adoptitaj de la kompetentaj organoj de la specialaj institucioj pri tiu realigo.

Artikolo 19

La Ekonomia kaj Socia Konsilantaro povas sendi al la Komisiono pri Homrajtoj por esplorado kaj ĝeneralspeca rekomendado aŭ por informo, laŭokaze, la raportojn koncerne homrajtojn kiujn komunikas la ŝtatoj konforme al la artikolo

Kvara parto

loj 16 kaj 17 kaj la raportojn koncerne homrajtojn kiujn komunikas la specialaj institucioj konforme al la artikolo 18.

Artikolo 20

La traktatoŝtatoj kaj la interesitaj specialaj institucioj povas prezenti al la Ekonomia kaj Sociala Konsilantaro observojn pri ĉia ĝeneralspeca rekomendo farita laŭ la artikolo 19 aŭ pri ĉia mencio de ĝeneralspeca rekomendo entenata en raporto de la Komisiono pri Homrajtoj aŭ en ĉia dokumento menciita en tiu raporto.

Artikolo 21

La Ekonomia kaj Socia Konsilantaro povas prezenti de tempo al tempo al la Generala Asembleo raportojn entenantajn ĝeneralspecajn rekomendojn kaj resumon de la informoj ricevitaj de la traktatoŝtatoj kaj de la specialaj institucioj pri la faritaj disponoj kaj la plenumitaj progresoj por certigi la ĝeneralan respekton de la rajtoj agnoskitaj en tiu ĉi traktato.

Artikolo 22

La Ekonomia kaj Socia Konsilantaro povas atentigi la aliajn organojn de la Unuiĝintaj Nacioj, iliajn subsidiarajn organojn kaj interesitajn specialajn instituciojn, kiuj okupiĝas pri liverado de teĥnika helpo, pri ĉia demando kiun starigas la raportoj menciitaj en tiu ĉi traktato kaj kiu povas helpi tiujn organismojn esprimi sin, ĉiu en sia propra kompetento-kampo, pri la taŭgeco de internaciaj disponoj por efektive kaj iom-post-iome realigi tiun ĉi traktaton.

Internacia traktato pri ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj

Artikolo 23

La traktatoŝtatoj interkonsentas ke la disponoj sur internacia nivelo destinitaj certigi la realigon de la rajtoj agnoskitaj en tiu ĉi traktato entenas aparte la starigon de konvencioj, la adoptadon de rekomendoj, la liveradon de teĥnika helpo kaj la organizadon, lige kun la interesitaj registaroj, de regionaj kunvenoj kaj de teĥnikaj kunvenoj cele al konsultado kaj studadoj.

Artikolo 24

Neniu dispozicio de tiu ĉi traktato interpreteblas kiel lezanta la dispoziciojn de la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj kaj de la konstitucioj de la specialaj institucioj kiuj difinas la respektivajn respondecojn de la diversaj organoj de la Unuiĝintaj Nacioj kaj de la specialaj institucioj koncerne la demandojn traktatajn en tiu ĉi traktato.

Artikolo 25

Neniu dispozicio de tiu ĉi traktato interpreteblas kiel lezanta la esence propran rajton de ĉiuj popoloj profiti kaj plene kaj libere uzi siajn riĉaĵojn kaj naturresursojn.

Kvina parto

Artikolo 26

1. Tiu ĉi traktato estas malfermita al subskribo por ĉiu membroŝtato de la Unuiĝintaj Nacioj aŭ membro de ajna ties specialaj institucioj, por ĉiu membroŝtato de la statuto de la Internacia Justec-Kortumo, kaj por ĉiu ŝtato invitita de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj

Kvina parto

Nacioj aliĝi al tiu ĉi traktato.

2. Tiu ĉi traktato estas submetita al ratifo kaj la ratifodokumentoj estas deponotaj ĉe la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj.
3. Tiu ĉi traktato estos malfermita al aliĝo de ĉiu ŝtato celita en la paragrafo 1 de tiu ĉi artikolo.
4. La aliĝo okazos per depono de aliĝ-dokumento ĉe la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj.
5. La Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj informas ĉiujn ŝtatojn kiuj subskribis tiun ĉi traktaton aŭ kiuj aliĝis pri la depono de ĉiu ratifo-dokumento aŭ aliĝo.

Artikolo 27

1. Tiu ĉi traktato ekvalidos tri monatojn post la dato de la depono ĉe la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj de la tridek-kvina ratifo-dokumento aŭ aliĝo.
2. Por ĉiu ŝtato kiu ratifos tiun ĉi traktaton aŭ kiu aliĝos al ĝi post depono de la tridek-kvina ratifodokumento aŭ aliĝo, tiu ĉi traktato ekvalidos tri monatojn post la dato de depono fare de tiu ŝtato de ĝia ratifo- aŭ aliĝo-dokumento.

Artikolo 28

La dispozicioj de tiu ĉi traktato aplikiĝas, sen limo nek ajna escepto, al ĉiuj konsistigaj unuoj de la federaciaj ŝtatoj.

Artikolo 29

1. Ĉiu traktatoŝtato povas proponi amendon kaj deponi ties tekston ĉe la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj

Internacia traktato pri ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj

Nacioj. La Ĝenerala Sekretario transdonas tiam ĉiujn amendo-projektojn al la traktatoŝtato demandante ilin ĉu ili deziras kunvokon de konferenco de traktatoŝtatoj por ekzameni tiujn projektojn kaj submeti ilin al voĉdonado. Se almenaŭ triono de la ŝtatoj deklaras sin favoraj al tiu kunvoko, la Ĝenerala Sekretario kunvokas la konferencon sub la alta protekto de la Unuiĝintaj Nacioj. Ĉia amendo adoptita de la plimulto de la ĉeestaj kaj voĉdonantaj ŝtatoj estas submetota por aprobo al la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj.

2. Tiuj amendoj ekvalidas kiam ili estas aprobitaj de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj kaj akceptitaj, konforme al siaj respektivaj konstituciaj reguloj, de du triona plimulto de la traktatoŝtatoj.
3. Kiam tiuj amendoj ekvalidas, ili estas devigaj por la traktatoŝtatoj kiuj akceptis ilin, la aliaj traktatoŝtatoj restas ligitaj al la dispozicioj de tiu ĉi traktato kaj al ĉiu antaŭa amendo kiun ili akceptis.

Artikolo 30

Sendepende de la sciigoj entenataj en la paragrafo 5 de la artikolo 26, la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj informos ĉiujn ŝtatojn koncernatajn en la paragrafo 1 de tiu artikolo:

- a) Pri la subskriboj faritaj sub tiu ĉi traktato kaj pri la ratifoj kaj aliĝo-dokumentoj deponitaj konforme al la artikolo 26;
- b) Pri la dato en kiu tiu ĉi traktato ekvalidos konforme al la artikolo 27 kaj pri la dato en kiu ekvalidos la amendoj menciitaj en la artikolo 29.

Kvina parto

Artikolo 31

1. Tiu ĉi traktato, kies angla, ĉina, franca, hispana kaj rusa tekstoj estas same aŭtentaj, estas deponota en la arĥivoj de la Unuiĝintaj Nacioj.
2. La Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj transdonos legitimitan kopion de tiu ĉi traktato al ĉiuj ŝtatoj koncernataj en la artikolo 26.

Noto de la tradukinto

Pri la vorto *traktato*. Iuj pensas ke devas esti *pakto*, kiel en multaj aliaj lingvoj. Tamen, la signifo de *pakto* estas nenio alia ol tiu de *traktato*, kaj tiu estas Esperanta vorto kontraste al *pakto*. -vl

Internacia Traktato pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj

Adoptita kaj malfermita al subskribo, al ratifo kaj al aliĝo de la Ĝenerala Asembleo en sia rezolucio 2200 A(XXI) de la 16-a de decembro 1966

Ekvalida: la 23-an de marto 1976, konforme al la dispozicioj de la artikolo 49

Antaŭparto

La membroŝtatoj de tiu ĉi Traktato [*en la sekvo nomataj traktatoŝtatoj*],

Konsiderante ke, konforme al la principoj eldiritaj en la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, la agnosko de la ennaskita digno de ĉiuj membroj de la homa familio kaj de iliaj egalaj kaj necedeblaj rajtoj konsistigas la fundamenton de la libereco, de la justeco kaj de la paco en la mondo,

Rekonante ke tiuj rajtoj devenas el la ennaskita digno de la homa persono,

Rekonante ke, konforme al la Universala Deklaro de la Homrajtoj, la idealo de la libera homa estulo, ĝuanta la civilajn kaj politikajn liberecojn kaj liberigita el timo kaj mize-ro, realigeblas nur se kondiĉoj estas kreitaj kiuj ebligas al

Internacia Traktato pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj

ĉiu ĝui siajn civilajn kaj politikajn rajtojn, same kiel siajn ekonomiajn, sociajn kaj kulturajn rajtojn,

Konsiderante ke la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj trudas al la ŝtatoj la devon subteni kaj respekti la rajtojn rekonatajn en tiu ĉi Traktato,

Interkonsentis pri la sekvaj artikoloj:

Unua parto

Artikolo 1

1. Ĉiuj popoloj havas la rajton disponi pri si mem. Kaŭze de tiu ĉi rajto ili determinas libere sian politikan statuson kaj certigas libere sian ekonomian, socian kaj kulturen disvolviĝon.
2. Por atingi siajn celojn, ĉiuj popoloj povas disponi libere pri siaj riĉaĵoj kaj pri siaj naturaj resursoj, kun rezervo de la devoj kiuj devenas el la internacia ekonomia kunlaborado, bazita sur la principo de reciproka intereso, kaj de la internacia juro. Neniuokaze popolo povas esti senigata de siaj propraj vivrimedoj.
3. La traktatoŝtatoj, inkluzive de tiuj kiuj havas la respondecon administri ne aŭtonomajn teritoriojn kaj teritoriojn sub kuratoreco, devas faciligi la realigon de la rajto de la popoloj disponi pri si mem, kaj respekti tiun rajton, konforme al la dispozicioj de la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj.

Dua parto

Artikolo 2

1. La traktatoŝtatoj devontigas sin respekti kaj garantii al ĉiuj individuoj, kiuj troviĝas sur ilia teritorio kaj pri kiuj ili kompetentas, la rajtojn rekonatajn en tiu ĉi Traktato, sen ajna distingo, nome de raso, de haŭtkoloro, de sekso, de lingvo, de religio, de politika opinio aŭ de ĉia alia opinio, de nacia aŭ socia deveno, de financa situacio, de naska deveno aŭ de ĉia alia situacio.
2. La traktatoŝtatoj devontigas sin fari, laŭ siaj konstituciaj proceduroj kaj la dispozicioj de tiu ĉi Traktato, la aranĝojn por adopti tiajn leĝajn aŭ aliajn disponojn taŭgajn por efektiviĝi la rajtojn rekonatajn en tiu ĉi Traktato se tiuj ankoraŭ ne validas.
3. La traktatoŝtatoj devontigas sin:
 - a) Garantii ke ĉia persono, kies rajtoj kaj liberecoj rekonataj en tiu ĉi Traktato estas malobeitaj, disponu pri utila rimedo, eĉ se la malobeo estas farita de personoj agantaj en plenumado de siaj oficialaj funkcioj;
 - b) Garantii ke la kompetenta aŭtoritato, jura, administra aŭ leĝdona, aŭ ĉia alia kompetenta aŭtoritato laŭ la leĝaro de la ŝtato, decidu pri la rajtoj de la persono kiu uzas la rimedon kaj disvolvu la eblecojn de jura rimedo;
 - c) Garantii la bonan sekvon donitan de la kompetentaj aŭtoritatoj al ĉia rimedo kiu estis rekonita kiel prava.

Internacia Traktato pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj

Artikolo 3

La traktatoŝtatoj devontigas sin certigi la egalan rajton de la viroj kaj de la virinoj ĝui ĉiujn civilajn kaj politikajn rajtojn eldiritajn en tiu ĉi Traktato.

Artikolo 4

1. Okaze ke escepta publika danĝero minacas la ekziston de la nacio kaj estas proklamita per oficiala akto, la traktatoŝtatoj povas fari, en la strikta mezuro kiun postulas la situacio, disponojn kiuj sendevigas la devojn menciitajn en tiu ĉi Traktato, sub rezervo ke tiuj disponoj ne estu malkongruaj kun la aliaj devoj kiujn trudas al ili la internacia juro kaj ke ili ne sekvigis diskriminacion nur laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio aŭ socia deveno.
2. Tiu ĉi dispono permesas nenian sendevigon de la artikoloj 6, 7, 8 (paragr. 1 kaj 2), 11, 15, 16 kaj 18.
3. La traktatoŝtatoj, kiuj uzas la rajton de sendevigo, devas, pere de la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj, sciigi tuj al la aliaj traktatoŝtatoj la dispoziciojn kiujn ili sendevigis kaj ankaŭ la motivojn kiuj kaŭzis tiun sendevigon. Nova komunikaĵo fariĝos sam-pere je la dato en kiu ili ĉesigis tiujn sendevigojn.

Artikolo 5

1. Neniu dispozicio de tiu ĉi Traktato interpreteblas kiel implicanta por ŝtato, grupo aŭ individuo ian rajton entrepreni aktivecon aŭ plenumi agon kiu celas detruon de la rajtoj kaj liberecoj rekonataj en tiu ĉi Traktato aŭ limigojn pli ampleksajn ol tiuj fiksitaj en tiu ĉi Traktato.
2. Ne permeseblas ia ajn restriktio aŭ sendevigo de la

Dua parto

fundamentaj homrajtoj rekonataj aŭ validaj en iu ajn traktatoŝtato agi agon kiu celas la detruon de rajtoj kaj liberecoj rekonataj en tiu ĉi Traktato ĉe aplikado de leĝoj, konvencioj, reglamentoj aŭ kutimoj, sub preteksto ke tiu ĉi Traktato ne agnoskas ilin aŭ agnoskas ilin malpli altgrade.

Tria parto

Artikolo 6

1. La rajto je vivo estas ennaskita de ĉiu homa persono. Tiu rajto devas esti protektata de la leĝo. Neniu povas esti arbitre senigita je la vivo.
2. En la landoj kie la mortpuno ne estas abolita, mortpuno verdikteblas nur pri la plej gravaj krimoj, konforme al la leĝaro valida en la momento en kiu la krimo estis farata kaj kiu devas ne esti en kontraŭdiro al la dispozicioj de tiu ĉi Traktato nek al la Konvencio por Antaŭmalhelpo kaj Subpremo de la Krimo de Gentekstermo. Tiu puno aplikeblas nur kaŭze de definitiva juĝo farita de kompetenta tribunalo.
3. Kiam la senigo je la vivo konsistigas la krimon de gentekstermo, estas interkonsentite ke neniam dispozicio de tiu ĉi artikolo permesas al traktatoŝtato iel ajn sendevigi ian ajn devon akceptitan kaŭze de la dispozicioj de la Konvencio por Prevento kaj Subpremo de la Krimo de Gentekstermo.
4. Ĉiu mortkondamnito havas la rajton peti indulgon aŭ ŝanĝon de la puno. Amnestio, indulgo aŭ ŝanĝo de la mortpuno konsenteblas en ĉiuj okazoj.
5. Mortverdiko ne verdikteblas pro krimoj faritaj de per-

Internacia Traktato pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj

sonoj malpli ol 18-jaraĝaj kaj ne plenumebblas kontraŭ gravedulinoj.

6. Neniu dispozicio de tiu ĉi artikolo alvokeblas por prokrasti aŭ malhelpi la abolon de la mortpuno de traktatoŝtato.

Artikolo 7

Neniu estu submetata al torturo nek al kruelaj, malhumanaj aŭ sendignigaj traktadoj. Aparte estas malpermesate submeti personon sen lia libera konsento al medicina aŭ scienca eksperimento.

Artikolo 8

1. Neniu estu tenata en sklaveco; la sklaveco kaj ĉia sklavkomerco estas malpermesataj.
2. Neniu estu tenata en servuteco.
3.
 - a) Al neniu estu trudata plenumi trudan aŭ devigan laboron;
 - b) La alineo a de tiu ĉi paragrafo ne interpreteblas kiel malpermesanta, en la landoj kie certaj krimoj puneblas per malliberigo akompanata de trudlaboroj, la plenumadon de puno de trudlaboroj verdiktitaj de kompetenta tribunalo;
 - c) Ne estas konsiderata kiel „truda aŭ deviga laboro” en la senco de tiu ĉi paragrafo:
- i) Ĉia laboro aŭ servo, ne celata de la alineo b, normale postulata de individuo kiu estas malliberigita pro decido de regula jursistemo aŭ kiu, estinta la objekto de tia decido, estas liberigita kondiĉe;

Tria parto

- ii) Ĉia servo de arma speco kaj, en la landoj kie la rifuzo de militservo estas permesata, ĉiu ŝtata servo postulata de la militserv-rifuzantoj kaŭze de la leĝo;
- iii) Ĉia servo postulata en la kazo de eksterhoma forto aŭ de katastrofoj kiuj minacas la vivon aŭ la bonfarton de la komunumo;
- iv) Ĉia laboro aŭ ĉia servo kiu estas parto de la normalaj civitanaj devoj.

Artikolo 9

1. Ĉiu individuo havas la rajton je libereco kaj je sekureco de sia persono. Neniu povas esti celata de arbitra aresto aŭ malliberigo. Neniu senigebblas je sia libereco, escepte pro motivoj kaj konforme al la laŭleĝa proceduro.
2. Ĉiu arestita individuo estu informata, en la momento de sia aresto, pri la kialoj de tiu aresto kaj ricevu oficialan sciigon, kiom eble plej frue, pri ĉia akuzo kontraŭ li.
3. Ĉiu individuo arestita aŭ malliberigita pro akuzo de punjura leĝorompo estu kondukita kiom eble plej frue antaŭ juĝisto aŭ alia aŭtoritato laŭleĝe rajtigita plenumi jurajn funkciojn, kaj estu juĝata en akceptebla tempo aŭ liberigata. La tenado en mallibereco de personoj kiuj atendas esti juĝataj devas ne esti la regulo, sed la liberigo povas esti submetita al garantioj kiuj certigas la aperon de la koncernato ĉe la tribunala aŭdienco, ĉe ĉiuj aliaj okazajoj de la proceduro kaj, laŭokaze, ĉe la plenumado de la juĝo.
4. Kiu ajn senigita je sia libereco per aresto aŭ malliberigo havas la rajton turni sin al tribunalo por ke tiu decido senprokraste pri la laŭleĝeco de lia malliberigo kaj

Internacia Traktato pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj

ordonu lian liberigon se la malliberigo estas kontraŭleĝa.

5. Ĉiu individuo viktima je kontraŭleĝa aresto aŭ malliberigo havas la rajton je kompenso.

Artikolo 10

1. Ĉiu persono senigita je sia libereco estas traktata humane kaj kun la respekto de la enaskita digno de la homa persono.
2.
 - a) La juĝotoj estas, krom en esceptaj okazoj, disigitaj de la kondamnitaj kaj estas submetataj al diversa reĝimo, taŭga por ilia kondiĉo de nekondamnitaj,
 - b) La junaj juĝotoj estas disigitaj disde la plenkreskuloj kaj ilia kazo estu decidita kiom eble plej rapide;
3. La punreĝimo enhavas traktadon de la kondamnitaj kies esenca celo estas ilia plibonigo kaj ilia socia reintegrigo. La junaj deliktuloj estas disigitaj disde la plenkreskuloj kaj submetataj al reĝimo taŭga por ilia aĝo kaj ilia laŭleĝa statuso.

Artikolo 11

Neniu povas esti enprizonigita pro la sola kialo ke li ne kapablas plenumi kontrakto-devon.

Artikolo 12

1. Kiu ajn troviĝas laŭleĝe sur la teritorio de ŝtato havas la rajton tie moviĝi libere kaj tie elekti libere sian loĝlokon.
2. Ĉiu persono estas libera forlasi ian ajn landon,

Tria parto

inkluzive la sian.

3. La rajtoj supre menciitaj restrikteblas nur se tiaj restriktaj estas leĝe permesitaj, necesaj por protekti la nacian sekurecon, la publikan ordon, la publikajn sannon aŭ moralon, aŭ la rajtojn kaj liberecojn de aliuloj, kaj kongruaj kun la aliaj rajtoj agnoskataj de tiu ĉi Traktato.
4. Neniu povas esti arbitre senigita je la rajto eniri en sian propran landon.

Artikolo 13

Eksterlandano kiu troviĝas laŭleĝe sur la teritorio de traktatoŝtato elpeleblas nur per plenumado de decido farita konforme al la leĝo kaj, escepte se nepraj kialoj de nacia sekureco kontraŭas tion, li devas havi la eblecon defendi siajn argumentojn kontraŭ lia elpelo kaj igi la kompetentan instituciojn, aŭ unu aŭ plurajn personojn speciale nomumitaj de tiu instanco, ekzameni lian kazon kaj reprezentigi sin por tio.

Artikolo 14

1. Ĉiuj estas egalaj antaŭ la tribunaloj kaj la justeckortumoj. Ĉiu persono havas la rajton ke lia kaŭzo estu aŭskultata juste kaj publike de kompetenta, sendependa kaj senpartia tribunalo, starigita de la leĝo, kiu decidu aŭ pri la pravenco de ĉia akuzo pri punafero kontraŭ li, aŭ pri la kontestoj surbaze de liaj rajtoj kaj devoj de civila karaktero. La nepublikeco decideblas por la tuteco aŭ por parto de la proceso ĉu en la intereso de la bonmoreco, de la publika ordo aŭ de la nacia sekureco en demokratia socio, ĉu kiam la intereso de la privata vivo de la koncernatoj postulas tion, ĉu ankaŭ en la mezuro en kiu la tribunalo taksas tion absolute necesa

Internacia Traktato pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj

kiam pro apartaj cirkonstancoj de la afero la publikeco malutilus al la interesoj de la justeco, tamen, ĉia juĝo en punaj aŭ civilaj aferoj estu publika, escepte se la intereso de neplenkreskuloj postulas ke estu alie aŭ se la proceso temas pri geedzaj malkonsentoj aŭ pri la kuratoreco de infanoj.

2. Ĉia persono akuzita pri punleĝa delikto estas supozata senkulpa ĝis kiam lia kulpeco estas laŭleĝe deklarita.
3. Ĉia persono akuzita pri punleĝa delikto havas la rajton, en plena egaleco, almenaŭ je la sekvaj garantioj:
 - a) Esti informita, en kiom eble plej mallonga tempolimo, en lingvo kiun li komprenas kaj detale, pri la eco kaj la motivoj de la akuzo kontraŭ li;
 - b) Disponi pri la necesaj tempo kaj facilajoj por prepari sian defendon kaj komuniki kun la konsilo de lia elekto;
 - c) Esti juĝata sen ekscesa prokrasto;
- ĉ) [*alilingve: d*] Ĉeesti en la proceso kaj defendi sin mem aŭ havi la helpon de defendanto de sia elekto; se li ne havas defendanton, esti informata pri sia rajto havi iun, kaj, ĉiufoje kiam la intereso de la justeco postulas tion, esti senpete provizita per defendisto, senkoste, se li ne havas la rimedojn pagi lian laboron;
- d) [*alilingve: e*] Pridemandi aŭ pridemandigi la atestantojn de la akuzo kaj atingi la aperon kaj pridemandadon de la atestantoj de la defendo en la samaj kondiĉoj kiel la atestantoj de la akuzo;
- e) [*alilingve: f*] Esti senpage helpata de buŝtradukisto se li ne komprenas aŭ ne parolas la lingvon uzatan en la tribunala aŭdienco;
- f) [*alilingve: g*] Ne esti devigata atesti kontraŭ sin mem

Tria parto

aŭ konfesi esti kulpa.

4. La proceduro aplikenda al junuloj kiuj ankoraŭ ne estas plenkreskaj laŭ la punleĝo konsideru ilian aĝon kaj la gravecon kiun prezentas ilia reedukado.
5. Ĉia persono deklarita kulpa pri leĝrompo havas la rajton ekzamenigi al supera instanco la deklaron de kulpo kaj la kondamnon, konforme al la leĝo.
6. Kiam definitiva punkondamno estas poste nuligita aŭ kiam indulgo estas konsentita ĉar nova aŭ nove rivelita fakto pravas ke okazis jursistema eraro, la persono kiu suferis punon pro tiu kondamno estu monkompensita, konforme al la leĝo, escepte se estas pruvite ke la nivelo en la utila tempo de la nekonata fakto estas tute aŭ parte imputebla al li.
7. Neniu povas esti persekutata aŭ punata pro leĝdelikto pri kiu li estas jam senkulpigita aŭ kondamnita de definitiva juĝo konforme al la leĝo kaj al la punproceduro de ĉiu lando.

Artikolo 15

1. Neniu estu kondamnita pro agoj aŭ preterlasoj kiuj ne konsistigas deliktan agon laŭ la nacia aŭ internacia juro en la momento en kiu ili estis farataj. Same, ne estu al li donita puno pli forta ol tiu kiu aplikeblis en la momento en kiu la delikto estis farata. Se, post tiu delikto, la leĝo preskribas pli malpli fortan punon, la deliktulo devas profiti tion.
2. Nenio en tiu ĉi artikolo kontraŭas juĝon aŭ kondamnon de ĉia individuo pro agoj aŭ preterlasoj kiuj, en la momento en kiu ili estis farataj, estis konsiderataj krimaj, laŭ la ĝeneralaj juraj principoj rekonataj de la tuta naciaro.

Internacia Traktato pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj

Artikolo 16

Ĉiu havas la rajton esti ĉie rekonata en sia jura agpovo.

Artikolo 17

1. Neniu estu celo de arbitraj aŭ kontraŭleĝaj enmiksiĝoj en lian privatan vivon, lian familion, lian hejmon aŭ lian korespondadon, nek de kontraŭleĝaj atencoj kontraŭ lia honoro kaj lia reputacio.
2. Ĉiu havas la rajton je protekto de la leĝo kontraŭ tiaj enmiksiĝoj aŭ tiaj atencoj.

Artikolo 18

1. Ĉiu havas la rajton je libereco de pensado, de konscio kaj de religio; tiu rajto implicas la liberecon havi aŭ adopti religion aŭ konvinkon de sia elekto, kaj la liberecon manifesti sian religion aŭ sian konvinkon, individue aŭ komune, tiel publike kiel private, per kulto kaj plenumado de ritoj, praktikoj kaj instruado.
2. Neniu suferu trudon kiu povas atenci lian liberecon havi aŭ adopti religion aŭ konvinkon de sia elekto.
3. La libereco manifesti sian religion aŭ siajn konvinkojn submetebblas nur al leĝaj restriktaj kaj kiuj necesas por la protekto de la publikaj sekureco, ordo kaj sano, aŭ de la moralo aŭ de aliiies liberecoj kaj fundamentaj rajtoj.
4. La traktatoŝtatoj devontigas sin respekti la liberecon de la gepatroj kaj, laŭokaze, de la laŭleĝaj kuratoroj, certigi la religian kaj moralan edukadon de siaj infanoj konforme al siaj propraj konvinkoj.

Tria parto

Artikolo 19

1. Neniu povas esti maltrankviligata pro siaj opinioj.
2. Ĉiu havas la rajton je esprimlibereco; tiu rajto entenas la liberecon serĉi, ricevi kaj disvastigi ĉiajn informojn kaj ideojn, senkonsidere limojn, en parola, skriba, presita aŭ arta formo aŭ per ia ajn alia rimedo de sia elekto.
3. La uzado de la liberecoj menciitaj en la paragrafo 2 de tiu ĉi artikolo entenas specialajn devojn kaj specialajn respondecojn. Ĝi submetebblas do al certaj restriktioj kiuj devas tamen esti eksplicite fiksitaj de la leĝo kaj kiuj estas necesaj:
 - a) Por la respekto de aliies rajtoj aŭ reputacio;
 - b) Por la protekto de la nacia sekureco, publika ordo, publikaj sano aŭ moralo.

Artikolo 20

1. Ĉia propagando favore al milito estas malpermesata per leĝo.
2. Ĉia alvoko al nacia, rasa aŭ religia malamo kiu konsistigas instigon al diskriminacio, al malamikeco aŭ al perforto estas malpermesata de la leĝo.

Artikolo 21

La rajto je paca kunveno estas rekonita. La uzado de tiu rajto submetebblas nur al restriktioj esprimitaj en la leĝo kaj kiuj estas necesaj en demokratia socio en la intereso de nacia sekureco, de publika sekureco, de publika ordo aŭ por protekti la publikajn sanon aŭ moralon, aŭ aliies rajtojn kaj liberecojn.

Artikolo 22

Internacia Traktato pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj

1. Ĉiu havas la rajton libere asociiĝi kun aliaj, inkluzive la rajton starigi sindikatojn kaj aliĝi al ili por protekti siajn interesojn.
2. La uzado de tiu rajto submetebblas nur al restriktaj leĝe fiksitaj kaj kiuj necesas en demokratia socio, en la intereso de nacia sekureco, de publika sano, de publika ordo, aŭ por protekti la publikajn sanon aŭ moralon aŭ alies rajtojn kaj liberecojn. Tiu ĉi artikolo ne malhelpas submeti al laŭleĝaj restriktaj leĝoj la uzadon de tiu ĉi rajto por la membroj de la armitaj fortoj kaj de la polico.
3. Neniu dispozicio de tiu ĉi artikolo ebligas al la ŝtatoj aliĝintaj al la Konvencio de 1948 de la Internacia Organizaĵo pri Laboro koncerne la sindikatan liberecon kaj la protekton de la sindikata rajto fari leĝajn dispoziciojn kiuj atencas - aŭ apliki la leĝon en maniero kiu atencas - la garantiojn deklaritajn en tiu konvencio.

Artikolo 23

1. La familio estas la natura kaj fundamenta elemento de la socio kaj havas rajton je protekto de la socio kaj de la ŝtato.
2. La rajto geedziĝi kaj fondi familion estas agnoskita al la viro kaj al la virino ekde la seksmatura aĝo.
3. Neniu geedziĝo fareblas sen la libera kaj plena konsento de la estontaj geedzoj.
4. La traktatoŝtatoj faros taŭgajn disponojn por certigi la egalecon de la rajtoj kaj de la respondecoj de la geedzoj rilate geedziĝon, dum la geedzeco kaj dum eksedziĝo. Okaze de eksedziĝo, disponoj estas farotaj por certigi al la infanoj la necesan protekton.

Tria parto

Artikolo 24

1. Ĉiu infano, sen ajna diskriminacio bazita sur raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, nacia aŭ socia deveno, havaĵo aŭ naskiĝo, havas rajton, flanke de sia familio, de la socio kaj de la traktatoŝtato, pri disponoj de protekto kiujn postulas lia kondiĉo de neplenaĝulo.
2. Ĉiu infano devas esti registrita tuj post sia naskiĝo kaj havi nomon.
3. Ĉiu infano havas la rajton akiri ŝtatanecon.

Artikolo 25

Ĉiu civitano havas la rajton kaj la eblecon, sen ajna el la diskriminacioj celataj en la artikolo 2 kaj sen malraciaj restriktaj:

- a) Partopreni en la gvidado de la publikaj aferoj, ĉu rekte, ĉu pere de libere elektitaj reprezentantoj;
- b) Voĉdoni kaj esti elektita, dum periodaj, honestaj elektoj je universala kaj egaleca voĉdonado je sekreta baloto, kiu certigas la liberan esprimiĝon de la volo de la elektantoj;
- c) Aliri, en ĝeneralaj kondiĉoj de egaleco, al la publikaj funkcioj de sia lando.

Artikolo 26

Ĉiuj homoj estas egalaj antaŭ la leĝo kaj havas rajton sen diskriminacio je egala protekto de la leĝo. Tiurilate, la leĝo devas malpermesi ĉian diskriminacion kaj garantii al ĉiuj egalan kaj efikan protekton kontraŭ ĉia diskriminacio, nome de raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika opinio kaj ĉia alia opinio, nacia aŭ socia deveno, havaĵo, naskiĝo aŭ ĉia alia situacio.

Internacia Traktato pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj

Artikolo 27

En la traktatoŝtatoj kie ekzistas etnaj, religiaj aŭ lingvaj malplimultoj, la homoj apartenantaj al tiuj malplimultoj ne povas esti senigitaj je la rajto havi, komune kun la aliaj membroj de sia grupo, sian propran kulturen vivon, konfesi kaj praktiki sian propran religion aŭ uzi sian propran lingvon.

Kvara parto

Artikolo 28

1. Stariĝis komitato pri homrajtoj (en la sekvo en tiu ĉi traktato nomata Komitato). Tiu komitato konsistas el dek-ok membroj kaj havas la jenajn difinitajn funkciojn.
2. La Komitato konsistas el civitanoj de la traktatoŝtatoj, kiuj devas esti personoj de alta moralo kaj posedi kompetenton rekonatan en la kampo de la homrajtoj. Ĉe tio konsiderindas la oportuneco ke partoprenu en la laboroj de la Komitato kelkaj personoj kun jura sperto.
3. La membroj de la Komitato estas elektataj individue kaj agas tiaj.

Artikolo 29

1. La membroj de la Komitato estas elektataj en sekreta voĉdonado el listo de personoj kiuj plenumas la kondiĉojn menciitajn en la artikolo 28 kaj prezentitaj por tio al la traktatoŝtatoj.
2. Ĉiu traktatoŝtato povas prezenti du personojn maxi-

Kvara parto

mume. Tiuj personoj devas esti ŝtatanoj de la ŝtato kiu prezentas ilin.

3. La sama persono povas esti denove prezentata.

Artikolo 30

1. La unua elekto okazos plej malfrue ses monatojn post la ekvalido de tiu ĉi Traktato.
2. Kvar monatojn minimume antaŭ la dato de ĉia elekto en la Komitato, alia ol elekto por provizi vakan postenon deklaritan konforme al la artikolo 34, la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj invitas skribe la traktatoŝtatojn nomi, ene de tri monatoj, la kandidatojn kiujn ili proponas kiel membrojn de la Komitato.
3. La Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj starigas alfabetan liston de ĉiuj personoj tiel prezentitaj menciante la traktatoŝtatojn kiuj prezentis ilin kaj transdonas ĝin al la traktatoŝtatoj plej malfrue monaton antaŭ la dato de ĉiu elekto.
4. La membroj de la Komitato estas elektataj dum kunveno de la traktatoŝtatoj kunvokitaj de la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj en la sidejo de la Unuiĝintaj Nacioj. En tiu kunveno, kie la kvorumo estas du triono de la traktatoŝtatoj, estas elektitaj membroj de la Komitato tiuj kandidatoj kiuj ricevis la plej grandan nombron da voĉoj kaj la absolutan plimulton de la voĉoj de la reprezentantoj de la voĉdonantaj traktatoŝtatoj.

Artikolo 31

1. La Komitato povas havi nur unu ŝtatanon de la sama ŝtato.

Internacia Traktato pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj

2. Por la elektoj al la Komitato konsiderendas justa geografia disdivido kaj reprezenteco de diversaj formoj de civilizacio kaj de la precipaj jursistemoj.

Artikolo 32

1. La membroj de la Komitato estas elektataj por kvar jaroj. Ili reelekteblas se ili estas denove prezentitaj. Tamen, la mandato de naŭ el la membroj elektitaj dum la unua elekto finiĝas post du jaroj; tuj post la unua elekto, la nomoj de tiuj naŭ membroj estas lotume determinata de la prezidanto de la kunveno celata en la paraĝrafo 4 de la artikolo 30.
2. Ĉe mandatofino, la elektoj okazas konforme al la dispozicioj de la antaŭaj artikoloj de tiu ĉi parto de la Traktato.

Artikolo 33

1. Se, laŭ la unuanima opinio de la aliaj membroj, membro de la Komitato ĉesis plenumi siajn funkciojn pro ajna kialo alia ol provizora foresto, la prezidanto de la Komitato informas pri tio la Ĝeneralan Sekretarion de la Unuiĝintaj Nacioj, kiu deklaras tiam la seĝon vaka, kiun tiu membro okupis.
2. En kazo de forpaso aŭ de demisio de membro de la Komitato, la prezidanto tuj informas pri tio la Ĝeneralan Sekretarion de la Unuiĝintaj Nacioj, kiu deklaras la seĝon vaka ekde la dato de la forpaso aŭ tiu je kiu la demisio efektiviĝas.

Artikolo 34

1. Kiam vakaĝo estas deklarita konforme al la artikolo 33 kaj se la mandato de la anstataŭigota membro ne fi-

Kvara parto

niĝas ene de la ses monatoj kiuj sekvas al la dato en kiu la vakaĵo estas deklarita, la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj informas pri tio la traktatoŝtatojn kiuj povas, ene de du monatoj, nomi kandidatojn konforme al la dispozicioj de la artikolo 29 por reokupi la vakantan seĝon.

2. La Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj faras alfabetan liston de la tiel prezentitaj homoj kaj transdonas ĝin al la traktatoŝtatoj. La elekto por reokupi la vakantan seĝon okazos poste konforme al la koncernaj dispozicioj de tiu ĉi traktato.
3. Ĉiu membro de la Komitato elektita al seĝo deklarita vakanta konforme al la artikolo 33 estas Komitatano ĝis la normala dato de mandatofino de la membro kies seĝo vakiĝis en la Komitato konforme al la disponoj de tiu artikolo.

Artikolo 35

La membroj de la Komitato ricevas, kun la aprobo de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj, kompensaĵojn prenatajn el la resursoj de la Unuiĝintaj Nacioj laŭ la kondiĉoj fiksitaj de la Ĝenerala Asembleo, konsidere al la graveco de la funkcioj de la Komitato.

Artikolo 36

La Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj disponigas al la Komitato la personaron kaj materialajn rimedojn necesajn por efike plenumi la funkciojn konfiditajn al ĝi de tiu ĉi traktato.

Artikolo 37

1. La Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj kunvo-

Internacia Traktato pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj

kas la membrojn de la Komitato, por la unua kunveno, en la sidejon de la Unuiĝintaj Nacioj.

2. Post sia unua kunveno, la Komitato kunvenas je ĉiu okazo difinita de ĝia interna regularo.
3. La kunvenoj de la Komitato okazas normale en la sidejo de la Unuiĝintaj Nacioj aŭ en la oficejo de la Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo.

Artikolo 38

Ĉiu membro de la Komitato devas, antaŭ ol ekfunkcii, en publika kunsido solene devontigi sin plenumi siajn funkciojn en tuta senpartieco kaj en tuta konscienco.

Artikolo 39

1. La Komitato elektas sian estraron por periodo de du jaroj. La estraranoj estas reelekteblaj.
2. La Komitato starigas mem sian internan regularon; tiu devas tamen enteni interalie jenajn dispoziciojn:
 - a) La kvorumo estas dek-du membroj;
 - b) La decidoj de la Komitato fariĝas per plimulto de la ĉeestantaj membroj.

Artikolo 40

1. La traktatoŝtatoj devontigas sin prezenti raportojn pri la disponoj kiujn ili estos farintaj kaj kiuj donas efikon al la rajtoj rekonitaj en tiu ĉi traktato kaj pri la projektoj realigitaj en la uzado de tiuj rajtoj:
 - a) Ene de unu jaro ekde la ekvalido de tiu ĉi traktato, por ĉiu traktatoŝtato interesita pri tio kio koncernas ĝin;

Kvara parto

- b) Poste, ĉiufoje kiam la Komitato petas tion.
2. Ĉiuj raportoj adresendas al la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj kiu transdonos ilin al la Komitato por ekzamenado. La raporto devas indiki, laŭokaze, la faktorojn kaj malfacilaĵojn kiuj tuŝas la realigon de la dispozicioj de tiu ĉi traktato.
3. La Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj povas, post konsultado de la Komitato, transdoni al la interesataj specialaj institucioj kopion de ĉiuj partoj de la raportoj kiuj koncernas ilian kompetentecon.
4. La Komitato studas la raportojn prezentitajn de la traktatoŝtatoj. Ĝi donas al la traktatoŝtatoj siajn proprajn raportojn kaj ĉiujn ĝeneralajn observojn kiujn ĝi opini- as taŭgaj. La Komitato povas ankaŭ transdoni al la Ek- nomia kaj Socia Konsilantaro tiujn observojn akompa- natajn de kopioj de la raportoj kiujn ĝi ricevis de la tra- ktatoŝtatoj.

Artikolo 41

1. Ĉiu traktatoŝtato povas, kaŭze de tiu ĉi artikolo, ĉiu- momente deklari ke ĝi rekonas la kompetenton de la Komitato por ricevi kaj ekzameni la komunikaĵojn en kiuj traktatoŝtato asertas ke alia traktatoŝtato ne plenu- mas siajn devojn koncerne tiun ĉi traktaton. La komu- nikaĵoj prezentataj kaŭze de tiu ĉi artikolo riceveblas kaj ekzamineblas nur se ili venas de traktatoŝtato kiu faras deklaron per kiu ĝi rekonas, en tio kio koncernas ĝin, la kompetenton de la Komitato. La Komitato ricev- as nenian komunikaĵon kiu interesas kontraktoŝtaton kiu ne faris tian deklaron. La ĉi-sekva proceduro aplik- iĝas pri la komunikaĵoj ricevitaj konforme al tiu ĉi arti- kolo.
- a) Se traktatoŝtato opinias ke alia traktatoŝtato ne apli-

Internacia Traktato pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj

- kas la dispoziciojn de tiu ĉi traktato, ĝi povas alvoki, per skriba komunikaĵo, la atenton de tiu ŝtato pri la demando. Ene de tri monatoj post ricevo de la komunikaĵo, la adresita ŝtato liveros al la ŝtato kiu adresis la komunikaĵon klarigojn aŭ iajn aliajn deklarojn skribajn kiuj klarigas la demandon, kiuj devas enteni, laŭ ebleco kaj utilo, indikojn pri siaj reguloj de proceduro kaj pri la juraj rimedoj en tiu afero jam uzitaj, uzataj aŭ disponeblaj.
- b) Se, ene de ses monatoj ekde la dato de ricevo de la komenca komunikaĵo de la adresita ŝtato, la demando ne estas solvita je kontentiĝo de la du koncernataj traktatoŝtatoj, ĉiu de ambaŭ havas la rajton submeti ĝin al la Komitato, adresante sciigon al la Komitato kaj al la alia koncernata ŝtato.
- c) La Komitato okupiĝas pri afero submetita al ĝi nur post kiam ĝi certiĝis ke ĉiuj interne disponeblaj rimedoj estas uzitaj kaj elĉerpitaj, konforme al la principoj de ĝenerale agnoskitaj principoj de la internacia juro. Tiu regulo ne aplikiĝas en la kazo en kiu la proceduroj ĉe apliko de juraj rimedoj daŭris eksterordinare longe.
- ĉ) [*alilingve: d*] La Komitato kunsidas nepublike kiam ĝi ekzamenas la komunikaĵojn koncernatajn en tiu ĉi artikolo.
- d) [*alilingve: e*] Se estas plenumitaj la kondiĉoj de la alineo c, la Komitato disponigas al la koncernataj ŝtatoj siajn bonajn servojn, por atingi interkonsentitan solvon de la demando bazitan sur la respekto de la homrajtoj kaj de la fundamentaj liberecoj, tiaj kiajn rekonas tiu ĉi traktato.
- e) [*alilingve: f*] En ĉiu afero submetita al ĝi, la Komitato povas peti la traktatoŝtatojn koncernatajn de la alineo b liveri al ĝi ĉian koncernan informon.

Kvara parto

- f) [*alilingve: g*] La koncernataj ŝtatoj, celataj en la alineo b, havas la rajton reprezentigi sin dum la ekzamenado de la afero per la Komitato kaj prezenti parolajn aŭ skribajn observojn aŭ en ambaŭ formoj, dum la afero estas traktata.
- g) [*alilingve: h*] La Komitato devas prezenti raporton ene de dek-du monatoj ekde la tago kiam ĝi ricevis la sciigon celatan en la alineo b:
 - i) Se troviĝis solvo konforme al la disponoj de la alineo e, la Komitato limiĝas, en sia raporto, al mallonga resumo de la faktoj kaj de la atingita solvo;
 - ii) Se ne troviĝis solvo konforme al la disponoj de la alineo e, la Komitato limiĝas, en sia raporto, al mallonga resumo de la fakto; la teksto de la skribaj observoj kaj la protokolo de la parolaj observoj prezentitaj de la koncernaj traktatoŝtatoj estas kunmetitaj al la raporto.

Por ĉiu afero la raporto estas transdonenda al la koncernataj traktatoŝtatoj.

2. La disponoj de tiu ĉi artikoloj ekvalidas kiam dek traktatoŝtatoj faris la deklaron menciitan en la paragrafo 1 de tiu ĉi artikolo. Tiu deklaro deponendas de la traktatoŝtato ĉe la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj, kiu transdonas kopion de ĝi al la ceteraj traktatoŝtatoj. Deklaro retireblas ĉiumomente per sciigo adresita al la Ĝenerala Sekretario. Tiu retiro ne tuŝas la ekzamenadon de afero pri kiu komunikaĵo estis jam transdonita kaŭze de tiu ĉi artikolo; neniu kroma komunikaĵo de traktatoŝtato estos akceptita post kiam la Ĝenerala Sekretario ricevis sciigon pri la retiro de la deklaro, almenaŭ se la koncernata traktatoŝtato ne faris novan deklaron.

Internacia Traktato pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj

Artikolo 42

1.

a) Se demando submetita al la Komitato konforme al la artikolo 41 ne estas solvita je kontentiĝo de la koncernataj traktatoŝtatoj, la Komitato povas, kun antaŭa konsento de la koncernataj traktatoŝtatoj, nomumi laŭokazan repacigan komisionon (en la sekvo nomatan la Komisiono). La Komisiono disponigas siajn bonajn servojn al la koncernataj traktatoŝtatoj por atingi interkonsentitan solvon de la demando, bazitan sur la respekto de tiu ĉi traktato;

b) La Komisiono konsistas el kvin membroj nomumitaj kun la konsento de la koncernataj traktatoŝtatoj. Se la koncernataj traktatoŝtatoj ne atingas interkonsenton pri la tuta aŭ parta konsisto de la Komisiono ene de tri monatoj, la membroj de la Komisiono pri kiuj ne atingebis interkonsento estas elektataj per sekreta voĉdonado inter la membroj de la Komitato, per plimulto de du triono de la membroj de la Komitato.

2. La membroj de la Komisiono agas en sia eco de individuoj. Ili devas ne esti civitanoj de la koncernataj traktatoŝtatoj nek de ŝtato kiu ne estas traktatoŝtato nek de ŝtato kiu ne faris la deklaron menciitan en la artikolo 41.

3. La Komisiono elektas sian prezidanton kaj adoptas sian internan regularon.

4. La Komisiono kunsidas normale en la sidejo de la Unuiĝintaj Nacioj aŭ en la Oficejo de la Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo. Ĝi povas tamen kunveni en ĉiu alia taŭga loko kiun la Komisiono povas determini en konsulto kun la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj kaj la koncernataj traktatoŝtatoj.

Kvara parto

5. La sekretario celata en la artikolo 36 disponigas ankaŭ siajn servojn al la komisionoj nomumitaj kaŭze de tiu ĉi artikolo.
6. La informoj ricevitaj kaj kunmetitaj de la Komitato estas disponigitaj al la Komisiono, kaj la Komisiono povas peti la koncernatajn ŝtatojn liveri ĉian koncernan komplementan informon.
7. Post studi la demandon sub ĉiuj ĝiaj aspektoj, sed ĉiu-kaze ene de maksimume dek-du monatoj post kiam ĝi estis petita, la Komisiono submetas raporton al la prezidanto de la Komitato kiu transdonas ĝin al la koncernataj traktatoŝtatoj:
 - a) Se la Komisiono ne povas fini la ekzamenadon de la demando ene de dek-du monatoj, ĝi limiĝas indiki mallonge en sia raporto en kiu stato de la ekzamenado de la demando ĝi troviĝas;
 - b) Se oni atingis interkonsentan solvon de la demando, bazitan sur la respekto de la homrajtoj rekonitaj en tiu ĉi traktato, la Komisiono limiĝas mallonge indiki en sia raporto la faktojn kaj la atingitan solvon;
 - c) Se oni ne atingis solvon en la senco de la alineo b, la Komisiono aperigas en sia raporto siajn konkludojn pri ĉiuj faktaj punktoj debatitaj inter la koncernaj traktatoŝtatoj kaj siajn konstatojn pri la eblecoj de interkonsenta solvo de la afero; la raporto enhavu ankaŭ la skribajn observojn kaj protokolon de la parolaj observoj prezentitaj de la koncernaj traktatoŝtatoj;
 - ĉ) [*alilingve: d*] Se la raporto de la Komisiono estas submetita konforme al la alineo c, la koncernataj traktatoŝtatoj sciigas al la prezidanto de la Komitato, ene de tri monatoj post ricevo de la raporto, ĉu ili akceptas aŭ ne la tekston de la raporto de la Komisiono.

Internacia Traktato pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj

8. La disponoj de tiu ĉi artikolo ne tuŝas la taskojn de la Komitato nomitajn en la artikolo 41.
9. Ĉiuj elspezoj de la membroj de la Komisiono estas egalece disdividitaj inter la koncernataj ŝtatoj, surbaze de taksado farita de la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj.
10. La Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj rajtas, laŭbezone, kovri la elspezojn de la Komisionanoj, antaŭ ol efektiviĝis la repago fare de la koncernaj traktatoŝtatoj, konforme al la paragrafo 9 de tiu ĉi artikolo.

Artikolo 43

La membroj de la Komitato kaj la membroj de la laŭokazaj repacigo-komisionoj nomumeblaj konforme al la artikolo 42 havas rajton je facilajoj, privilegioj kaj imunecoj disponitaj por la ekspertizistoj en misio por la Unuiĝintaj Nacioj, tiaj kiaj disponitaj en la koncernaj sekcioj de la Konvencio pri Privilegioj kaj Imunecoj de la Unuiĝintaj Nacioj.

Artikolo 44

La disponoj de realigo de tiu ĉi traktato aplikiĝas sen tuŝi procedurojn preskribitajn pri homrajtoj per aŭ pro la statutoj kaj konvencioj de la Unuiĝintaj Nacioj kaj de la specialaj institucioj, kaj ne malhelpas la traktatoŝtatojn uzi aliajn procedurojn por solvado de malkonsento konforme al la ĝeneralaj aŭ specialaj internaciaj traktatoj kiuj ligas ilin.

Artikolo 45

La Komitato transdonas ĉiujare al la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj, pere de la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro, raporton pri siaj laboroj.

Kvina parto

Kvina parto

Artikolo 46

Neniu dispono de tiu ĉi traktato interpreteblas kiel limigo al la disponoj de la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj kaj de la statutoj de la specialaj institucioj kiuj difinas la respektivajn respondecojn de la diversaj organoj de la Unuiĝintaj Nacioj kaj de la specialaj institucioj koncerne la demandojn traktatajn en tiu ĉi traktato.

Artikolo 47

Neniu dispono de tiu ĉi traktato interpreteblas kiel limigo al la ennaskita rajto de ĉiuj popoloj profiti kaj plene kaj libere uzi siajn riĉaĵojn kaj naturresursojn.

Sesa parto

Artikolo 48

1. Tiu ĉi traktato estas malfermita al subskribo de ĉiu membroŝtato de la Unuiĝintaj Nacioj aŭ membro de ia ajn el ĝiaj specialaj institucioj, de ĉiu ŝtato aliĝinta al la Statuto de la Internacia Justec-Kortumo, kaj de ĉiu alia ŝtato invitita de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj.
2. Tiu ĉi traktato estas submetita al ratifo kaj la ratifaj dokumentoj estas deponotaj ĉe la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj.
3. Tiu ĉi traktato estas malfermita al aliĝo de ĉiu ŝtato

Internacia Traktato pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj

celata en la paragrafo 1 de tiu ĉi artikolo.

4. La aliĝo fariĝos per deponado de aliĝdokumento ĉe la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj.
5. La Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj informas ĉiujn ŝtatojn kiuj subskribis tiun ĉi traktaton aŭ kiuj aliĝis al ĝi pri la depono de ĉiu ratifa aŭ aliĝa dokumento.

Artikolo 50

La disponoj de tiu ĉi traktato aplikiĝas, sen ajna limo nek escepto, al ĉiuj konsistigaj unuoj de federaciaj ŝtatoj.

Artikolo 51

1. Ĉiu traktatoŝtato povas proponi amendon kaj deponi ties tekston ĉe la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj. La Ĝenerala Sekretario tiam transdonas ĉiujn amendoprojektojn al la traktatoŝtatoj petante ilin indiki ĉu ili deziras kunvokigi konferencon de la traktatoŝtatoj por ekzameni tiujn projektojn kaj voĉdoni pri ili. Se almenaŭ triono de la ŝtatoj deklaras sin favoraj al tia kunvoko, la Ĝenerala Sekretario kunvokas la konferencon sub alta protektado de la Unuiĝintaj Nacioj. Ĉia amendo adoptita de la plimulto de la ŝtatoj ĉeestaj kaj voĉdonantaj en la konferenco estas submetota por aprobo al la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj.
2. Tiuj amendoj ekvalidas kiam ili estas aprobitaj de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj kaj akceptitaj, konforme al iliaj respektivaj konstituciaj reguloj, de du-triona plimulto de la traktatoŝtatoj.
3. Kiam tiuj amendoj ekvalidas, ili estas devigaj por la traktatoŝtatoj kiuj akceptis ilin, la aliaj traktatoŝtatoj

Sesa parto

restas ligitaj de la dispozicioj de tiu ĉi traktato kaj de ĉiu antaŭa amendo kiun ili akceptis.

Artikolo 52

Sendepende de la sciigoj menciitaj en la paragrafo 5 de la artikolo 48, la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj informas ĉiujn ŝtatojn celatajn en la paragrafo 1 de tiu artikolo:

- a) Pri la subskriboj sub tiu ĉi traktato kaj la ratifaj kaj aliĝaj dokumentoj deponitaj konforme al la artikolo 48;
- b) Pri la dato en kiu tiu ĉi traktato ekvalidas konforme al la artikolo 49 kaj pri la dato en kiu ekvalidas la amendoj celataj en la artikolo 51.

Artikolo 53

1. Tiu ĉi traktato, kies angla, ĉina, franca, hispana kaj rusa tekstoj estas same aŭtentaj, estas deponota en la arĥivoj de la Unuiĝintaj Nacioj.
2. La Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj transdonos legitimigitan kopion al ĉiuj ŝtatoj celataj en la artikolo 48.

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

Antaŭparto

La ŝtatoj subskribintaj tiun ĉi konvencion,

Konsiderante ke, konforme al la principoj proklamitaj en la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, la agnosko de la enaskita digno al ĉiuj homaj membroj de la familio same kiel la egalrajtecon kaj la neforcedeblon de iliaj rajtoj, inter kiuj la fundamento de la libereco, de la justeco kaj de la paco en la mondo,

Konsciante pri la fakto ke la popoloj de la Unuiĝintaj Nacioj, en la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, denove proklamis sian fidon en la fundamentaj rajtoj de la homo kaj en la digno de la valoro de la homa persono, kaj ke ili decidis favori la socialan progreson kaj starigi pli bonajn kondiĉojn de vivo en pli granda libereco,

Rekonante ke la Unuiĝintaj Nacioj, en la Universala Deklaro de la Homrajtoj kaj en la internaciaj traktatoj pri la homrajtoj, proklamis kaj interkonsentis ke ĉiu povas pretendi ĉiujn rajtojn kaj ĉiujn liberecojn kiuj estas tie eldiritaj, sen ajna distingo, aparte de raso, koloro, sekso, lingvo, religio, politika opinio aŭ de ĉia alia opinio, de nacia aŭ socia deveno, riĉeco, denaskiteco aŭ de ĉia

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

alia situacio,

Memorigante ke, en la Universala Deklaro de la Homrajtoj, la Unuiĝintaj Nacioj proklamis ke la infaneco rajtas je helpo kaj speciala asistado,

Konvinkite ke la familio, fundamenta unuo de la socio kaj natura medio por la kreskado kaj bonfarto de ĉiuj ĝiaj membroj, kaj aparte de ĝiaj infanoj, devas ricevi la protekton kaj helpon kiujn ĝi bezonas por povi ludi plene sian rolon en la komunumo,

Rekonante ke la infano, por la harmonia evoluo de sia personeco, devas kreski en la familia medio, en etoso de feliĉo, de amo kaj de komprenemo,

Konsiderante ke gravas plene prepari la infanon por havi individuan vivon en la socio kaj eduki ĝin en la spirito de la idealoj proklamitaj en la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, kaj aparte en spirito de paco, de digno, de toleremo, de libereco, de egaleco kaj de solidareco,

Konsciante ke la neceso doni specialan protekton al la infano estis eldirita en la Ĝeneva Deklaro de 1924 pri la Infanrajtoj kaj en la Deklaro de la Infanrajtoj adoptita de la Unuiĝintaj Nacioj en 1959, kaj ke ĝi estis agnoskita en la Universala Deklaro de la Homrajtoj, en la Internacia Pakto pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj (aparte en la artikoloj 23 kaj 24) en la Internacia Pakto pri Ekonomiaj, Socialaj kaj Kulturaj Rajtoj (aparte en la artikolo 10) kaj en la statutoj kaj la koncernaj instrumentoj de la specialaj institucioj kaj de la internaciaj organizoj kiuj zorgas pri la bonfarto de la infano,

Konsciante ke, kiel indikite en la Deklaro de la Infanrajtoj, adoptita la 20-an de novembro 1959 de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj "la infano, pro sia manko da korpa kaj intelekta matureco, bezonas specialan protekton kaj specialajn prizorgadojn, aparte taŭ-

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

gan juran protekton, antaŭ kaj post la naskiĝo",

Memorigante la disponojn de la Deklaro pri la socialaj kaj juraj principoj aplikendaj por la protekto kaj bonfarto de la infanoj, konceptitaj antaŭ ĉio el la perspektivo de la praktikoj pri adoptado kaj familia lokado sur nacia kaj internacia niveloj (rezolucio 41/85 de la Ĝenerala Asembleo, de la 3-a de decembro 1986) de la tutaĵo de la minimumaj reguloj de la Unuiĝintaj Nacioj koncerne la administradon de la jursistemo por neplenkreskuloj ("Reguloj de Pekino" - rezolucio 40/33 de la Ĝenerala Asembleo de la 29-a de novembro 1985) kaj de la Deklaro pri la Protekto de la Virinoj kaj Infanoj en Periodo de Danĝero kaj de Armita Konflikto (rezolucio 3318 [XXIX] de la Ĝenerala Asembleo, de la 14-a de decembro 1974),

Rekonante ke en ĉiuj landoj de la mondo ekzistas infanoj kiuj vivas en aparte malfacilaj kondiĉoj kaj ke necesas doni al tiuj infanoj apartan atenton,

Konsiderante jure la gravecon de la tradicioj kaj kulturaj valoroj de ĉiu popolo en la protekto kaj harmonia disvolvado de la infano,

Rekonante la gravecon de la internacia kunlaborado por plibonigi la vivkondiĉojn de la infanoj en ĉiuj landoj, kaj aparte en la evolulandoj,

Interkonsentis pri la sekvo:

ARTIKOLO 1

En la senco de tiu ĉi konvencio, infano estas komprenata kiel ĉiu homa estulo malpli ol dekokjara, escepte se la plenkreska aĝo estas atingata pli frue pro la aplikenda leĝaro.

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

ARTIKOLO 2

1. La subskribintaj ŝtatoj promesas respekti la rajtojn kiuj estas eldiritaj en tiu ĉi konvencio kaj garantii al ĉiu infano pri kiu kompetentas ilia jursistemo, sen ajna distingo, sendepende de ĉia konsidero de raso, koloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio de la infano aŭ de ties gepatroj aŭ laŭleĝaj reprezentantoj, de ilia nekapablo, de ilia naskiĝdeveno aŭ de ĉia alia situacio.
2. La subskribintaj ŝtatoj faras ĉiujn taŭgajn disponojn por ke la infano estu efektive protektata kontraŭ ĉiaj formoj de diskriminacio aŭ de sankcio motivita de la jura situacio, la agadoj, deklaritaj opinioj aŭ la konvinkoj de ĝiaj gepatroj, de ĝiaj laŭleĝaj reprezentantoj aŭ de la membroj de ĝia familio.

ARTIKOLO 3

1. En ĉiuj decidoj kiuj koncernas la infanojn, ĉu ili estas faktoj de la publikaj aŭ privataj institucioj de sociala protekto, de tribunaloj, de administraciaj aŭtoritatoj aŭ de leĝdonaj organoj, la supera intereso de la infano devas esti unuaranga konsidero.
2. La subskribintaj ŝtatoj promesas certigi al la infano la protekton kaj prizorgojn necesajn por ĝia bonfarto, kun konsidero al la rajtoj kaj devoj de ĝiaj gepatroj, de ĝiaj zorgantoj aŭ de la aliaj personoj laŭleĝe respondecaj pri ĝi, kaj ili tiucele faras ĉiujn taŭgajn leĝdonajn kaj administraciajn disponojn.
3. La subskribintaj ŝtatoj zorgas pri tio ke la funkciado de la institucioj, servoj kaj establoj kiuj respondecas pri la infanoj kaj certigas ilian protekton estu konformaj al la normoj fiksitaj de la kompetentaj aŭtoritatoj, aparte en la kampo de sekureco kaj sano kaj koncerne

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

la nombron kaj kompetenton de ilia personaro same kiel pri ekzisto de taŭga kontrolado.

ARTIKOLO 4

La subskribintaj ŝtatoj promesas fari ĉiujn leĝdonajn, administraciajn kaj aliajn disponojn necesajn por apliki la rajtojn agnoskitajn en tiu ĉi konvencio. En la kazo de la ekonomiaj, socialaj kaj kulturaj rajtoj ili faras tiujn disponojn en la tutaj limoj de la resursoj kiujn ili disponas kaj, laŭokaze, en la kadro de la internacia kunlaborado.

ARTIKOLO 5

La subskribintaj ŝtatoj respektas la respondecon, rajton kaj devon kiujn havas la gepatroj aŭ, laŭokaze, la membroj de la pli larĝa familio aŭ de la komunumo, laŭ la loka kutimo, la zorgantoj aŭ aliaj personoj laŭleĝe respondecoj pri la infano, doni al tiu, en maniero kiu respondas al la evoluo de ĝiaj kapabloj, la orientadon kaj konsilojn taŭgajn por la uzo de la rajtoj kiujn rekonas al ĝi tiu ĉi konvencio.

ARTIKOLO 6

1. La subskribintaj ŝtatoj agnoskas ke ĉiu infano havas ennaskitan rajton je vivo.
2. La subskribintaj ŝtatoj certigas laŭ tuta ebleco la supervivadon kaj la evoluon de la infano.

ARTIKOLO 7

1. La infano estas registrata tuj naskiĝinte kaj havas ekde sia naskiĝo la rajton je nomo, la rajton akiri ŝtatan-

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

econ kaj, laŭeble, la rajton koni siajn gepatrojn kaj esti edukata de ili.

2. La subskribintaj ŝtatoj zorgas pri aplikado de tiuj ĉi rajtoj konforme al sia nacia leĝaro kaj al la devoj kiujn trudas al ili la internaciaj dokumentoj aplikendaj ĉi-ri-late, aparte en la kazo en kiu, sen tio, la infano estus senpatruja.

ARTIKOLO 8

1. La subskribintaj ŝtatoj promesas respekti la rajton de la infano konservi sian identecon, inkluzive de sia ŝtataneco, sia nomo kaj siaj familiaj rilatoj, tiaj kiaj ili estas agnoskitaj de la leĝo, sen kontraŭleĝa enmiksiĝo.
2. Se infano estas kontraŭleĝe senigita de la konsistigaj elementoj de sia identeco aŭ de iuj de ĝi, la subskribintaj ŝtatoj devas doni al ĝi taŭgajn helpon kaj protekton, por ke ĝi identeco estu restarigita iom eble plej rapide.

ARTIKOLO 9

1. La subskribintaj ŝtatoj zorgas pri tio ke la infano ne estu disigata de siaj gepatroj kontraŭ ilia volo, escepte se la kompetentaj aŭtoritatoj decidas, sub rezervo de jura revizio kaj konforme al la aplikendaj leĝoj kaj proceduroj, ke tiu disigo necesas en la superaj intereso de la infano. Tiasenca decido povas esti necesa en certaj apartaj kazoj, ekzemple se la gepatroj mistraktas aŭ neglektas la infanon, aŭ kiam ili vivas dise kaj necesas decido pri la loĝloko de la infano.
2. En ĉiuj kazoj menciitaj en la paragrafo 1, ĉiuj interesataj partoj devas havi la eblecon partopreni en la diskutoj kaj konatigi siajn vidpunktojn.
3. La subskribintaj ŝtatoj respektas la rajton de la infano

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

disigita de siaj du gepatroj aŭ de unu el ili teni regule personajn rilatojn kaj rektajn kontaktojn kun siaj du gepatroj, escepte se tio kontraŭas la superajn interesojn de la infano.

4. Kiam la disiĝo rezultas el disponoj faritaj de subskribinta ŝtato, kiel aresto, enprizonigo, ekzilo, elpelo aŭ morto (inkluzive la morton, pro kia ajn kaŭzo, okazinta dum arestado) de la du gepatroj aŭ de unu el ili, aŭ de la infano, la subskribinta ŝtato donas, laŭ peto, al la gepatroj, al la infano aŭ, laŭ la okazo, al alia membro de la familio esencajn informojn pri la loko kie troviĝas la membro aŭ la membroj de la familio, escepte se la konigo de tiuj informoj damaĝas la bonfarton de la infano. La subskribintaj ŝtatoj zorgas krome pri tio ke la prezento de tia peto ne sekvigu siavice malagrablajn konsekvencojn por la interesita persono aŭ personoj.

ARTIKOLO 10

1. Konforme al la devo por la subskribintaj ŝtatoj kaŭze de la paragrafo 1 de la 9-a artikolo, ĉia peto farita de infano aŭ de ties gepatroj cele al eniri subskribintan ŝtaton aŭ forlasi ĝin por familia reunuiĝo estas konsiderata de la subskribintaj ŝtatoj en pozitiva spirito, kun humaneco kaj diligento. La subskribintaj ŝtatoj zorgas krome pri tio ke la prezentado de tia peto ne sekvigu malagrablajn konsekvencojn por la aŭtoroj de la peto kaj la membroj de iliaj familioj.
2. Infano kies gepatroj loĝas en malsamaj ŝtatoj havas la rajton teni, kun la escepto de esceptaj cirkonstancoj, personajn rilatojn kaj regulajn rektajn kontaktojn kun siaj du gepatroj. Por tio, kaj konforme al la devo de la subskribintaj ŝtatoj kaŭze de la paragrafo 2 de la 9-a artikolo, la subskribintaj ŝtatoj respektas la rajton kiun havas la infano kaj ĝiaj gepatroj forlasi ĉian landon, in-

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

kluzive la sian, kaj reveni en sian propran landon. La rajto forlasi ĉian landon povas esti restriktata nur laŭ preskriboj de la leĝo necesaj por protekti la nacian sekurecon, la publikan ordon, la publikajn sanon aŭ bonmorecon aŭ la rajtojn kaj liberecojn de aliulo, kaj kiuj estas kongruaj kun la aliaj rajtoj rekonataj en tiu ĉi konvencio.

ARTIKOLO 11

1. La subskribintaj ŝtatoj faras disponojn por batali kontraŭ la nepermesataj delokadoj kaj nerevenon de infanoj eksterlanden.
2. Tiucele la kontraktoŝtatoj favoras la starigon de duflankaj aŭ multflankaj interkonsentoj aŭ la aliĝon al ekzistantaj interkonsentoj.

ARTIKOLO 12

1. La subskribintaj ŝtatoj garantias al la juĝkapabla infano la rajton esprimi libere sian opinion pri ĉia demando kiu interesas lin, kaj la opinioj de la infanoj devas esti oficiale konsiderataj laŭ ĝia aĝo kaj ĝia grado de matureco.
2. Tiucele oni donu nome al la infano la eblon esti aŭdata en ĉia jura aŭ administracia proceduro kiu interesas ĝin, aŭ rekte aŭ pere de reprezentanto aŭ de taŭga organismo, kongrue kun la reguloj de proceduro de la nacia leĝaro.

ARTIKOLO 13

1. La infano havas la rajton je esprimlibereco. Tiu rajto entenas la liberecon esplori, ricevi kaj disvastigi ĉiajn informojn kaj ideojn, senkonsidere landlimojn, en paro-

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

la, skriba, presita aŭ arta formo, aŭ per ĉia alia rimedo elektita de la infano.

2. La uzado de tiu rajto restrikteblas nur per leĝaj preskriboj kaj kiuj estas necesaj:
 - a) Por la respekto de la rajtoj aŭ de la reputacio de aliulo; aŭ
 - b) Por konservi la nacian sekurecon, publikan ordon, publikan sanon aŭ bonmorecon.

ARTIKOLO 14

1. La subskribintaj ŝtatoj respektas la rajton de la infano je libereco de penso, de konscio kaj de religio.
2. La subskribintaj ŝtatoj respektas la rajton kaj la devon de la gepatroj aŭ, laŭ la okazo, de la leĝaj reprezentantoj de la infano, gvidi tiun en la uzado de la supre menciita rajto kongrue kun la evoluo de ĝiaj kapabloj.
3. La libereco montri sian religion aŭ siajn konvinkojn povas esti restriktataj nur de leĝaj preskriboj kaj kiuj estas necesaj por konservi la publikan sekurecon, la publikan ordon, la publikajn sanon kaj bonmorecon, aŭ alies fundamentajn liberecojn kaj rajtojn.

ARTIKOLO 15

1. La subskribintaj ŝtatoj agnoskas la rajtojn de la infano je libereco de asociiĝo kaj la liberecon de paca kunveno.
2. La uzado de tiuj rajtoj restrikteblas nur per leĝaj preskriboj kaj kiuj estas necesaj en demokratia socio, en la intereso de la nacia sekureco, de la publika sekureco aŭ de la publika ordo, aŭ por protekti la publikajn sanon aŭ bonmorecon, aŭ alies rajtojn kaj liberecojn.

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

ARTIKOLO 16

- 1 Neniu infano estu celo de arbitraj aŭ kontraŭleĝaj enmiksiĝoj en ties privatan vivon, ĝian familion, ĝian hejmon aŭ ĝian korespondadon, nek de kontraŭleĝaj atencoj al ĝia honoro aŭ al ĝia reputacio.
2. La infano rajtas je protekto de la leĝo kontraŭ tiaj enmiksiĝoj aŭ tiaj atencoj.

ARTIKOLO 17

La subskribintaj ŝtatoj agnoskas la gravecon de la funkcio de la komunikiloj kaj zorgas pri tio ke la infano havu aliron al informado kaj al materialoj devenaj de diversaj naciaj kaj internaciaj fontoj, aparte tiuj kiuj celas subteni ĝian socialan, spiritan kaj moralan bonfarton kaj ĝian korpan kaj mensan sanon. Tiucele la subskribintaj ŝtatoj:

- a) Instigas la komunikilojn dissendi informadon kaj materialojn kiuj prezentas socian kaj kulturalan utilon por la infano kaj respondas al la spirito de la 29-a artikolo;
- b) Instigas al internacia kunlaborado kun la celo produkti, interŝanĝi kaj dissendi tiajn informadon kaj materialojn devenajn el diversaj kulturaj, naciaj kaj internaciaj fontoj;
- c) Instigas al produktado kaj distribuado de libroj por infanoj;
- ĉ) Instigas la komunikilojn aparte konsideri la lingvajn bezonojn de la infanoj aŭtohtonaj aŭ apartenantaj al malplimulta grupo;
- d) Favoras la ellaboradon de taŭgaj gvidprincipoj destinitaj protekti la infanon kontraŭ informado kaj materialoj kiuj malutilas al ties bonfarto, konsidere al la dispo-

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

noj de la artikoloj 13 kaj 18.

ARTIKOLO 18

1. La subskribintaj ŝtatoj klopodas kiom eble plej por certigi la rekonon de la principo laŭ kiu la du gepatroj havas komunan respondecon por eduki la infanon kaj certigi ties evoluon. La respondeco eduki la infanon kaj certigi ĝian evoluon estas unuavice tiu de la gepatroj aŭ, laŭ la okazo, tiu de ĝiaj laŭleĝaj reprezentantoj. Tiuj devas esti gvidataj antaŭ ĉio de la supera intereso de la infano.
2. Por garantii kaj subteni la rajtojn eldiritajn en tiu ĉi konvencio, la subskribintaj ŝtatoj donas la taŭgan helpon al la gepatroj kaj al la laŭleĝaj reprezentantoj en plenumado de sia respondeco eduki la infanon kaj certigas la starigon de institucioj, establoj kaj servoj taskitaj zorgi pri la bonfarto de la infanoj.
3. La subskribintaj ŝtatoj faras ĉiujn taŭgajn disponojn por certigi al la infanoj, kies gepatroj laboras, la rajton profiti la servojn kaj establojn de infangardado por kiuj ili plenumas la necesajn kondiĉojn.

ARTIKOLO 19

1. La subskribintaj ŝtatoj faras ĉiujn leĝdonajn, administraciajn, socialajn kaj edukajn disponojn taŭgajn por protekti la infanon kontraŭ ĉia perforto, atenco aŭ korpa aŭ mensa brutaleco, forlaso aŭ neglekto, malbonaj traktadoj aŭ ekspluatado, inkluzive de seksa perforto, dum ĝi estas sub gardo de siaj gepatroj aŭ de unu el ili, de sia aŭ siaj leĝaj reprezentantoj aŭ de ĉia alia persono al kiu ĝi estas konfidita.
2. Tiuj disponoj de protekto entenas, laŭkonvene, efikajn

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

procedurojn por starigi socialajn programojn por liveri la necesan apogon al la infano kaj al tiuj al kiuj ĝi estas konfidita, same kiel por aliaj formoj de prevento, kaj kun la celo de identigo, de raporto, de resendo, de enketo, de traktado kaj plutraktado por la kazo de supre menciitaj malbonaj traktadoj, kaj ili entenas ankaŭ, laŭkonvene, jurajn interven-procedurojn.

ARTIKOLO 20

1. Ĉia infano kiu estas portempe aŭ definitive senigita de sia familia medio, aŭ kiu en sia propra intereso ne lasblas en tiu medio, rajtas je specialaj protekto kaj helpo de la ŝtato.
2. La subskribintaj ŝtatoj planas por tiu infano protekton kaj anstataŭon konforman al ilia nacia leĝaro.
3. Tiu protekto de anstataŭo povas nome havi la formon de lokado en familio, de la "kafalo" de la islama juro, de adopto aŭ, se necese, de lokado en taŭga stablo por infanoj. En la elekto inter tiuj solvoj, oficiale konsiderendas la neceso de certa kontinueco en la edukado de la infano, same kiel de ĝia etna, religia, kultura kaj lingva deveno.

ARTIKOLO 21

La subskribintaj ŝtatoj kiuj allasas kaj/aŭ permesas adoptadon certigas ke la supera intereso de la infano estas la unuaranga konsidero tiurilate, kaj:

- a) Zorgas pri tio ke la adopto de infano estu permesata nur de la kompetentaj aŭtoritatoj, kiuj kontrolas, konforme al la leĝo kaj al la aplikendaj proceduroj kaj surbaze de ĉiuj fidindaj informoj pri la konsiderata kazo, ke la adopto povu okazi kun konsidero al la situacio de

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

- la infano rilate al siaj patro kaj patrino, gepatroj kaj laŭlegaj reprezentantoj kaj ke, laŭ la okazo, la interesataj personoj donis sian konsenton al la adopto kun plena scio de la afero, post ricevi la necesajn opiniojn;
- b) Rekonas ke la adopto eksterlande konsidereblas kiel alia rimedo por certigi la necesajn prizorgojn al la infano, se tiu ne lokeblas, en sia devenlando, en nutra aŭ adopta familio aŭ ne konvene edukeblas.
 - c) Zorgas, en kazo de adopto eksterlande, pri tio ke la infano ĝuu la garantiojn kaj normojn ekvivalentajn al tiuj ekzistantaj en kazo de nacia adopto;
 - ĉ) Faras ĉiujn taŭgajn disponojn por zorgi pri tio ke, en kazo de adopto eksterlande, la lokado de la infano ne signifas eksterregulan materian profiton por la personoj kiuj respondecas pri ĝi;
 - d) Sekvas la celojn de tiu ĉi artikolo farante aranĝojn duflankajn aŭ multflankajn aranĝojn aŭ interkonsentojn, laŭ la kazoj, kaj klopodas en tiu kadro zorgi por ke la lokado de infanoj en eksterlando estu farata de la aŭtoritatoj aŭ organoj kompetentaj.

ARTIKOLO 22

1. La subskribintaj ŝtatoj faras la taŭgajn disponojn por ke infano kiu volas akiri la statuson de rifuĝinto aŭ kiu estas konsiderata kiel rifuĝinto kaŭze de la reguloj kaj proceduroj de la aplikenda internacia aŭ nacia juro, ĉu sola aŭ akompanata de siaj patro kaj patrino aŭ de ĉia alia persono, ĝuu la protekton kaj la humanan helpon destinitan por ebligi al ĝi ĝui la rajtojn kiujn rekonas al ĝi tiu ĉi konvencio kaj la aliaj internaciaj instrumentoj pri la homrajtoj aŭ humanaj kiujn tiuj ŝtatoj subskribis.
2. Tiucele la subskribintaj ŝtatoj kunlaboras, se ili juĝas

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

tion necesa, kun ĉiuj klopodoj farataj de la Unuiĝintaj Nacioj kaj la aliaj kompetentaj interregistaraj aŭ neregistaraj organizoj kunlaborantaj kun la Unuiĝintaj Nacioj por protekti kaj helpi la infanojn kiuj troviĝas en tia situacio kaj por serĉi la patron kaj patrinon aŭ aliajn membrojn de la familio de ĉia rifuĝinta infano por akiri la necesajn informojn por rekunigi ĝin kun ĝia familio. Kiam nek la patro nek la patrino nek ajna alia membro de la familio retroveblas, la infano devas ricevi, laŭ la principoj eldiritaj en tiu ĉi konvencio, la saman protekton kiel ĉia alia infano definitive aŭ portempe senigita de sia familia medio pro ia ajn kaŭzo.

ARTIKOLO 23

1. La subskribintaj ŝtatoj rekonas ke la mense aŭ korpe handikapitaj infanoj devas havi plenan kaj decan vivon, en kondiĉoj kiuj garantias ilian dignon, favoras ilian aŭtonomecon kaj faciligas ilian aktivan partoprenon en la vivo de la kolektiveco.
2. La subskribintaj ŝtatoj rekonas la rajton de la handikapitaj infanoj profiti specialajn prizorgojn kaj instigas kaj certigas, en la mezuro de la disponeblaj resursoj, la asignon, laŭpete, al la handikapitaj infanoj plenumantaj la postulatajn kondiĉojn kaj al tiuj kiuj prizorgas ilin, helpon adaptitan al la stato de la infano kaj al la situacio de ties gepatroj aŭ de tiuj al kiuj ĝi estas konfidita.
3. Konsidera al la apartaj bezonoj de la handikapitaj infanoj, la helpo donata konforme al la paragrafo 2 estas senpaga ĉiam kiam eblas, konsidere al la financaj resursoj de iliaj gepatroj aŭ de tiuj al kiuj la infano estas konfidita, kaj ĝi estas konceptita tia ke la handikapitaj infanoj havu efektivan aliron al edukado, formado, sanprizorgoj, reedukado, preparado al dungo kaj al rekre-

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

ivaj agadoj, kaj profitu tiujn servojn en maniero por certigi socialan integriĝon kiom eble plej kompletan kaj ilian personan evoluon, inkluzive en la kampo kultura kaj spirita

4. En spirito de internacia kunlaborado, la subskribintaj ŝtatoj favoras la interŝanĝon de trafikaj informoj en la kampo de preventaj sanprizorgoj kaj de medicina, psikologia kaj funkcia traktado de la handikapitaj infanoj, inkluzive per disvastigo de informoj pri la metodoj de reedukado kaj la servoj de profesia formado, same kiel la aliron al tiuj donitaĵoj, por ebligi al la subskribintaj ŝtatoj plibonigi siajn kapablojn kaj kompetentojn kaj larĝigi sian sperton tiukampe. Tiurilate konsiderendas aparte la bezonoj de la evolulandoj.

ARTIKOLO 24

1. La subskribintaj ŝtatoj rekonas la rajton de la infano ĝui la kiom eble plej bonan sanstaton kaj profiti medicinajn kaj reedukajn servojn. Ili klopodas por garantii ke neniu infano estu senigita de la rajto aliri tiujn servojn.
2. La subskribintaj ŝtatoj klopodas por certigi la integran realigon de la supre menciita rajto kaj, aparte, faras taŭgajn disponojn por
 - a) Redukti la mortigton inter la suĉinfanoj kaj infanoj;
 - b) Certigi al ĉiuj infanoj medicinan helpon kaj la necesajn sanprizorgojn, kun la akcento sur la disvolvado de primaraj sanprizorgoj;
 - c) Lukti kontraŭ malsano kaj subnutrado, inkluzive en la kadro de la primaraj sanprizorgoj, danke ĉefe al uzado de teĥnikoj facile disponeblaj kaj al la liverado de nutraĵoj kaj trinkakvo, konsidere al la danĝeroj kaj riskoj

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

de poluado de la naturmedio;

- ĉ) Certigi al la patrinoj taŭgajn antaŭnaskajn kaj post-naskajn prizorgadojn;
 - d) Fari tiel ke ĉiuj grupoj de la socio, aparte la gepatroj kaj la infanoj, ricevu informadon pri la sano kaj nutrado de la infano, la avantaĝoj de mamnutrado, higieno kaj sanfavoreco de la medio kaj la prevento de akcidentoj, kaj profitu helpon kiu ebligu al ili profiti tiun informadon;
 - e) Disvolvi preventajn sanprizorgojn, konsilojn al gepatroj kaj edukadon kaj servojn pri familia planado.
3. La subskribintaj ŝtatoj faras ĉiujn ĉi taŭgajn efikajn disponojn por aboli la tradiciajn praktikojn malutilajn por la sano de la infanoj.
 4. La subskribintaj ŝtatoj promesas favori kaj subteni la internacian kunlaboradon por certigi iom post iom la plenan realigon de la rajto agnoskata en tiu ĉi artikolo. Tiurilate estas aparte konsiderenda la bezonoj de la evolulandoj.

ARTIKOLO 25

La subskribintaj ŝtatoj rekonas al la infano kiu estis lokita de la kompetentaj aŭtoritatoj por ricevi prizorgojn, protekton aŭ korpan aŭ mensan pritraktadon, la rajton je perioda ekzameno de tiu traktado kaj de ĉia alia cirkonstanco kiu rilatas al li lokado.

ARTIKOLO 26

1. La subskribintaj ŝtatoj rekonas al ĉiu infano la rajton profiti la socialan sekurecon, inkluzive de socialaj asekuraj, kaj faras la disponojn necesajn por certigi la

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

plenan realigon de tiu rajto konforme kun ilia nacia leĝaro.

2. La prestaĵoj devas, laŭ la okazo, esti asignataj konsidere al la resursoj kaj de la situacio de la infano kaj de la personoj respondecaj pri ĝia vivtenado, same kiel al ĉia alia konsidero aplikebla al la peto pri prestado farita de la infano aŭ en ĝia nomo.

ARTIKOLO 27

1. La subskribintaj ŝtatoj rekonas la rajton de ĉiu infano je vivnivelo sufiĉa por ebligi ĝian korpan, mensan, spiritan, moralan kaj socialan evoluon.
2. Estas la gepatroj aŭ aliaj personoj vivtenantaj la infanon kiuj havas unuavice la respondecon certigi, en la limoj de siaj eblecoj kaj de siaj financaj rimedoj, la vivkondiĉojn necesajn por la evoluo de la infano.
3. La subskribintaj ŝtatoj adoptas la taŭgajn disponojn, konsidere al la naciaj kondiĉoj kaj en la mezuro de siaj rimedoj, por helpi la gepatrojn kaj aliajn personojn kiuj vivtenas la infanon aplikigi tiun rajton kaj donas, en kazo de bezono, materialan helpon kaj apogajn programojn, nome koncerne nutrandon, vestadon kaj loĝadon.
4. La subskribintaj ŝtatoj faras ĉiujn taŭgajn disponojn por certigi la pagon de la nutra pensio de la infano ĉe ĝiaj gepatroj aŭ la aliaj personoj kiuj havas financon respondecon ĝiarilate, ĉu en ties teritorio aŭ eksterlande. Aparte, por konsideri la kazojn en kiuj la persono, kiu havas financon respondecon rilate la infano, loĝas en alia ŝtato ol tiu de la infano, la subskribintaj ŝtatoj favoras la aliĝon al internaciaj akordoj aŭ la starigon de tiaj akordoj kaj la adopton de ĉiuj aliaj taŭgaj aranĝoj.

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

ARTIKOLO 28

1. La subskribintaj ŝtatoj rekonas la rajton de la infano je edukado, kaj aparte, por certigi la uzon de tiu rajto iom post iom kaj surbaze de la ŝanc-egaleco:
 - a) Ili igas la primaran instruadon deviga kaj senpaga por ĉiuj;
 - b) Ili subtenas la organizadon de diversaj formoj de sekundara instruado, ĝenerala kaj profesia, igas ilin malfermitaj kaj alireblaj por ĉiu infano, kaj faras taŭgajn disponojn kiel starigon de senpageco de la instruado kaj la disponigo de financa helpo en kazo de bezono;
 - c) Ili certigas al ĉiuj la aliron al la supera instruado, laŭ la kapabloj de ĉiu, per ĉiuj taŭgaj rimedoj;
 - ĉ) [*alilingve: d*] Ili igas malfermitaj kaj alireblaj por ĉiu infano la lernejan kaj profesion informadon kaj orientadon;
 - d) [*alilingve: e*] Ili faras disponojn por subteni la regulecon de la lerneja frekventado kaj la redukton de la kvotoj de lerneĵ-forlasoj.
2. La subskribintaj ŝtatoj faras ĉiujn taŭgajn disponojn por zorgi pri tio ke la lerneja disciplino estu aplikata en maniero kongrua kun la digno de la infano kiel homa estulo kaj konforme al tiu ĉi konvencio.
3. La subskribintaj ŝtatoj favoras kaj subtenas la internacian kunlaboradon en la kampo de edukado, por nome kontribui al eliminado de nesciado kaj analfabetismo en la mondo kaj por faciligi la aliron al la sciencaj kaj teĥnikaj konoj kaj al la modernaj instrumentoj. Tiurilate aparte konsideratas la bezonoj de la evolulandoj.

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

ARTIKOLO 29

1. La subskribintaj ŝtatoj interkonsentas ke la edukado de la infano devas celi:
 - a) Favori la evoluon de la personeco de la infano kaj la disvolviĝon de ĝiaj dotoj kaj de ĝiaj mensaj kaj korpaj kapabloj, en la tuta mezuro de iliaj potencialoj;
 - b) Enkapigi al la infano la respekton de la homrajtoj kaj de la fundamentaj liberecoj, kaj de la principoj konfirmitaj en la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj;
 - c) Enkapigi al la infano la respekton de siaj gepatroj, de sia identeco, de sia lingvo kaj de siaj kulturaj valoroj, kiel la respekton de la naciaj valoroj de la lando en kiu ĝi vivas, de la lando de kiu ĝi povas esti devena kaj de la civilizacioj diversaj de la sia;
 - ĉ) [*alilingve: d*] Prepari la infanon por ke ĝi plenumu la respondecojn de la vivo en libera socio, en spirito de komprenemo, de paco, de toleremo, de egaleco inter la seksoj kaj de amikeco inter ĉiuj popoloj kaj etnaj grupoj, naciaj kaj religiaj, kaj kun la personoj de aŭtohtona deveno;
 - d) [*alilingve: e*] Enkapigi al la infano la respekton de la naturmedio.
2. Nenia dispono de tiu ĉi artikolo aŭ de la artikolo 28 estu interpretata en maniero kiu atencas la liberecon de la korpaj aŭ moralaj personoj krei kaj direkti establojn de instruado, kondiĉe ke la principoj eldiritaj en la paragrafo 1 de tiu ĉi artikolo estu respektataj kaj ke la edukado donata en tiuj establoj estu konforma al la minimumaj normoj kiujn la ŝtato estas preskribinta.

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

ARTIKOLO 30

En la ŝtatoj kie ekzistas etnaj, religiaj aŭ lingvaj malplimultoj aŭ personoj de aŭtoĥtona deveno, infano aŭtoĥtona aŭ apartenanta al unu el tiuj malplimultoj ne povas esti senigata de la rajto havi sian propran kulturen vivon, deklari kaj praktiki sian propran religion aŭ uzi sian propran lingvon kune kun la aliaj membroj de sia grupo.

ARTIKOLO 31

1. La subskribintaj ŝtatoj rekonas al la infano la rajton je ripozo kaj je libertempoj, okupi sin pri ludo kaj pri rekreivaj agadoj propraj al sia aĝo, kaj partopreni libere en la kultura kaj arta vivo.
2. La subskribintaj ŝtatoj respektas kaj favoras la rajton de la infano partopreni plene en la kultura kaj arta vivo, kaj subtenas la organizadon por tio de taŭgaj rimedoj de libertempo kaj rekreivaj agadoj, artaj kaj kulturaj, en kondiĉoj de egaleco.

ARTIKOLO 32

1. La subskribintaj ŝtatoj rekonas la rajton de la infano esti protektata kontraŭ ekonomia ekspluatado kaj ne esti submetata al ia laboro kun riskoj aŭ povanta ĝeni ĝian edukadon aŭ malutili al ĝia korpa, mensa, spirita, morala aŭ sociala evoluo.
2. La subskribintaj ŝtatoj faras leĝdonajn, administraciajn, socialajn kaj edukajn disponojn por certigi la aplikadon de tiu ĉi artikolo. Por tio, kaj konsidere al la tiurilataj dispozicioj de la aliaj internaciaj instrumentoj, la subskribintaj ŝtatoj, aparte:
 - a) Fiksas minimuman aĝon aŭ minimumajn aĝojn por permeso al dungo;

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

- b) Starigas taŭgan reglamenton de la laborhoroj kaj dungokondiĉoj;
- c) Starigas punojn aŭ aliajn taŭgajn sankciojn por certigi la efektivan aplikadon de tiu ĉi artikolo;

ARTIKOLO 33

La subskribintaj ŝtatoj faras ĉiujn taŭgajn disponojn, inkluzive de leĝdonaj, administraciaj, socialaj kaj edukaj, por protekti la infanojn kontraŭ la nepermesata uzado de nar-kotaĵoj kaj psiĥotropaj substancoj, kiajn difinas la tiurilataj internaciaj konvencioj, kaj por malhelpi ke infanoj estu uzataj por nepermesataj produktado kaj komerco de tiuj substancoj.

ARTIKOLO 34

La subskribintaj ŝtatoj promesas protekti la infanon kontraŭ ĉiuj formoj de seksa ekspluatado kaj de seksa perforto. Tiucele la ŝtato faras aparte ĉiujn taŭgajn disponojn sur nacia, duflanka kaj multflanka ebenaĵoj por malhelpi:

- a) Ke infanoj estu instigataj aŭ devigataj okupiĝi pri kontraŭleĝa seksa agado;
- b) Ke infanoj estu ekspluatataj cele al prostituado aŭ aliaj kontraŭleĝaj seksaj praktikoj;
- c) Ke infanoj estu ekspluatataj cele al produktado de pornografiaj spektakloj aŭ materialo.

ARTIKOLO 35

La subskribintaj ŝtatoj faras ĉiujn taŭgajn disponojn sur nacia, duflanka kaj multflanka ebenaĵoj por malhelpi forkondukon, vendon aŭ komercon de infanoj por kia ajn celo kaj en kia ajn formo.

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

ARTIKOLO 36

La subskribintaj ŝtatoj protektas la infanon kontraŭ ĉiuj aliaj formoj de ekspluatado malutilaj al ĉia aspekto de ĝia bonfarto.

ARTIKOLO 37

La subskribintaj ŝtatoj zorgas pri tio ke:

- a) Neniu infano estu submetata al torturo nek al punoj aŭ traktadoj kruelaj, malhumanaj aŭ humiligaj; devas nek mortpuno nek dumviva enprizonigo sen ebleco de liberiĝo esti la verdikto por leĝorompoj faritaj de personoj malpli ol 18-jaraĝaj;
- b) Neniu infano estu kontraŭleĝe aŭ arbitre senigita de libereco: aresto, mallibereco aŭ enprizonigo de infano devas esti konforma kun la leĝo, esti nur dispono de lasta ebleco kaj kiom eble plej mallonga;
- c) Ĉiu infano senigita de libereco estu traktata kun humaneco kaj kun la respekto ŝuldata al la digno de la homa persono, kaj en maniero konsideranta la bezonon de la personoj de ĝia aĝo: aparte, ĉiu infano senigita de libereco estu disigota de la plenkreskuloj, almenaŭ se oni ne juĝas preferinda ne fari tion en la supera intereso de la infano, kaj ĝi havas la rajton resti en kontakto kun sia familio per korespondado kaj per vizitoj, escepte de esceptaj cirkonstancoj;
- ĉ) *[alilingve: d]* La infanoj senigitaj de libereco havu la rajton havi rapide aliron al jura helpo aŭ al ĉia taŭga helpo, same kiel la rajton kontesti la laŭleĝecon de sia senigo de libereco antaŭ tribunalo aŭ alia aŭtoritato kompetenta, sendependa kaj senpartieca, kaj ke rapida decido estu farita pri tio.

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

ARTIKOLO 38

1. La subskribintaj ŝtatoj promesas respekti kaj respektigi la regulojn de la internacia humana juro kiuj estas aplikendaj al ili en kazo de armita konflikto kaj kies protekto etendiĝas al la infanoj.
2. La subskribintaj ŝtatoj faras ĉiujn eblajn disponojn en la praktiko por zorgi pri tio ke la personoj kiuj ne atingis la aĝon de 15 jaroj ne partoprenu rekte en la militaĵoj.
3. La subskribintaj ŝtatoj rezignas rekruti en siaj armitaj fortoj ĉian personon kiu ne atingis la aĝon de 15 jaroj. Kiam ili aligas personojn pli ol 15-jarajn sed malpli ol 18-jarajn, la subskribintaj ŝtatoj klopodas por anigi prioritate la plej aĝajn.
4. Konforme al la devigo kaŭze de la internacia humana juro protekti la civilan loĝantaron en kazo de armita konflikto, la subskribintaj ŝtatoj faras ĉiajn eblajn disponojn en la praktiko por ke la infanoj kiuj estas tuŝataj de armita konflikto ĝuu protekton kaj prizorgadon.

ARTIKOLO 39

La subskribintaj ŝtatoj faras ĉiujn taŭgajn disponojn por faciligi la korpan kaj psihan readaptiĝon kaj la socialan readaptiĝon de ĉiu infano viktimo de ĉia formo de neglekto, de ekspluatado aŭ de brutalaj, de torturo aŭ de ĉia alia formo de punoj aŭ traktadoj kruelaj, malhumanaj aŭ sendignigaj, aŭ de armita konflikto. Tiu readaptado kaj tiu sociala readaptado okazas en kondiĉoj kiuj favoras la sanon, la memrespekton kaj la dignon de la infano.

ARTIKOLO 40

1. La subskribintaj ŝtatoj rekonas al ĉiu infano suspekta-

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

ta, akuzata aŭ konviktita je rompo de la punleĝo la rajton je traktado kapabla favori ĝian senton de digno kaj de la persona valoro, fortiĝi ĝian respekton por la homrajtoj kaj la fundamentaj liberecoj de aliuloj, kaj kiu konsideru ĝian aĝon kaj la neceson faciligi ĝian re-adaptiĝon en la socion kaj igi ĝin transpreni konstruiv-an rolon sine de tiu.

2. Tiucele, kaj konsidere al la tiurilataj dispozicioj de la internaciaj dokumentoj, la subskribintaj ŝtatoj zorgas aparte pri tio:

a) Ke neniu infano estu suspektata, akuzata aŭ konviktita je lezoj de la punleĝo pro agoj aŭ preterlasoj kiuj ne estis malpermesitaj de la nacia aŭ internacia juro en la momento en kiu ili estis faritaj;

b) Ke ĉiu infano suspektata aŭ akuzita pri lezo de la punleĝo havu almenaŭ la rajton je sekvaj garantioj:

I - esti supozata senkulpa ĝis kiam ĝia kulpo estu laŭleĝe pruvita;

II - esti informata en kiom eble plej mallonga tempo kaj rekte pri la akuzoj kontraŭ ĝi, aŭ, laŭ la okazo, pere de siaj gepatroj aŭ laŭleĝaj reprezentantoj, kaj profiti juran helpon aŭ alian helpon taŭgan por la preparo kaj prezentado de sia defendo.

III - ke ĝia kaŭzo estu aŭdata senprokraste de kompetentaj aŭtoritata aŭ jura instanco, sendependaj kaj senpartiecaj, laŭ proceduro justa laŭ la leĝo, en ĉeesto de ĝia jura aŭ alia konsilisto kaj, se tio ne estas juĝata kontraŭ la supera intereso de la infano pro nome ĝia aĝo aŭ pro ĝia situacio, en ĉeesto de ĝiaj gepatroj aŭ laŭleĝaj reprezentantoj;

IV - ne esti devigata atesti aŭ konfesi esti kulpa; pride-mandi aŭ pridemandigi la kulpigajn atestantojn, kaj

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

atingi la aperon kaj pridemandadon de atestantoj pri senkulpeco en la kondiĉoj de egaleco;

V - se estas pruvite ke li lezis la punleĝon, apelacii pri tiu decido kaj pri ĉiu dispono sekve decidita antaŭ kompetentaj aŭtoritato aŭ supera jura instanco, sendependaj kaj senpartiecaj, konforme al la leĝo;

VI - uzi senpage la helpon de buŝtradukisto se ĝi ne komprenas aŭ ne parolas la uzatan lingvon;

VII - ke ĝia privata vico estu plene respektata en ĉiuj stadioj de la proceduro.

3. La subskribintaj ŝtatoj klopodas por subteni la adopton de leĝoj, de proceduroj, la starigon de aŭtoritatoj kaj de institucioj speciale konceptitaj por la infanoj suspektataj, akuzitaj aŭ konviktitaj je lezo de la punleĝo, kaj aparte:

a) Difini minimuman aĝon sub kiu la infanoj estos supozataj ne havi la kapablon lezi la punleĝon;

b) Fari disponojn, ĉiam kiam eblas kaj dezirindas, por trakti tiujn infanojn sen uzi la juran proceduron, tamen sur la bazo ke la homrajtoj kaj la leĝaj garantioj devas esti plene respektataj.

4. Tuta gamo da disponoj, koncerne nome la prizorgadojn, la orientadon kaj la prigardadon, la konsilojn, la provan interrompon, la lokadon en familio, la programojn de ĝenerala kaj profesio edukado kaj la solvojn aliajn ol instituciajn estos disponigata por certigi al la infanoj traktadon konforman al ilia bonfarto kaj proporcion al ilia situacio kaj al la lezo.

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

ARTIKOLO 41

Neniu el la dispozicioj de tiu ĉi konvencio atencas la dispoziciojn pli taŭgajn por la realigo de la infanrajtoj kiuj povas troviĝi:

- a) En la leĝaro de subskribinta ŝtato;
- b) En la internacia juro valida por tiu ŝtato.

ARTIKOLO 42

La subskribintaj ŝtatoj promesas larĝe konatigi la principojn kaj la dispoziciojn de tiu ĉi konvencio, per aktivaj kaj taŭgaj rimedoj, al la plenkreskuloj kiel al la infanoj.

ARTIKOLO 43

1. Por ekzameni la progresojn faritaj de la subskribintaj ŝtatoj en plenumado de la devoj interkonsentitaj de ili kaŭze de tiu ĉi konvencio, estas instituciigita Komitato pri Infanrajtoj kiu plenumas la ĉi-poste difinitajn funkciojn.
2. La komitato konsistas el 10 fakuloj de alta moraleco kaj posedantaj agnoskatan kompetenton en la kampo celata de tiu ĉi konvencio. Ĝiaj membroj estas elektitaj de la subskribintaj ŝtatoj el inter ties civitanoj kaj kunsidas persone, konsidere al la neceso certigi justan geografian reprezentiĝon kaj al la precipaj juraj sistemoj.
3. La membroj de la Komitato estas elektataj per sekreta voĉdonado el listo de personoj nomumitaj de la subskribintaj ŝtatoj. Ĉiu ŝtato povas nomumi unu kandidaton el inter siaj civitanoj.
4. La unua elekto okazos ene de ses monatoj post la ekvalido de tiu ĉi konvencio. La elektoj okazos poste ĉiujn du jarojn. Almenaŭ kvar monatojn antaŭ la dato de

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

ĉiu elekto, la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj invitas skribe la subskribintajn ŝtatojn proponi siajn kandidatojn ene de du monatoj. La Ĝenerala Sekretario starigas poste la alfabetan liston de la tiel nomumitaj kandidatoj, indikante la subskribintajn ŝtatojn kiuj nomumis ilin, kaj transdonas ĝin al la ŝtatoj subskribintaj tiun ĉi konvencion.

5. La elektoj okazas dum la kunvenoj de la subskribintaj ŝtatoj, kunvokitaj de la Ĝenerala Sekretario en la sidejo de la Unuiĝintaj Nacioj. En tiuj kunvenoj, por kiuj la kvorumo estas du trionoj de la subskribintaj ŝtatoj, la kandidatoj elektitaj al la Komitato estas tiuj kiuj akiras la plej grandan nombron da voĉoj kaj la absolutan plimulton de la voĉoj de la ĉeestantaj kaj voĉdonantaj subskribintaj ŝtatoj.
6. La membroj de la Komitato estas elektitaj por kvar jaroj. Ili reelekteblas se ilia kandidateco estas denove prezentita. La mandato de kvin el la membroj elektitaj dum la unua elekto ĉesas post du jaroj. La nomoj de tiuj kvin membroj estas lote difinitaj de la prezidanto de la kunveno tuj post la unua elekto.
7. Kaze de forpaso aŭ de demisio de membro de la Komitato, aŭ se, pro ia alia kaŭzo, membro deklaras ne povi plu plenumi siajn funkciojn en la Komitato, la subskribinta ŝtato, kiu prezentis lian kandidatecon, nomumas alian fakulon el inter siaj civitanoj por okupi la tiel vakan postenon ĝis la ĉeso de la koncerna mandato, sub rezervo de aprobo de la Komitato.
8. La Komitato adoptas sian internan regularon.
9. La Komitato elektas sian buroon por dujara periodo.
10. La kunvenoj de la Komitato okazas normale en la sidejo de la Unuiĝintaj Nacioj, aŭ en ia alia taŭga loko determinata de la Komitato. La Komitato kunvenas

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

normale ĉiujare. La daŭro de ĝiaj kunsidoj estas determinata kaj modifata, se necese, de kunveno de la ŝtatoj subskribintaj tiun ĉi konvencion, sub rezervo de aprobo de la Ĝenerala Asembleo.

11. La Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj disponigas al la Komitato la personaron kaj la instalaĵojn kiuj necesas por ke ĝi plenumu efike la funkciojn pri kiuj ĝi estas taskita kaŭze de tiu ĉi konvencio.
12. La membroj de la Komitato starigita kaŭze de tiu ĉi konvencio ricevas, kun aprobo de la Ĝenerala Asembleo, kompensajn salajrojn deprenatajn el la resursoj de la Unuiĝintaj Nacioj en la kondiĉoj kaj laŭ la reĝimoj fiksitaj de la Ĝenerala Asembleo.

ARTIKOLO 44

1. La subskribintaj ŝtatoj promesas submeti al la Komitato, per intermeto de la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj, raportojn pri la disponoj kiujn ili adoptis por efektiviĝi la rajtojn rekonatajn en tiu ĉi konvencio kaj pri la progresoj realigitaj en la uzado de tiuj rajtoj:
 - a) Ene de du jaroj ekde la ekvalido de tiu ĉi konvencio por la interesataj subskribintaj ŝtatoj,
 - b) En la sekvo ĉiujn du jarojn.
2. La raportoj faritaj en apliko de tiu ĉi artikolo devas, laŭ la okazo, indiki la faktorojn kaj la malfacilaĵojn kiuj malhelpas la subskribintajn ŝtatojn plenumi plene la devojn menciitajn en tiu ĉi konvencio. Ili devas ankaŭ enhavi sufiĉajn informojn por doni al la Komitato precizan ideon pri la aplikado de la konvencio en la konsiderata lando.
3. La subskribintaj ŝtatoj, post esti prezentintaj al la Komitato kompletan komencan raporton, ne devas, en la

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

raportoj kiujn ili poste prezentas konforme al la alineo b) de la paragrafo 1, ripeti la bazajn informojn antaŭe transdonitajn.

4. La Komitato povas peti al la subskribintaj ŝtatoj ĉiajn komplementajn informojn koncerne la aplikadon de la konvencio.
5. La Komitato submetas ĉiujn du jarojn al la Ĝenerala Asembleo, per intermeto de la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro, raporton pri siaj agadoj.

ARTIKOLO 45

Por helpi la efektivan aplikadon de la konvencio kaj stimuli la internacian kunlaboradon ĉi-kampe celatan de la konvencio:

- a) La specialaj institucioj, la UNICEF kaj aliaj organoj de la Unuiĝintaj Nacioj havas la rajton reprezentigi sin dum la ekzameno de la aplikado de la dispozicioj de tiu ĉi konvencio kiuj koncernas ilian mandaton. La Komitato povas inviti la specialajn instituciojn, la UNICEF kaj ĉiujn aliajn kompetentajn organismojn kiujn ĝi juĝas taŭgaj por doni sian specialan opinion pri la aplikado de la konvencio en la kampoj kiuj koncernas ilian respektivan mandaton. Ĝi povas peti la specialajn instituciojn, la UNICEF kaj aliajn organojn de la Unuiĝintaj Nacioj prezenti al ĝi raportojn pri la aplikado de la konvencio en la sektoroj kiuj koncernas ilian agadkampon.
- b) La Komitato transdonas, se ĝi juĝas tion necesa, al la specialaj institucioj, al la UNICEF kaj al la aliaj kompetentaj organismoj ĉian raporton de la subskribintaj ŝtatoj entenanta demandon aŭ indikanta bezonon de konsilo aŭ de teĥnika helpo, akompanatan, laŭ la okazo, de la observoj kaj proponoj de la Komitato tuŝantaj

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

tiun peton aŭ indikon.

c) La Komitato povas rekomendi al la Ĝenerala Asembleo peti la Ĝeneralan Sekretarion okazigi esploraĵojn pri la specifaj demandoj tuŝantaj la infanrajtojn.

ĉ) [*alilingve: d*] La Komitato povas fari ĝeneralajn proponojn kaj rekomendojn bazitajn sur la informoj ricevitaj en aplikado de la artikoloj 44 kaj 45 de tiu ĉi Konvencio. Tiuj ĝeneralaj proponoj kaj rekomendoj estas transdonataj al ĉiuj interesata ŝtato kaj portotaj al la atento de la Ĝenerala Asembleo, akompanate, laŭ la okazo, de la observoj de la subskribintaj ŝtatoj.

ARTIKOLO 46

Tiu ĉi konvencio estas malfermita al subskribo de ĉiuj ŝtatoj.

ARTIKOLO 47

Tiu ĉi konvencio estas submetita al ratifo. La ratifaj dokumentoj estos deponataj.

ARTIKOLO 48

Tiu ĉi konvencio restos malfermita por aliĝo de ĉiu ŝtato. La aliĝdokumentoj estos deponataj ĉe la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj.

ARTIKOLO 49

1. Tiu ĉi konvencio ekvalidos la tridekan tagon post la dato de la depono ĉe la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj de la dudeka dokumento de ratifo aŭ de aliĝo.

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

2. Por ĉiu ŝtato kiu ratifos tiun ĉi konvencion aŭ aliĝos al ĝi per la depono de la dudeka ratif- aŭ aliĝ-dokumento, la konvencio ekvalidas la tridekan tagon post la depono de tiu ŝtato de sia ratif- aŭ aliĝ-dokumento.

ARTIKOLO 50

1. Ĉiu subskribinta ŝtato povas proponi amendon kaj deponi ties tekston ĉe la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj. La Ĝenerala Sekretario tiam transdonas la amendopropozicion al la subskribintaj ŝtatoj, petante ilin sciigi al li ĉu ili favoras la kunvokon de konferenco de la subskribintaj ŝtatoj por ekzamenado de tiu propono kaj por ties voĉdonado. Se, en la kvar monatoj post la dato de tiu transdono, almenaŭ triono de la subskribintaj ŝtatoj esprimas sin favore al kunvoko de tia konferenco, la Ĝenerala Sekretario kunvokos la konferencon sub la alta protekto de la Unuiĝintaj Nacioj. Ĉia amendo adoptita de la plimulto de la subskribintaj ŝtatoj ĉeestaj kaj voĉdonantaj en la konferenco estas submetota por aprobo al la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj.
2. Ĉia amendo adoptita konforme al la dispozicioj de la paragrafo 1 de tiu ĉi artikolo ekvalidas kiam ĝi estas aprobita de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj kaj akceptita de plimulto de du trionoj de la subskribintaj ŝtatoj.
3. Kiam amendo ekvalidas, ĝi havas devigan forton por la subskribintaj ŝtatoj kiuj akceptis ĝin, dum la aliaj subskribintaj ŝtatoj estas ligitaj de la dispozicioj de tiu ĉi konvencio kaj de ĉiuj antaŭaj amendoj akceptitaj de ili.

ARTIKOLO 51

1. La Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj ricevas

Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

kaj transdonas al ĉiuj ŝtatoj la tekston de la rezervoj kiuj estas faritaj de la ŝtatoj en la momento de la ratifo aŭ aliĝo.

2. Nenia rezervo malkongrua kun la temo kaj la celo de tiu ĉi konvencio estas permesata.
3. La rezervoj retireblas ĉiumomente per sciigo adresita al la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj, kiu informas pri ĝi ĉiujn ŝtatojn subskribintajn la Konvencion. La sciigo ekefikas en la dato de ĝia ricevo ĉe la Ĝenerala Sekretario.

ARTIKOLO 52

Ĉiu subskribinta ŝtato povas malaliĝi de tiu ĉi konvencio per skriba sciigo adresita al la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj. La malaliĝo ekefikas jaron post la dato en kiu la sciigo estas ricevita de la Ĝenerala Sekretario.

ARTIKOLO 53

La Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj estas la depono de tiu ĉi konvencio.

ARTIKOLO 54

La originalo de tiu ĉi konvencio, kies angla, araba, ĉina, franca, hispana kaj rusa tekstoj estas same aŭtentaj, estos deponita ĉe la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj.

Laŭ tio la subskribintaj plenrajtuloj, oficiale rajtigitaj de siaj respektivaj registaroj, subskribis tiun ĉi konvencion.

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

La Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj adoptis, la 13-an de decembro 2006, la Konvencion pri la rajtoj de handikapitoj. La konvencio estos malferma por subskribo de la ŝtatoj en la sidejo de la Unuiĝintaj Nacioj, en Novjorko, la 30-an de marto 2007.

La ŝtatoj subskribintaj tiun ĉi konvencion,

- a) Memorigante la principojn proklamitajn en la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj laŭ kiuj la rekono de la ennaskitaj digno kaj valoro al ĉiuj membroj de la homa familio kaj de iliaj egalaj kaj necedeblaj rajtoj konsistigas la fundamenton de la libereco, de la justeco kaj de la paco en la mondo,
- b) Rekonante ke la Unuiĝintaj Nacioj, en la Universala Deklaracio de la Homrajtoj kaj en la internaciaj traktatoj pri la homrajtoj, proklamis kaj interkonsentis ke ĉiu povas prave pretendi ĉiujn rajtojn kaj ĉiujn liberecojn kiuj estas tie eldiritaj, sen ajna distingo,
- c) Reasertante la universalecon, nedivideblon, interdependecon kaj nedisigeblon de ĉiuj homrajtoj kaj de ĉiuj fundamentaj liberecoj kaj la neceson garantii ilian plenan ĝuadon al la handikapitaj personoj sen distingo,
- ĉ) *[alilingve: d]* Memorigante la Internacian Traktaton pri la Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, la Internacian Traktaton pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, la In-

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

ternacian Konvencion pri Eliminado de Ĉiaj Formoj de Rasa Diskriminacio, la Konvencion kontraŭ la Torturo kaj aliaj Kruelaj, Malhumanaj aŭ Sendignigaj Punoj aŭ Traktadoj, la Konvencion pri la Infan-Rajtoj kaj la Internacian Konvencion pri la Protektado de la Rajtoj de Ĉiuj Migraj Laboristoj kaj Membroj de ilia Familio,

- d [alilingve: e] Rekonante ke la nocio de handikapo evoluas kaj ke la handikapo rezultas el la interagado inter homoj kun nekapabloj kaj la kondukataj kaj mediaj baroj kiuj malhelpas ilian efikan partoprenon en la socio surbaze de egaleco kun la aliaj,
- e [alilingve: f] Rekonante la gravecon de la principoj kaj gvidlinioj entenataj en la Monda Ago-Programo pri handikapuloj kaj en la Reguloj de la Unuiĝintaj Nacioj por Egaligo de la Ŝancoj de la Handikapuloj kaj ilia influo por instigado, ellaborado kaj taksado sur nacia, regiona kaj internaciaj niveloj de la politikoj, planoj, programoj kaj disponoj cele al strebado al egaligo de la ŝancoj de la handikapitaj personoj,
- f [alilingve: g] Substrekante ke gravas integri la kondiĉon de la handikapuloj en la trafikajn strategiojn de daŭrigebla disvolvado,
- g [alilingve: h] Rekonante ankaŭ ke ĉia diskriminacio bazita sur handikapo estas neado de la ennaskitaj digno kaj valoro de la homa persono,
- ĝ [alilingve: i] Rekonante krome la diversecon de la handikapitaj personoj,
- h [alilingve: j] Rekonante la neceson antaŭenigi kaj protekti la homrajtojn de ĉiuj handikapuloj, inkluzive de tiuj kiuj bezonas pli detalan akompanadon,
- ĥ [alilingve: k] En zorgo pro la fakto ke spite al tiuj diversaj instrumentoj kaj engaĝiĝoj, la handikapuloj

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

- estas daŭre alfrontataj al obstakloj al sia partopreno en la socio kiel ties egalaj membroj kaj estas daŭre viktimoj de rompoj de la homrajtoj en ĉiuj mondopartoj,
- i [alilingve: l] Rekonante la gravecon de la internacia kunlaborado por plibonigo de la kondiĉoj de la handikapitaj personoj en ĉiuj landoj kaj aparte en la evolulandoj,
- j [alilingve: m] Aprezante la nunajn kaj eblajn utilajn kontribuaĵojn de handikapuloj al la ĝenerala bonfarto kaj la diverseco de siaj komunumoj kaj sciante ke la antaŭenigo de la plena ĝuado de la homrajtoj kaj de la fundamentaj liberecoj fare de tiuj personoj kaj ankaŭ de tiu de ilia plena partopreno fortigos ilian senton de aparteneco kaj rimarkeble progresigos la homan, socian kaj ekonomian evoluon de iliaj socioj kaj la eliminadon de la malriĉeco,
- ĵ [alilingve: n] Rekonante la gravecon por la handikapuloj de iliaj individuaj aŭtonomeco kaj sendependeco, inkluzive de la libereco fari siajn proprajn decidojn,
- k [alilingve: o] Opinianta ke la handikapuloj devus havi la eblecon partopreni aktive en la decido-procezoj koncerne la politikojn kaj programojn, unuavice tiujn kiuj koncernas ilin rekte,
- l [alilingve: p] En zorgo pro la malfaciloj kiujn renkontas la handikapuloj, kiuj estas elmetitaj al multaj aŭ gravaj formoj de diskriminacio bazitaj sur raso, koloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ ĉia ajn alia opinio, nacia, etna, indiĝena aŭ socia deveno, financa situacio, naska deveno, aĝo aŭ ia alia situacio,
- m [alilingve: q] Rekonante ke la handikapitaj virinoj kaj knabinoj estas ofte, en sia familio kiel ekstere, elmetitaj al pli alta danĝero de perforto, de atenco al sia kor-

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

- pa integreco, de eksceso, de forlaso aŭ de prizorgado-manko, de malbona traktado aŭ de ekspluatado,
- n [alilingve: r] Rekonante ke la handikapitaj infanoj devas plene ĝui ĉiujn homrajtojn kaj ĉiujn fundamentajn liberecojn, surbaze de egaleco kun la aliaj infanoj, kaj memorigante la devigojn kiujn kontraktis tiucele la ŝtatoj subskribintaj la Konvencion pri la Infan-Rajtoj,
- o [alilingve: s] Substrekante la neceson integri la principon de egaleco de la seksoj en ĉiujn klopodojn kiuj celas antaŭenigi la plenan ĝuadon de la homrajtoj kaj de la fundamentaj liberecoj por la handikapuloj,
- p [alilingve: t] Insistante pri la fakto ke la plimulto de handikapuloj vivas en malriĉeco kaj rekonante tiurilate ke plej gravegas ataki la pereigajn efikojn de la malriĉeco por la handikapuloj,
- q [alilingve: u] Konscie ke vera protekto de la handikapitaj personoj bezonas kondiĉojn de paco kaj de sekureco bazitaj sur plena aliĝo al la celoj kaj principoj de la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj kaj sur la respekto al la instrumentoj de la homrajtoj aplikeblaj, precipe en kazo de armita konflikto aŭ de eksterlanda okupado,
- r [alilingve: v] Rekonante ke gravas ke la handikapuloj havu plenan aliron al la fizikaj, sociaj, ekonomiaj kaj kulturaj ekipaĵoj, al la sano kaj edukado kaj al la informado kaj al la komunikado por plene ĝui ĉiujn homrajtojn kaj ĉiujn fundamentajn liberecojn,
- s [alilingve: w] Konsciaj ke la individuo, ĉar ĝiaj devoj rilate la aliajn individuojn kaj al la socio al kiu ĝi apartenas, devas fari sian eblon por antaŭenigi kaj respekti la rajtojn rekonatajn en la Internacia Ĉarto de la homrajtoj,
- t [alilingve: x] Konvinkitaj ke la familio estas la natura

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

kaj fundamenta elemento de la socio kaj rajtas la protekton de la socio kaj de la ŝtato kaj ke la handikapuloj kaj iliaj familianoj devus ricevi la protekton kaj helpon necesajn por ke la familioj povu kontribui al la plena kaj egaleca ĝuado de siaj rajtoj de la handikapitaj personoj,

u [alilingve: y] Konvinkitaj ke ĝenerala kaj integrita internacia konvencio por la antaŭenigo kaj protekto de la rajtoj kaj de la digno de la handikapitaj personoj kontribuos signife al forigo de la profunda socia malavantaĝo kiun spertas la handikapitaj personoj kaj ke ĝi favorigos ilian partoprenon, surbaze de la egaleco de ŝancoj, en ĉiuj kampoj de la civila, politika, ekonomia, socia kaj kultura vivo, en la evoluintaj landoj kiel en la evolulandoj,

Interkonsentis pri la sekvo:

Artikolo unua / Celo

Tiu ĉi Konvencio havas la celon antaŭenigi, protekti kaj certigi la plenan kaj egalan ĝuadon de ĉiuj homrajtoj kaj de ĉiuj fundamentaj liberecoj fare de la handikapitaj personoj kaj antaŭenigi la respekton de ilia ennaskita digno. Per handikapitaj personoj [aŭ handikapuloj] oni komprenas personojn kiuj havas daŭrajn korpajn, mensajn, intelektajn aŭ sensajn nekapablojn, kies interagado kun diversaj baroj povas malhelpi ilian plenan kaj efektivan partoprenon en la socio surbaze de egaleco kun la aliaj.

Artikolo 2 / Difinoj

Por la celoj de tiu ĉi Konvencio oni komprenas per „komunikado“, interalie, la lingvojn, tekstajn afiŝaĵojn, la brajlon, la palpan komunikadon, la grandajn literojn, la alireblajn aŭdvidajn materialojn kaj ankaŭ la manierojn, rimedojn kaj

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

formojn de plibonigita kaj alternativa komunikado surbaze de skribaj kaj aŭdaj materialoj, simpligita lingvo kaj homa leganto, inkluzive de la alireblaj inform- kaj komunikad-teĥnologioj;

oni komprenas per „lingvo”, interalie, la parolatajn lingvojn kaj la lingvojn de signoj kaj aliajn formojn de neparolata lingvo;

oni komprenas per „diskriminacio bazita sur handikapo” ĉian diskriminacion, ekskludon aŭ restriktion bazitan sur la handikapo kiu havas la celon aŭ la efikon damaĝi aŭ neniigi la rekonon, la ĝuadon aŭ la uzadon, surbaze de egaleco kun la aliaj, de ĉiuj homrajtoj kaj de ĉiuj fundamentaj liberecoj en la politika, ekonomia, socia, kultura, civila aŭ aliaj kampoj. La diskriminacio bazita sur la handikapo entenas ĉiujn formojn de diskriminacio, inkluzive de la rifuzo de taŭga aranĝado;

oni komprenas per „taŭga aranĝado” la necesajn kaj taŭgajn modifojn kaj adaptojn kiuj ne trudas ekstermezurajn ŝarĝon aŭ ĝenon, laŭ la bezonoj en donita situacio, por certigi al la handikapuloj la ĝuadon aŭ uzadon, surbaze de egaleco kun la aliaj, de ĉiuj homrajtoj kaj de ĉiuj fundamentaj liberecoj;

oni komprenas per „universala koncepto” la koncepton de produktoj, de ekipaĵoj, de programoj kaj de servoj kiuj uzeblas de ĉiuj, laŭ ĉiuj eblecoj, sen bezoni adaptadon nek specialan konceptadon. La „universala koncepto” ne ekskludas aparatojn kaj akcesoraĵojn kiuj funkcias por apartaj kategorioj de handikapitaj personoj tie kie ili necesas.

Artikolo 3 / Ĝeneralaj principoj

La principoj de tiu ĉi konvencio estas:

- a) la respekto al la ennaskita digno, de la individua aŭtonomeco, inkluzive de la libereco fari siajn proprajn de-

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

- cidojn, kaj de la sendependeco de la personoj;
- b) la nediskriminacio;
 - c) la plenaj kaj efektivaj partopreno kaj integriĝo en la socio;
 - ĉ) [alilingve: d] la respekto al la diferenco kaj la akcepto de la handikapuloj kiel partoprenantoj en la homo diverseco kaj en la homaro;
 - d) [alilingve: e] la egaleco de la ŝancoj;
 - e) [alilingve: f] la alirebleco;
 - f) [alilingve: g] la egaleco inter viroj kaj virinoj;
 - g) [alilingve: h] la respekto al la disvolvado de la kapabloj de la handikapita infano kaj la respekto al la rajto de la handikapitaj infanoj antaŭgardi sian identecon.

Artikolo 4 / Ĝeneralaj devigoj

1. La subskribintaj ŝtatoj promesas garantii kaj instigi la plenan uzadon de ĉiuj homrajtoj kaj de ĉiuj fundamentaj liberecoj por ĉiuj handikapitaj personoj sen ajna diskriminacio bazita sur la handikapo. Tiucele ili promesas:
 - a) adopti ĉiajn taŭgajn disponojn leĝdonajn, administrajn aŭ aliajn por realigi la rajtojn rekonatajn en tiu ĉi konvencio;
 - b) fari ĉiujn taŭgajn disponojn, inkluzive de leĝdonaj disponoj, por modifi, forigi aŭ nuligi la leĝojn, regulojn, kutimojn kaj praktikojn kiuj estas fonto de diskriminacio kontraŭ handikapuloj;
 - c) konsideri la protekton kaj antaŭenigon de la homrajtoj de la handikapuloj en ĉiuj politikoj kaj en ĉiuj programoj;

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

- ĉ) [alilingve: d] deteni sin de ĉia ago kaj de ĉia praktiko malkongrua kun tiu ĉi konvencio kaj zorgi por ke la publikaj povoj kaj la institucioj agu konforme al tiu ĉi konvencio;
- d) [alilingve: e] fari ĉiajn taŭgajn disponojn por elimini la diskriminacion bazitan sur handikapo, praktikatan de ajna persono, organizo aŭ privata entrepreno;
- e) [alilingve: f] entrepreni aŭ instigi la esploradon kaj disvolvadon de havaĵoj, servoj, ekipaĵoj kaj instalaĵoj de universala koncepto, laŭ la difino donita en la artikolo 2 de tiu ĉi konvencio, kiuj devus bezoni kiom eble plej minimuman adaptiĝon kaj koston por respondi al la specifaj bezonoj de handikapuloj, instigi la proponon kaj uzadon de tiaj havaĵoj, servoj, ekipaĵoj kaj instalaĵoj kaj instigi la enigon de la universala koncepto en la disvolvadon de normoj kaj direktivoj;
- f) [alilingve: g] entrepreni aŭ instigi la esploradon kaj la disvolvadon kaj instigi la proponon kaj uzadon de novaj teĥnologioj - inkluzive de la teĥnologio de informado kaj komunikado, la helpojn al movkapablo, la aparatojn kaj aksesorajojn kaj la teĥnologiojn de helpado - kiuj estu adaptitaj al la handikapuloj, prefere je pagebla kosto;
- g) [alilingve: h] liveri al la handikapuloj alireblajn informojn koncerne la helpojn al movkapablo, la aparatojn kaj aksesorajojn kaj la teĥnologiojn de helpado, inkluzive de la novaj teĥnologioj, kiel la aliajn formojn de helpado, akompan servojn kaj ekipaĵojn;
- ĝ) [alilingve: i] instigi la formadon al la rajtoj rekonataj en tiu ĉi konvencio de la profesiuloj kaj personaro kiuj laboras kun la handikapuloj, en maniero por plibonigi la helpojn kaj servojn garantiatajn de tiuj rajtoj.
2. En la kazo de la ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj,

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

ĉiu subskribinta ŝtato promesas agi, per la maksimumo de la resursoj kiujn ĝi disponas kaj, laŭokaze, en la kadro de la internacia kunlaborado, por certigi pli kaj pli la plenan uzadon de tiuj rajtoj, kun rezervo de la devigoj eldiritaj en tiu ĉi konvencio kiuj estas tuj aplikendaj kaŭze de la internacia juro.

3. Ĉe la ellaborado kaj la realigo de la leĝoj kaj politikoj adoptitaj por apliki tiun ĉi konvencion kaj ĉe adoptado de ĉia decido pri temoj koncerne handikapulojn, la subskribintaj ŝtatoj konsultas strikte kaj partoprenigas aktive tiujn personojn, inkluzive de handikapitaj infanoj, pere de organizaĵoj kiuj reprezentas ilin.
4. Neniu el la dispozicioj de tiu ĉi konvencio atencas la dispoziciojn pli favorajn al la uzado de la rajtoj de handikapuloj kiuj povas esti parto de la leĝaro de subskribinta ŝtato aŭ en la internacia juro valida por tiu ŝtato. Ne permeseblas ajna restriktio aŭ sendevigo de la homrajtoj aŭ de la fundamentaj liberecoj rekonataj aŭ validaj en ŝtato subskribinta tiun ĉi konvencion kaŭze de leĝoj, konvencioj, reguloj aŭ kutimoj, sub preteksto ke tiu ĉi konvencio ne rekonas tiujn rajtojn kaj liberecojn aŭ rekonas ilin en malpli granda grado.
5. La dispozicioj de tiu ĉi konvencio aplikiĝas, sen ajna limigo aŭ escepto, al ĉiuj konsistigaj unuoj de la federaciaj ŝtatoj.

Artikolo 5 / Egaleco kaj nediskriminacio

1. La subskribintaj ŝtatoj rekonas ke ĉiuj personoj estas egalaj antaŭ la leĝo kaj kaŭze de tiu kaj havas sendistingan rajton je egala protekto kaj al egala profito de la leĝo.
2. La subskribintaj ŝtatoj malpermesas ĉiajn diskriminaciojn bazitajn sur handikapo kaj garantias al la handi-

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

kapuloj egalan kaj efikan juran protekton kontraŭ ĉia diskriminacio, kia ajn estas ĝia kaŭzo.

3. Por antaŭenigi la egalecon kaj elimini la diskriminacion, la subskribintaj ŝtatoj faras ĉiujn taŭgajn disponojn por fari ke taŭgaj aranĝoj estu alfarotaj.
4. La specifaj disponoj necesaj por rapidigi aŭ certigi la faktan egalecon de la handikapuloj ne konsistigas diskriminacion en la senco de tiu ĉi konvencio.

Artikolo 7 / Handikapitaj infanoj

1. La subskribintaj ŝtatoj faras ĉiajn necesajn disponojn por garantii al la handikapitaj infanoj la plenan ĝuadon de ĉiuj homrajtoj kaj de la fundamentaj liberecoj, surbaze de la egaleco kun la aliaj infanoj.
2. En ĉiuj decidoj kiuj koncernas la handikapitajn infanojn, la supera intereso de la infano devas esti antaŭrangiga konsidero.
3. La subskribintaj ŝtatoj garantias al la handikapita infano, surbaze de la egaleco kun la aliaj infanoj, la rajton libere esprimi sian opinion pri ĉia demando kiu interesas ĝin, kaj la opinioj de la infano estu deĉe konsiderataj kun konsidero de ĝia aĝo kaj grado de matureco, kaj akiri por la uzado de tiu helpon taŭgan laŭ ĝia handikapo kaj ĝia aĝo.

Artikolo 8 / Interesigo

1. La subskribintaj ŝtatoj promesas fari tujajn, efikajn kaj taŭgajn disponojn por:
 - a) interesigi la tutan socion, inkluzive sur familia nivelo, pri la situacio de la handikapuloj kaj antaŭenigi la respekton al la rajtoj kaj dignoj de la handikapitaj perso-

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

- noj;
- b) kontraŭbatali la kliŝojn, la antaŭjuĝojn kaj la danĝerajn praktikojn koncerne la handikapulojn, inkluzive de tiuj ligitaj al sekso kaj aĝo, en ĉiuj kampoj;
 - c) pli bone konatigi la kapablojn kaj kontribuaĵojn de la handikapuloj.
2. En la kadro de la disponoj kiujn ili faras tiucele, la subskribintaj ŝtatoj:
- a) lanĉas kaj faras efikajn kampanjojn de interesigo de la publiko por I) favorigi akceptemon koncerne la rajtojn de la handikapuloj; II) antaŭenigi pozitivan percepton de la handikapuloj kaj pli klaran socian konscion pri ili; III) antaŭenigi la rekono de la kompetentoj, meritoj kaj kapabloj de la handikapuloj kaj de iliaj kontribuaĵoj en sia labormedio kaj sur la labormerkato;
 - b) instigas sur ĉiuj niveloj de la eduksistemo, aparte ĉe ĉiuj infanoj ekde ilia plej juna aĝo, sintenon de respekto por la rajtoj de la handikapitaj personoj;
 - c) instigas ĉiujn komunikilojn montri la handikapulojn en aspekto kongrua kun la celo de tiu ĉi konvencio;
 - ĉ) [alilingve: d] instigas al organizado de programoj de formado koncerne interesigon pri handikapuloj kaj la rajtoj de handikapuloj.

Artikolo 9 / Alireblo

1. Por ebligi al la handikapuloj vivi sendepende kaj plene partopreni en ĉiuj aspektoj de la vivo, la subskribintaj ŝtatoj faras taŭgajn disponojn por certigi al ili, surbaze de egaleco kun la aliaj, la aliron al la konkreta medio, al transportoj, al informado kaj komunikado, inkluzive de la sistemoj de teknologio kaj de informado kaj de la komunikado, kaj al aliaj

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

ekipaĵoj kaj servoj malfermitaj aŭ liverataj al la publiko, tiel en urbaj kiel kamparaj zonoj. Tiuj disponoj, inter kiuj troviĝas la identigo kaj eliminado de obstakloj kaj baroj al alireblo, aplikiĝas, interalie:

- a) al konstruaĵoj, vojoj, transportoj kaj aliaj internaj aŭ eksteraj ekipaĵoj, inkluzive de lernejoj, loĝejoj, medicinaj instalaĵoj kaj laborlokoj;
- b) al servoj de informado, de komunikado kaj aliaj servoj, inkluzive de elektronikaj servoj kaj urĝecaj servoj.

2. La subskribintaj ŝtatoj faras ankaŭ taŭgajn disponojn por:

- a) ellabori kaj promulgi minimumajn naciajn normojn kaj direktivojn pri alireblo al instalaĵoj kaj servoj malfermitaj aŭ liverataj al la publiko kaj kontroli la aplikadon de tiuj normoj kaj direktivoj;
- b) fari tiel ke la privataj organismoj kiuj proponas instalaĵojn aŭ servojn kiuj estas malfermitaj aŭ liverataj al la publiko konsideru ĉiujn aspektojn de alireblo por handikapuloj;
- c) certigi al la koncernatoj formadon pri la alirproblemoj kiujn alfrontas handikapuloj;
- ĉ) [alilingve: d] instaligi en la konstruaĵoj kaj alia instalaĵoj malfermitaj al la publiko signaron en brajla kaj en formoj facile legeblaj kaj kompreneblaj;
- d) [alilingve: e] disponigi formojn de homa aŭ animala helpo kaj la servojn de perantoj, nome de gvidantoj, legantoj kaj profesiaj buŝtradukistoj en signolingvo, por faciligi la aliron al konstruaĵoj kaj aliaj instalaĵoj malfermitaj al la publiko;
- e) [alilingve: f] antaŭenigi aliajn taŭgajn formojn de helpo kaj de akompano de handikapuloj por certigi al ili

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

aliron al informo;

- f) [alilingve: g] antaŭenigi al aliron de handikapuloj al la novaj sistemoj de teĥnologioj de informado kaj de komunikado, inkluzive de Interreto;
- g) [alilingve: h] antaŭenigi studadon, finpretigadon, produktadon kaj distribuadon de sistemoj kaj teĥnologioj de informadiko kaj komunikado en frua stadio, en maniero por certigi la alireblecon je minimuma kosto.

Artikolo 10 / Rajto je vivo

La subskribintaj ŝtatoj reasertas ke la rajto je vivo estas ennaskita en la homa persono kaj faras ĉiujn disponojn por certigi al la handikapuloj ilian efektivan ĝuadon, surbaze de egaleco kun la aliaj.

Artikolo 11 / Situacioj de danĝero kaj situacioj de humanitara urĝeco

La subskribintaj ŝtatoj faras, konforme al iliaj devigoj kaŭze de la internacia juro, aparte la humanitara internacia juro kaj la internacia juro de homrajtoj, ĉiujn disponojn necesajn por certigi la protekton kaj sekurecon de la handikapitaj personoj en la situacioj de danĝero, inkluzive de armitaj konfliktoj, humanitaraj krizoj kaj naturkatastrofoj.

Artikolo 12 / Rekono de la jura personeco en kondiĉoj de egaleco

1. La subskribintaj ŝtatoj reasertas ke la handikapuloj havas en ĉiuj lokoj la rajton je rekono de ilia jura personeco.
2. La subskribintaj ŝtatoj rekonas ke la handikapuloj ĝuas la juran kapablon en ĉiuj kampoj, surbaze de egaleco.

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

co kun la aliaj.

3. La subskribintaj ŝtatoj faras taŭgajn disponojn por doni al la handikapuloj aliron al akompano kiun ili povas bezoni por uzi sian juran kapablon.
4. La subskribintaj ŝtatoj faras tiel ke la disponoj pri la uzado de la jura kapablo estu akompanataj de taŭgaj kaj efikaj garantioj por antaŭmalhelpi misuzojn, konforme al la internacia juro de homrajtoj. Tiuj garantioj devas garantii ke la disponoj pri la uzado de la jura kapablo respektu la rajtojn, la volon kaj la preferojn de la koncernata persono, estu sen ajna intereso-konflikto kaj okazigu nenian misuzon de influo, ke ili estu proporciaj kaj adaptitaj al la situacio de la koncernata persono, aplikiĝu dum kiom eble plej mallonga periodo kaj estu submetitaj al perioda kontrolo plenumata de sendependa kaj senpartia organo aŭ de jura instanco. Tiuj garantioj devas ankaŭ esti proporciaj al la grado en kiu la disponoj, kiuj devas faciligi la uzadon de la jura kapablo, tuŝas la rajtojn kaj interesojn de la koncernata persono.
5. Sub rezervo de la dispozicioj de tiu ĉi artikolo, la subskribintaj ŝtatoj faras ĉiujn taŭgajn kaj efikajn disponojn por garantii la rajton kiun havas la handikapuloj, surbaze de egaleco kun la aliaj, posedi havaĵojn aŭ heredi ilin, kontroli siajn financojn kaj havi aliron al la samaj kondiĉoj kiel la aliaj personoj al bankaj pruntoj, hipotekoj kaj aliaj formoj de financa kredito; ili zorgas pri tio ke la handikapuloj ne estus arbitre senigataj de siaj havaĵoj.

Artikolo 13 / Aliro al juro

1. La subskribintaj ŝtatoj certigas la efikan aliron de la handikapuloj al la juro, surbaze de egaleco kun la aliaj,

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

inkluzive pere de proceduraj aranĝoj kaj aranĝoj laŭ aĝo, por faciligi ilian efektivan partoprenon, rektan aŭ malrektan, nome kiel atestantoj, en ĉiuj juraj proceduroj en stadio de enketo kaj en la aliaj preparaj stadioj.

2. Por helpi certigi la efektivan aliron de la handikapuloj al la jursistemo, la subskribintaj ŝtatoj favoras taŭgan formadon de la personaro enironta la juran administracion, inkluzive de la personaroj de la polico kaj de la punsistemo.

Artikolo 14 / Libereco kaj sekureco de la persono

1. La subskribintaj ŝtatoj zorgas ke la handikapuloj, surbaze de egaleco kun la aliaj,
 - a) ĝuu la rajton je libereco kaj je sekureco de sia persono;
 - b) ne estu senigataj de sia libereco kontraŭleĝe aŭ arbitre; ili zorgas krome ke ĉia senigo de libereco estu konforma al la leĝo kaj ke neniakaze la ekzisto de handikapo pravigas senigon de libereco.
2. La subskribintaj ŝtatoj zorgas ke la handikapuloj, se ili estas senigataj je sia libereco sekve al ajna proceduro, havu la rajton, surbaze de egaleco kun la aliaj, je la garantioj laŭ la internacia juro de la homrajtoj kaj estu traktataj konforme al la celoj kaj principoj de tiu ĉi konvencio, inkluzive la ĝuadon de taŭgaj aranĝoj.

Artikolo 15 / Rajto ne esti submetata al torturo nek al kruelaj, malhumanaj aŭ sendignigaj punoj

1. Neniu estos submetata al torturo, nek al kruelaj, malhumanaj aŭ sendignigaj punoj. Aparte estas malpermesate submeti personon sen ties libera konsento al medicina aŭ scienca eksperimento.

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

2. La subskribintaj ŝtatoj faras ĉiajn leĝdonajn, administrajn, jurajn kaj aliajn disponojn efikajn por malebligi, surbaze de egaleco kun la aliaj, ke handikapuloj estu submetataj al torturo aŭ al kruelaj, malhumanaj aŭ sendignigaj punoj.

Artikolo 16 / Rajto ne esti submetata al ekspluatado, al perforto kaj al mistraktado

1. La subskribintaj ŝtatoj faras ĉiajn leĝdonajn, administrajn, sociajn, edukajn kaj aliajn disponojn taŭgajn por protekti la handikapulojn, en ilia hejmo kiel ekstere, kontraŭ ĉia formo de ekspluatado, de perforto kaj de mistraktado, inkluzive de la aspektoj bazitaj sur la sekso.
2. La subskribintaj ŝtatoj faras ankaŭ ĉiajn disponojn taŭgajn por antaŭmalhelpi ĉiajn formojn de ekspluatado, de perforto kaj de mistraktado certigante nome al la handikapitaj personoj, al ilia familio kaj al iliaj helpantoj taŭgajn formojn de helpo kaj de akompano adaptitajn al la sekso kaj al la aĝo, inkluzive disponigante al ili edukajn informojn kaj servojn pri la rimedoj ekvidi, rekoni kaj denunci la kazojn de ekspluatado, de perforto kaj de mistraktado. La subskribintaj ŝtatoj zorgas ke la protektoservoj konsideru la aĝon, sekson kaj handikapon de la koncernatoj.
3. Por antaŭmalhelpi ĉian formon de ekspluatado, perforto kaj mistraktado, la subskribintaj ŝtatoj zorgas por ke ĉiuj establoj kaj programoj destinitaj al la handikapuloj estu efektive kontrolataj de sendependaj aŭtoritatoj.
4. La subskribintaj ŝtatoj faras ĉiajn disponojn taŭgajn por faciligi la korpan, ekkonan kaj psiĥan resaniĝon, la readaptadon kaj socian reintegrigon de la handikapuloj.

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

loj kiuj estis viktimoj de ekspluatado, de perforto aŭ de mistraktado en ĉiaj formoj, nome disponigante al ili protektoservojn. La resaniĝo kaj reintegrigo okazas en medio kiu favorigas la sanon, bonfarton kaj memestimon, la dignon kaj aŭtonomecon de la persono kaj kiu konsideras la specifajn bezonojn ligitajn kun la sekso kaj la aĝo.

5. La subskribintaj ŝtatoj starigas efikajn leĝaron kaj politikojn, inkluzive de leĝoj kaj politikoj aksitaj sur la virinoj kaj la infanoj, kiuj garantias ke la kazoj de ekspluatado, de perforto kaj de mistraktado rilate handikapuloj estu eltrovataj, estu enketataj kaj laŭokaze persekutataj.

Artikolo 17 / Protekto de la integreco de la persono

1. La subskribintaj ŝtatoj rekonas al la handikapitaj personoj, surbaze de egaleco kun la aliaj, la rajton cirkuli libere, la rajton elekti libere sian loĝlokon kaj la rajton je ŝtataneco, kaj ili zorgas nome por ke la handikapitoj:
 - a) havu la rajton akiri ŝtatanecon kaj ŝanĝi la ŝtatanecon kaj ne estu senigataj je sia ŝtataneco arbitre aŭ pro sia handikapo;
 - b) ne estus senigataj, pro sia handikapo, je la kapablo akiri, posedi kaj uzi titolojn atestantajn pri ilia ŝtataneco aŭ aliajn titolojn de identeco aŭ uzi trafikajn jurajn procedurojn, kiel la procedurojn de enmigrado, kiuj povas esti necesaj por faciligi la uzadon de la rajto libere cirkuli;
 - c) ne estu senigataj, arbitre aŭ pro sia handikapo, je la rajto eniri sian propran landon.
2. La handikapitaj infanoj estas registritaj tuj post sia na-

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

skiĝo kaj havas ekde tiu nomon, la rajton akiri ŝtatanecon kaj, kiom eble plej, la rajton koni siajn gepatrojn kaj esti kreskigataj de ili.

Artikolo 19 / Aŭtonomeco de vivo kaj inkludo en la socio

La ŝtatoj subskribintaj tiun ĉi Konvencion rekonas al ĉia handikapita persono la rajton vivi en la socio, kun la sama libereco de elekto kiel la aliaj personoj, kaj faras efikajn kaj taŭgajn disponojn por faciligi al la handikapuloj la plenan ĝuadon de tiu rajto kaj de sia plena integriĝo kaj partopreno en la socio, nome per zorgado ke:

- a) la handikapuloj havu la eblecon elekti, surbaze de egaleco kun la aliaj, sian loĝlokon kaj kie kaj kun kiu ili volas vivi kaj ke ili ne estu devigataj vivi en medio de aparta vivo;
- b) la handikapuloj havu aliron al gamo de servoj hejmaj aŭ en establoj kaj al aliaj sociaj akompan-servoj, inkluzive de la persona helpo necesa por ebligi al ili vivi en la socio kaj integriĝi en ĝi kaj por malhelpi ke ili estu izolitaj aŭ viktimoj de disigo;
- c) la sociaj servoj kaj ekipaĵoj destinitaj al la ĝenerala loĝantaro estu disponigataj al la handikapuloj, surbaze de egaleco kun la aliaj, kaj estu adaptitaj al iliaj bezonoj.

Artikolo 20 / Persona movkapablo

La subskribintaj ŝtatoj faras efikajn disponojn por certigi la personan movkapablon de la handikapuloj, en la kiom eble plej granda aŭtonomeco, inkluzive de:

- a) faciligo de la persona movkapablo de la handikapuloj laŭ la manieroj kaj en la momento kiujn ili elektas, kaj

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

je pagebla kosto;

- b) faciligo de la aliro de la handikapuloj al helpoj por movkapablo, aparatoj kaj akcesoraĵoj, help-teĥnologioj, formoj de homa aŭ animala helpo kaj altkvalita perantoj, tiamaniere ke ilia kosto estu pagebla;
- c) formado de la handikapuloj, kaj de la specialiĝinta personaro kiu laboras kun ili, pri la teĥnikoj de movkapablo;
- d) instigo al la organismoj kiuj produktas helpojn al movkapablo, aparatojn kaj akcesoraĵojn kaj help-teĥnologiojn konsideri ĉiujn aspektoj de la movkapablo de handikapuloj.

Artikolo 21 / Esprim- kaj opini-libereco kaj aliro al informo

La subskribintaj ŝtatoj faras ĉiajn disponojn taŭgajn por ke la handikapuloj povu uzi la rajton je esprim- kaj opini-libereco, inkluzive de la libereco peti, ricevi kaj komuniki informojn kaj ideojn, surbaze de egaleco kun la aliaj kaj per ĉiuj komunikiloj de ilia elekto laŭ la senco de la artikolo 2 de tiu ĉi Konvencio. Tiucele, la subskribintaj ŝtatoj:

- a) komunikas la informojn destinitajn al la granda publiko al la handikapuloj, senprokraste kaj sen kromaj elspezoj por ili, en alireblaj formoj kaj per teĥnologioj adaptitaj al la diversaj tipoj de handikapo;
- b) akceptas kaj faciligas la uzadon de la handikapuloj, por siaj oficialaj demarŝoj, de la signolingvo, de brajlo, de plibonigita kaj alternativa komunikado kaj de ĉiuj aliaj alireblaj komunik-rimedo, -manieroj kaj -formoj de ilia elekto;
- c) insiste petas la privatajn organismojn kiuj disponigas servojn al la publiko, inkluzive per Interreto, doni in-

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

formojn kaj servojn en formoj alireblaj por la handikapuloj kaj kiujn tiuj povu uzi;

- ĉ) *[alilingve: d]* instigas la komunikilojn, inkluzive tiujn kiuj komunikas siajn informojn per Interreto, alirebligis siajn servojn al la handikapuloj;
- d) *[alilingve: e]* rekonas kaj favorigas la uzadon de la signolingvoj.

Artikolo 22 / Respekto de la privata vivo

1. Neniu handikapulo, kiu ajn estas lia loĝloko aŭ vivmedio, estos celo de arbitraj aŭ kontraŭleĝaj enmiksiĝoj en sian privatan vivon, sian familion, sian hejmon aŭ sian korespondadon aŭ alispecajn komunikaĵojn nek de kontraŭleĝa atenco al sia honoro kaj al sia famo. La handikapuloj havas la rajton je protekto de la leĝo kontraŭ tiaj enmiksiĝoj aŭ tiaj atencoj.
2. La subskribintaj ŝtatoj protektas la konfidencecon de la personaj informoj kaj de la informoj pri la sano kaj readaptado de la handikapuloj, surbaze de egaleco kun la aliaj.

Artikolo 23 / Respekto de la hejmo kaj de la familio

1. La subskribintaj ŝtatoj faras efikajn kaj taŭgajn dispozojn por elimini la diskriminacion de la handikapuloj en ĉio kio koncernas geedzecon, familion, gepatrajn funkciojn kaj personajn rilatojn, surbaze de egaleco kun la aliaj, kaj zorgas por ke:
 - a) estu rekonata al ĉiu handikapulo, ekde la seksmatura aĝo, la rajto edz(in)iĝi kaj fondi familion surbaze de la libera kaj plena konsento de la estontaj geedzoj;
 - b) estu rekonata al la handikapuloj la rajto decidi, libere

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

- kaj ĉion sciante pri la afero, pri la nombro da siaj infanoj kaj pri la interspaco de la naskoj kaj ke la rajto havi aliron, en maniero taŭga por ilia aĝo, al informado kaj edukado pri generado kaj famili-planado; kaj ke la rimedoj necesaj por la uzado de tiuj rajtoj estu al ili donataj;
- c) la handikapuloj, inkluzive de la infanoj, konservu sian fekundecon, surbaze de egaleco kun la aliaj.
 2. La subskribintaj ŝtatoj garantias la rajtojn kaj respondecon de la handikapuloj rilate prizorgecon, kuratorecon, gardado kaj adoptado de infanoj aŭ de similaj institucioj, kiam tiuj institucioj ekzistas en la nacia leĝaro; ĉiukaze la supera intereso de la infano estas la unuaranga konsidero. La subskribintaj ŝtatoj donas taŭgan helpon por la handikapuloj en la uzado de iliaj gepatraj respondecoj.
 - 3.) La subskribintaj ŝtatoj zorgas por ke la handikapitaj infanoj havu la egalajn rajtojn en sia familia vivo. Cele al la uzado de tiuj rajtoj kaj por antaŭmalhelpi kaŝadon, forlason, nezorgadon kaj disigon de la handikapitaj infanoj, la subskribintaj ŝtatoj promesas liveri al la handikapitaj infanoj kaj al iliaj familioj, en frua stadio, larĝan gamon da informoj kaj servoj, inter kiuj servojn de akompanado.
 4. La subskribintaj ŝtatoj zorgas por ke neniu infano estu kontraŭvole disigita de siaj gepatroj, escepte se la kompetentaj aŭtoritatoj, sub rezervo de jura kontrolo, decidas, konforme al la aplikendaj rajtoj kaj proceduroj, ke tia disigo necesas en la supera intereso de la infano. Neniuokaze infano povas esti disigita de siaj gepatroj pro sia handikapo aŭ la handikapo de unu el siaj du gepatroj.
 5. La subskribintaj ŝtatoj promesas, kiam la rekta familio

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

ne kapablas okupiĝi pri handikapita infano, ne ŝpari ajnan klopodon por certigi la prizorgadon de la infano fare de la pli larĝa familio kaj, se tio ne eblas, en familia kadro sine de la komunumo.

Artikolo 24 / Edukado

1. La subskribintaj ŝtatoj rekonas la rajton de la handikapuloj je edukado. Por certigi la uzadon de tiu rajto sen diskriminacie kaj surbaze de la ŝanc-egaleco, la subskribintaj ŝtatoj faras tiel ke la eduksistemo zorgu pri lerneja frekventado sur ĉiuj niveloj kaj donas, dum la tuta vivo, edukeblecojn kiuj celas:
 - a) la plenan disvolvadon de la homa potencialo kaj de la sento de digno kaj memestimo, kaj la fortigon de la respekto de la homrajtoj, de la fundamentaj liberecoj kaj de la homa diverseco;
 - b) la disvolvadon de la personeco de la handikapuloj, de iliaj talentoj kaj de ilia krekapablo kiel de iliaj mensaj kaj korpaj kapabloj, en la tuta mezuro de iliaj eblecoj;
 - c) la efektivan partoprenon de la handikapuloj en libera socio.
2. Cele al uzado de tiu rajto, la subskribintaj ŝtatoj zorgas ke:
 - a) la handikapuloj ne estu ekskluditaj, surbaze de sia handikapo, el la ĝenerala instrusistemo kaj ke la handikapitaj infanoj ne estu ekskluditaj, surbaze de sia handikapo, el la senpaga kaj deviga primara instruado aŭ el la sekundara instruado;
 - b) la handikapuloj povu, surbaze de egaleco kun la aliaj, aliri, en la komunumoj kie ili vivas, primaran instruadon inkludan, altkvalitan kaj senpagan, kaj sekundaran instruadon;

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

- c) estu farataj taŭgaj aranĝoj laŭ la bezonoj de ĉiu;
 - ĉ) [alilingve: d] la handikapuloj ĝuu, sine de la ĝenerala instrusistemo, la necesan akompanadon por faciligi ilian efektivan edukadon;
 - d) [alilingve: e] individuecaj kaj efikaj disponoj de akompanado estu farataj en la ĉirkaŭaĵoj kiuj plejbonigas la lernejan progreson kaj la ensociiĝon, konforme al la celo de plena integriĝo.
3. La subskribintaj ŝtatoj donas al la handikapitaj personoj la eblecon akiri la necesajn praktikajn kaj sociajn kompetentojn tiel ke faciligu ilia plena kaj egala partopreno en la instrusistemo kaj en la vivo de la komunumo. Tiucele, la subskribintaj ŝtatoj faras taŭgajn disponojn, kaj nome:
- a) faciligas la lernadon de brajlo, de adaptita skribo kaj manierojn, rimedojn kaj formojn de plibonigita kaj alternativa komunikado, la disvolvadojn de la orientiĝkaj moviĝ-kapabloj, kaj la subtenon de la interhelpanoj kaj de la interhelp-sistemo;
 - b) faciligas la lernadon de la signolingvo kaj la subtenon al lingva identeco de surduloj;
 - c) zorgas ke la blinduloj, surduloj aŭ surdblinduloj - kaj speciale la infanoj - ricevu instruadon en la lingvo kaj per la komunik-manieroj kaj -rimedoj kiuj taŭgas plej bone por ĉiu, kaj tion, en medioj kiuj plejbonigas la lernprogreson kaj la ensociiĝon.
4. Por faciligi la uzadon de tiu rajto, la subskribintaj ŝtatoj faras taŭgajn disponojn por dungi instruistojn, inkluzive de handikapitaj instruistoj, kiuj havas kompetenton pri signolingvo aŭ brajlo kaj por formi la edukajn kadrojn kaj personarojn sur ĉiuj niveloj. Tiu formado entenas la interesigon pri handikapo kaj uzadon de

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

manieroj, rimedoj kaj formoj de plibonigita kaj alternativa komunikado kaj de la pedagogiaj teĥnikoj kaj materialoj adaptitaj al handikapuloj.

5. La subskribintaj ŝtatoj zorgas por ke la handikapuloj povu aliri, sen diskriminacio kaj surbaze de egaleco kun la aliaj, al la ĝenerala tria instrusistemo, al profesia formado, al instruado por plenkreskuloj kaj al pluformado. Tiucele ili zorgas por ke taŭgaj aranĝoj estu farataj favore al handikapuloj.

Artikolo 25 / Sano

La subskribintaj ŝtatoj rekonas ke la handikapuloj havas la rajton ĝui la kiom eble plej bonan sanstaton sen diskriminacio bazita sur la handikapo. Ili faras ĉiujn taŭgajn disponojn por certigi al ili la aliron al la sanservoj kiuj konsideras la seksajn specifojn, inkluzive de la servoj de readaptiĝo. Speciale, la subskribintaj ŝtatoj:

- a) donas al la handikapuloj senpagajn aŭ pageblajn sanservojn kiuj kovras la saman gamon kaj la saman kvaliton kiel tiuj donataj al aliaj personoj, inkluzive de la servoj de seksa kaj genera sano kaj komunumaj programoj de publika sano;
- b) donas al la handikapuloj la sanservojn kiujn ili bezonas pro sia specifa handikapo, inkluzive de la servo de frua eltrovado kaj, laŭokaze, de frua interveno, kaj la servojn destinitajn kiom eble plej redukti aŭ antaŭmalhelpi la novajn handikapojn, nome ĉe infanoj kaj maljunuloj;
- c) donas tiujn servojn al la handikapuloj kiom eble proksime de ilia komunumo, ankaŭ en kampara medio;
- ĉ) [alilingve: d] postulas de la san-profesiuloj ke ili donu al la handikapuloj samkvalitajn prizorgadojn kiel tiuj

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

donataj al la aliaj, kaj aparte ke ili akiru la liberan kaj kleran konsenton de la koncernataj handikapuloj; tiucele la subskribintaj ŝtatoj faras agadojn de formado kaj promulgas regulojn de profesia moralo por la publikaj kaj privataj sansektoroj taŭgaj por, interalie, interesi la personarojn pri la homrajtoj, la digno, la aŭtonomeco kaj la bezonoj de la handikapuloj;

d) [alilingve: e] malpermesas en la sektoro de la asekuroj la diskriminacion kontraŭ handikapuloj, kiuj devas povi akiri je justaj kondiĉoj malsan-asekuron kaj, en la landoj kie ĝi estas permesata per nacia juro, viv-asekuron;

e) [alilingve: f] malhelpas ĉian diskriminacian rifuzon doni medicinajn prizorgojn aŭ servojn aŭ nutraĵojn aŭ likvaĵojn pro handikapo.

Artikolo 26 / Adaptiĝo kaj readaptiĝo

1. La subskribintaj ŝtatoj faras efikajn kaj taŭgajn dispozojn, nome per intervenigo de interhelpo inter interhelpantoj, por ebligi al la handikapuloj atingi kaj konservi la maksimumon da aŭtonomeco, realigi plene sian korpan, mensan, socian kaj profesionan kapablon kaj atingi la plenan integriĝon kaj la plenan partoprenon laŭ ĉiuj aspektoj de la vivo. Tiucele la subskribintaj ŝtatoj organizas, fortigas kaj disvolvas diversigitajn servojn kaj programojn de adaptiĝo kaj readaptiĝo, aparte en la kampo de sano, de dungo, de edukado kaj de la sociaj servoj, tiel ke tiuj servoj kaj programoj:

a) komencu en la kiom eble plej frua stadio kaj estu bazitaj sur plurfaka taksado de la bezonoj kaj de la kapabloj de ĉiu;

b) faciligu la partoprenon kaj integriĝon en la komunumo kaj en ĉiuj aspektoj de la socio, estu libere akceptataj

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

- kaj estu disponigataj al la handikapuloj kiom eble proksime de ilia komunumo, inkluzive de kamparaj zonoj.
2. La subskribintaj ŝtatoj favoras la disvolvadon de la komenca kaj plua formado de la profesiuloj kaj personaroj kiuj laboras en la servoj de adaptiĝo kaj readaptiĝo.
 3. La subskribintaj ŝtatoj favoras la ofertadon, la konadon kaj uzadon de aparatoj kaj teĥnologioj de helpo, konceptitaj por handikapuloj, kiuj faciligas la adaptiĝon kaj readaptiĝon.

Artikolo 27 / Laboro kaj dungo

1. La subskribintaj ŝtatoj rekonas al la handikapuloj, surbaze de egaleco kun la aliaj, la rajton je laboro, nome je la ebleco perlabori sian vivon farante laboron libere elektitan aŭ akceptitan sur labormerkato kaj en medio de malferma laboro, kiu favoras la inkludon kaj alireblan al la handikapuloj. Ili garantias kaj favoras la uzadon de la rajto je laboro, inkluzive por tiuj kiuj ricevis handikapon dum dungo, farante taŭgajn disponojn, inkluzive de leĝdonaj disponoj, por nome:
 - a) malpermesi diskriminacion surbaze de handikapo en ĉio rilata kun dungo en ĉiaj formoj, nome la kondiĉoj de rekrutado, de dungado kaj dungeco, la daŭrigo en la dungo, avancado kaj la kondiĉoj de labor-sekureco kaj -higieno;
 - b) protekti la rajton de la handikapuloj ĝui, surbaze de egaleco kun la aliaj, justajn kaj favorajn laborkondiĉojn, inkluzive de ŝanc-egaleco kaj egala salajro por egala laboro, la sekureco kaj higieno sur la laborlokoj, la protekto kontraŭ ĉikanado kaj proceduroj por regulado de plendoj;

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

- c) fari tiel ke la handikapuloj povu uzi siajn profesiajn kaj sindikatajn rajtojn surbaze de egaleco kun la aliaj;
 - ĉ) [*alilingve: d*] ebligi al la handikapuloj havi efektivan aliron al la programoj de teĥnika kaj profesia orientiĝo, al la servoj de postenigo kaj la servoj de profesia pluformado ofertataj al la loĝantaro ĝenerale;
 - d) [*alilingve: e*] antaŭenigi la eblecojn de dungo kaj de avancado de handikapuloj sur la labormerkato kaj la helpon por serĉi kaj akiri dungon, por daŭrigo de la laboro kaj por reveno al laboro;
 - e) [*alilingve: f*] antaŭenigi la eblecojn de sendependa aktiveco, de entrepren-spirito kaj de organizado de kooperativoj kaj starigo de entrepreno;
 - f) [*alilingve: g*] dungi handikapulojn en la publika sektoro;
 - g) [*alilingve: h*] favori la dungon de handikapuloj en la privata sektoro starigante taŭgajn politikojn kaj disponojn, inkluzive laŭokaze de programoj de pozitiva agado, de instigoj kaj aliaj disponoj;
 - ĝ) [*alilingve: i*] fari tiel ke taŭgaj aranĝoj estu farataj en la laborlokoj favore al handikapuloj;
 - h) [*alilingve: j*] favori ke la handikapuloj akiru profesion sperton sur la ĝenerala labormerkato;
 - ĥ) [*alilingve: k*] antaŭenigi programojn de teĥnika kaj profesia readaptiĝo, de daŭrigo en dungo kaj reveno al dungo por handikapuloj.
2. La subskribintaj ŝtatoj zorgas ke la handikapuloj ne estu tenataj en sklaveco nek en servuto kaj ke ili estu protektataj, surbaze de egaleco kun la aliaj, kontraŭ truda aŭ deviga laboro.

Artikolo 28 / Adekvata vivnivelo kaj socia protekto

1. La subskribintaj ŝtatoj rekonas la rajton de la handikapuloj je adekvata vivnivelo por ili mem kaj por ilia familio, nome adekvatajn nutriĝon, vestiĝon kaj loĝadon kaj je konstanta plibonigo de iliaj vivkondiĉoj kaj faras taŭgajn disponojn por protekti kaj antaŭenigi la uzadon de tiu rajto sen diskriminacio bazita sur la handikapo.
2. La subskribintaj ŝtatoj rekonas la rajton de la handikapuloj je socia protekto kaj je ĝuado de tiu rajto sen diskriminacio bazita sur la handikapo kaj faras taŭgajn disponojn por protekti kaj antaŭenigi la uzadon de tiu rajto, inkluzive de disponoj destinitaj:
 - a) certigi al la handikapuloj la egalecon de aliro al la servoj de sana akvo kaj certigi al ili la aliron al servoj, aparatoj kaj akcesoraĵoj kaj aliaj helpoj por kontentigi la bezonojn kreitajn de ilia handikapo kiuj estu taŭgaj kaj pageblaj;
 - b) certigi al la handikapuloj, aparte al la virinoj kaj knabinoj kaj maljunuloj, la aliron al la programoj de socia protekto kaj al la programoj de reduktado de malriĉeco;
 - c) certigi al la handikapuloj kaj al iliaj familioj, kiam ili vivas en malriĉeco, la aliron al publika helpo por kovri la kostojn ligitajn al la handikapo, nome la elspezojn kiuj ebligas certigi taŭge formadon, psiĥologian subtenon, finanĉan helpon aŭ la prizorgado de interrompo;
 - ĉ) [*alilingve: d*] certigi al la handikapulo la aliron al la programoj de socia loĝejo;
 - d) [*alilingve: e*] certigi al la handikapuloj la egalecon de aliro al la programoj de pensio.

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

Artikolo 29 / Partopreno en la politika vivo kaj en la publika vivo

La subskribintaj ŝtatoj garantias al la handikapuloj la ĝuadon de la politikaj rajtoj kaj la eblecon uzi ilin surbaze de egaleco kun la aliaj, promesante:

- a) fari tiel ke la handikapuloj povu efektive kaj plene partopreni en la politika vivo kaj en la publika vivo surbaze de egaleco kun la aliaj, ĉu rekte aŭ pere de reprezentantoj libere elektitaj, kaj nome ke ili havu la rajton kaj la eblecon voĉdoni kaj esti elektataj, kaj por tio la subskribintaj ŝtatoj, inter aliaj disponoj: I) zorgas ke la elektaj proceduroj, ekipaĵoj kaj materialoj estu taŭgaj, alireblaj kaj facile kompreneblaj kaj uzablaj; II) protektas la rajton kiun havas la handikapuloj voĉdoni per sekreta voĉdonilo sen timigo en la publikaj elektoj kaj referendumoj, prezenti sin ĉe la elektoj kaj plenumi efektive elektan mandaton kaj plenumi ĉiujn publikajn funkciojn sur ĉiuj niveloj de la ŝtato kaj faciligas, laŭokaze, la uzadon de helpaj teĥnologioj kaj de la novaj teĥnologioj; III) garantias la liberan esprimiĝon de la volo de la handikapuloj kiel elektantoj kaj tiucele, se necese, laŭ ilia peto, permesas al ili helpi ilin ĉe la elektado fare de persono de ilia elekto;
- b) antaŭenigi aktive medion en kiu la handikapuloj povu efektive kaj plene partopreni en la gvidado de la publikaj aferoj, sen diskriminacio kaj surbaze de egaleco kun la aliaj, kaj instigi ilian partoprenon en la publikaj aferoj, nome pere de: I) ilia partopreno en la neregistaraj organizoj kaj asocioj kiuj interesiĝas pri la publika kaj politika vivo de la lando kaj pere de ilia partopreno en la agadoj kaj administrado de la politikaj partioj; II) la starigo de organizaĵoj de handikapuloj por reprezenti ilin sur internacia, nacia, regiona kaj loka niveloj kaj la aliĝo al tiuj organizaĵoj.

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

Artikolo 30 / Partopreno en la kultura kaj distra vivo, en libertempaj agadoj kaj sportoj

1. La subskribintaj ŝtatoj rekonas la rajton de la handikapuloj partopreni en la kultura vivo surbaze de egaleco kun la aliaj kaj faras ĉiujn disponojn taŭgajn por ke ili:
 - a) havu aliron al la kulturaj produktoj en alireblaj formatoj;
 - b) havu aliron al la televidelsendoj, al la filmoj, al la teatraj prezentadoj kaj aliaj kulturaj agadoj en alireblaj formatoj;
 - c) havu aliron al la lokoj de kultura agado kiel teatroj, muzeoj, kinejoj, bibliotekoj kaj turismaj servoj kaj, kiom eble, al monumentoj kaj lokoj gravaj por la nacia kulturo.
2. La subskribintaj ŝtatoj faras taŭgajn disponojn por doni al la handikapuloj la eblecon disvolvi kaj realigi siajn kreaĵojn, artaĵojn kaj intelektajn kapablojn, ne nur en sia propra intereso, sed ankaŭ por la riĉigo de la socio.
3. La subskribintaj ŝtatoj faras ĉiujn taŭgajn disponojn, konforme al la internacia juro, por fari tiel ke la leĝoj kiuj protektas la rajtojn de intelekta proprieto ne estu malracia aŭ diskriminacia malhelpo por la aliro de handikapuloj al kulturaj produktoj.
4. La handikapuloj havas rajton, surbaze de egaleco kun la aliaj, je rekono kaj je subteno de sia specifa kultura kaj lingva identeco, inkluzive de la signolingvoj kaj la kulturo de surduloj.
5. Por ebligi al la handikapuloj partopreni, surbaze de egaleco kun la aliaj, en la agadoj de distriĝo, de libertempo kaj sportoj, la subskribintaj ŝtatoj faras disponojn por

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

- a) instigi kaj antaŭenigi la partoprenon, kiom eble plej, de handikapuloj en la ordinaraj sportaj agadoj sur ĉiuj niveloj;
- b) fari tiel ke la handikapuloj havu la eblecon organizi kaj realigi sportajn kaj distrajn aktivecojn kiuj estu specifaj al ili kaj partopreni en ili, kaj, tiucele, instigi la disponigon al ili, surbaze de egaleco kun la aliaj, de taŭgaj rimedoj de trejnado, de formado kaj de resursoj;
- c) fari tiel ke la handikapuloj havu aliron al la lokoj kie okazas sportaj, distraj kaj turismaj agadoj;
- ĉ) [*alilingve: d*] fari tiel ke la handikapitaj infanoj povu partopreni, surbaze de egaleco kun la aliaj infanoj, en la ludaj, distraj, libertempaj kaj sportaj aktivecoj, inkluzive de la lernejsistemo;
- d) [*alilingve: e*] fari tiel ke la handikapuloj havu aliron al la servoj de la personoj kaj organismoj taskitaj organizi distrajn, turismajn, libertempajn kaj sportajn aktivecojn.

Artikolo 31 / Statistiko kaj kolektado de donitaĵoj

1. La subskribintaj ŝtatoj promesas kolekti taŭgajn informojn, inkluzive de statistikaj donitaĵoj kaj esplorzultoj, kiuj povas ebligi formuli kaj apliki politikojn celantajn doni efikon al tiu ĉi Konvencio. La proceduroj de kolektado kaj konservado de tiuj informoj respektas:
 - a) la leĝajn garantiojn, inkluzive de tiuj kiuj devenas el la leĝaro pri la protekto de statistikaj donitaĵoj, por certigi la konfidencecon kaj la respekton de la privata vivo de la handikapuloj;
 - b) la akceptitajn internaciajn normojn pri protektado de la homrajtoj kaj de la fundamentaj liberecoj kaj la eti-

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

kajn principojn kiuj regas la kolektadon kaj ekspluatadon de la statistikoj.

2. La informoj kolektitaj konforme al tiu ĉi artikolo estas diserigitaj, laŭkonvene, kaj uzataj por taksigi la manieron en kiu la subskribintaj ŝtatoj plenumas la devigojn kiujn ili havas kaŭze de tiu ĉi Konvencio kaj identigi kaj forigi la malhelpojn kiujn renkontas la handikapuloj en la uzado de siaj rajtoj.
3. La subskribintaj ŝtatoj havas la respondecon disvastigi tiujn statistikojn kaj zorgas ke ili estu alireblaj por la handikapuloj kaj aliaj personoj.

Artikolo 32 / Internacia kunlaborado

1. La subskribintaj ŝtatoj rekonas la gravecon de la internacia kunlaborado kaj de ĝia antaŭenigo, en la apogo de la klopodoj farataj je nacia nivelo por la realigo de la celo kaj de la celaro de tiu ĉi Konvencio, kaj faras taŭgajn kaj efikajn disponojn por tio, interalie kaj, laŭokaze, en partnereco kun la kompetentaj internaciaj kaj regionaj organizaĵoj kaj la civila socio, aparte la organizaĵoj de handikapuloj. Ili povas nome fari disponojn destinitajn:
 - a) fari tiel ke la internacia kunlaborado - inkluzive la programojn de internacia disvolvado - konsideru la handikapulojn kaj ke ĝi estu alirebla por ili;
 - b) faciligi kaj apogi la fortigon de la kapabloj, nome danke al interŝanĝo kaj kundividado de informoj, spertoj, programoj de formado kaj de referencaj praktikoj;
 - ĉ) [alilingve: d] doni, laŭokaze, teĥnikan helpon kaj ekonomian helpon, ankaŭ faciligante la akiron kaj komuna uzado de teĥnologioj de aliro kaj helpo kaj organizante transigon de teĥnologio.

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

2. La dispozicioj de tiu ĉi artikoloj ne tuŝas la devon de ĉiu subskribinta ŝtato plenumi siajn devigojn kaŭze de tiu ĉi Konvencio.

Artikolo 33 / Aplikado kaj daŭrigado sur nacia nivelo

1. La subskribintaj ŝtatoj nomas, konforme al sia regsisistemo, unu aŭ plurajn kontaktopunktojn por la demandoj pri aplikado de tiu ĉi Konvencio kaj planas laŭ siaj eblecoj krei aŭ nomumi, sine de sia administracio, skipon de kunordigado taskita faciligi la agadojn ligitajn kun tiu ĉi aplikado en diversaj sektoroj kaj diversaj niveloj.
2. La subskribintaj ŝtatoj, konforme al sia administra kaj jura sistemoj, konservas, fortigas, nomumas aŭ kreas, sur interna nivelo, skipon, inkluzive de unu aŭ pluraj sendependaj meĥanismoj, laŭ konveneco, de instigo, de protekto kaj de daŭrigado de la aplikado de tiu ĉi Konvencio. Nomumante aŭ kreante tian meĥanisman, ili konsideras la principojn aplikendajn al la statuto kaj funkciado de la naciaj institucioj de protekto kaj de instigo de la homrajtoj.
3. La civila socio - aparte la handikapuloj kaj la organizaĵoj kiuj reprezentas ilin - estas asociita al la funkcio de daŭrigado kaj plene partoprenas en ĝi.

Artikolo 34 / Komitato de handikapulaj rajtoj

1. Estas starigita Komitato de handikapulaj rajtoj (en la sekvo nomata „la Komitato”) kiu plenumas funkciojn en la sekvo nomatajn;
2. La Komitato konsistas, en la momento de ekvalido de la Konvencio, el dek-du fakuloj. Post sesdek ratifoj kaj

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

kromaj aliĝoj al la Konvencio, aldoniĝos ses membroj al la Komitato, kiu atingos tiam sian maksimuman konsiston de dek-ok membroj.

3. La membroj de la Komitato funkcias persone kaj estas personecoj de alta morala aŭtoritato kaj pravigitaj per kompetento kaj sperto rekonataj en la kampo en kiu aplikiĝas tiu ĉi Konvencio. La subskribintaj ŝtatoj estas petataj, kiam ili nomumas siajn kandidatojn, dece konsideri la dispozicion eldiratan en la artikolo 4,3 de la Konvencio.
4. La membroj de la Komitato estas elektataj de la subskribintaj ŝtatoj, laŭ la principoj de justa geografia dispartigo, de reprezentiĝo de la diversaj formoj de civilizacio kaj de la precipaj jursistemoj, de ekvilibra reprezentiĝo de la seksoj kaj de partopreno de handikapulaj fakuloj.
5. La membroj de la Komitato estas elektataj per sekreta voĉdonado el listo de kandidatoj nomumitaj de la subskribintaj ŝtatoj el iliaj civitanoj, dum kunvenoj de la Konferenco de la subskribintaj ŝtatoj. En tiuj kunvenoj, en kiuj la kvorumo estas je du trionoj de la subskribintaj ŝtatoj, estas elektitaj membroj de la Komitato la kandidatoj kiuj ricevis la plej grandan nombro da voĉoj kaj la absolutan plimulton de la voĉoj de la reprezentantoj de la ĉeestantaj kaj voĉdonantaj subskribintaj ŝtatoj.
6. La unua elekto okazos en ses monatoj sekve al la dato de ekvalido de tiu ĉi Konvencio. Kvar monatojn almenaŭ antaŭ la dato de ĉiu elekto, la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj invitas skribi la subskribintajn ŝtatojn proponi siajn kandidatojn en tempospaco de du monatoj. La Ĝenerala Sekretario starigas poste la alfabetan liston de la tiel nomumitaj kandidatoj, indikante la subskribintajn ŝtatojn kiuj nomumis ilin, kaj komuni-

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

kos ĝin al la ŝtatoj subskribintaj tiun ĉi Konvencion.

7. La membroj de la Komitato estas elektitaj por kvar jaroj. Ili estas reelekteblaj unu fojon. Tamen, la mandato de la ses membroj elektitaj dum la unua elekto ĉesas fine de du jaroj; tuj post la unua elekto, la nomoj de tiuj ses membroj estas lotume deciditaj de la Prezidanto de la kunveno celata en la paragrafo 5 de tiu ĉi artikolo.
8. La elekto de la ses kromaj membroj de la Komitato okazos en la kadro de ordinaraj elektoj, konforme al la dispozicioj de tiu ĉi artikolo.
9. En kazo de forpaso aŭ demisio de membro de la Komitato, aŭ se, pro ajna alia kaŭzo, membro deklaras ne povi plu plenumi siajn funkciojn, la subskribinta ŝtato kiu prezentis lian kandidatecon nomumas alian fakulon kiu posedas la kvalifikaĵojn kaj respondas al la kondiĉoj eldiritaj en la koncernaj dispozicioj de tiu ĉi artikolo por okupi la tiel malplenan postenon ĝis la fino de tiu mandato.
10. La Komitato adoptas sian internan regularon.
11. La Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj disponigas al la Komitato la personaron kaj materiajn rimedojn necesajn por plenumi efike la funkciojn al ĝi taskitajn kaŭze de tiu ĉi Konvencio kaj kunvokas ĝian unuan kunvenon.
12. La membroj de la Komitato ricevas, kun aprobo de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj, honorariojn ĉerpatajn el la resursoj de la Unuiĝintaj Nacioj en la kondiĉoj fiksitaj de la Ĝenerala Asembleo, konsidere al la graveco de la funkcioj de la Komitato.
13. La membroj de la Komitato ĝuas la facilitaĵojn, privilegiojn kaj imunecojn donitajn al la fakuloj kun misio

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

por la Unuiĝintaj Nacioj, tiaj kiaj ili estas nomitaj en la koncernaj sekcioj de la Konvencio pri la Privilegioj kaj Imunecoj de la Unuiĝintaj Nacioj.

Artikolo 35 / Raportoj de la subskribintaj ŝtatoj

1. Ĉiu subskribinta ŝtato prezentas al la Komitato, pere de la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj, detalan raporton pri la disponoj kiujn ĝi faris por plenumi siajn devojn kaŭze de tiu ĉi Konvencio kaj pri la progreso atingita tiurilate, en tempospaco de du jaroj kalkulataj ek de la ekvalido de la Konvencio por la koncerna subskribinta ŝtato.
2. La subskribintaj ŝtatoj prezentas poste aldonajn raportojn almenaŭ ĉiujn kvar jarojn, kaj ĉiajn kromajn raportojn petatajn de la Komitato.
3. La Komitato adoptas, laŭokaze, direktivojn pri la enteno de la raportoj.
4. La subskribintaj ŝtatoj kiuj prezentis al la Komitato komencan detalan raporton ne devas, en la raportoj kiujn ili prezentas poste, ripeti la jam komunikitajn informojn. La subskribintaj ŝtatoj estas petataj redakti siajn raportojn laŭ malferma kaj travidebla proceduro kaj dece konsiderante la dispozicion eldiritan en la artikolo 4,3 de tiu ĉi Konvencio.
5. La raportoj povas indiki la faktorojn kaj malfacilaĵojn kiuj ĝenas la plenumadon de la devoj eldiritaj de tiu ĉi Konvencio.

Artikolo 36 / Ekzamenado de la raportoj

1. Ĉiu raporto estas ekzamenata de la Komitato, kiu formulas la ĝeneralajn proponojn kaj rekomendojn pri la raporto kiujn ĝi opinias taŭgaj kaj kiujn ĝi transdonas

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

al la koncerna subskribinta ŝtato. Tiu subskribinta ŝtato povas komuniki responde al la Komitato ĉiujn informojn kiujn ĝi opinias utilaj. La Komitato povas peti la subskribintajn ŝtatojn ĉiujn kromajn informojn pri la aplikado de tiu ĉi Konvencio.

2. En kazo de grava malfruiĝo de subskribinta ŝtato en prezentado de raporto, la Komitato povas sciigi al ĝi ke ĝi devos ekzameni la aplikadon de tiu ĉi Konvencio en tiu subskribinta ŝtato surbaze de la fidindaj informoj pri kiuj ĝi povas disponi, escepte se la atendita raporto estas prezentita tri monatojn post la sciigo. La Komitato invitos la koncernan subskribintan ŝtaton partopreni en tiu ekzamenado. Se la subskribinta ŝtato respondas prezentante sian raporton, aplikiĝos la dispozicioj de la paragrafo 1 de tiu ĉi artikolo.
3. La Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj komunikas la raportojn al ĉiuj subskribintaj ŝtatoj.
4. La subskribintaj ŝtatoj disponigas siajn raportojn larĝe al la publiko en sia propra lando kaj faciligas la aliron de la publiko al la ĝeneralaj proponoj kaj rekomendoj kiujn ili okazigis.
5. La Komitato transdonas al la specialaj institucioj, fondusoj kaj programoj de la Unuiĝintaj Nacioj kaj al la aliaj kompetentaj organismoj, se ĝi opinias tion necesa, la raportojn de la subskribintaj ŝtatoj kiuj enhavas demandon aŭ indikon de bezono de konsilioj aŭ de teknika helpo, akompanate, laŭokaze, de siaj observoj kaj proponoj tuŝantaj tiun demandon aŭ indikon, por ke ĝi povu esti respondata.

Artikolo 37 / Kunlaborado inter la subskribintaj ŝtatoj kaj la Komitato

1. La subskribintaj ŝtatoj kunlaboras kun la Komitato kaj

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

helpas ĝiajn membrojn plenumi sian mandaton.

2. En siaj rilatoj kun la subskribintaj ŝtatoj la Komitato donas sian tutan atenton al la rimedoj de fortigo de la naciaj kapabloj cele al aplikado de tiu ĉi Konvencio, nome pere de internacia kunlaborado.

Artikolo 38 / Rilato de la Komitato kun aliaj organismoj kaj organoj

Por antaŭenigi la efektivan aplikadon de la Konvencio kaj instigi al internacia kunlaborado en la celata kampo:

- a) la specialaj institucioj kaj aliaj organismoj de la Unuiĝintaj Nacioj havas la rajton reprezentiĝi dum la ekzamenado de la aplikado de la dispozicioj de tiu ĉi Konvencio koncerne ilian mandaton. La Komitato povas inviti la specialajn instituciojn kaj ĉiujn aliajn organismojn kiujn ĝi opinias taŭgaj por doni specialajn opiniojn pri la aplikado de la Konvencio en la kampoj kiuj koncernas iliajn respektivajn mandatojn. Ĝi povas inviti la specialajn instituciojn kaj la aliajn organismojn de la Unuiĝintaj Nacioj prezenti al ĝi raportojn pri la aplikado de la Konvencio en la sektoroj kiuj koncernas ilian agadkampon;
- b) en plenumado de sia mandato, la Komitato konsultas, laŭ ĝia opinio pri taŭgeco, la aliajn koncernajn organojn kreitajn de la internaciaj traktatoj pri homrajtoj por garantii la koherecon de iliaj direktivoj pri starigo de raportoj, de iliaj respektivaj ĝeneralaj proponoj kaj rekomendoj kaj por eviti duoblaĵojn kaj partkovraĵojn en la plenumado de iliaj funkcioj.

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

Artikolo 39 / Raporto de la Komitato

La Komitato raportas pri siaj agadoj al la Ĝenerala Asembleo kaj al la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro ĉiujn du jarojn kaj povas formuli ĝeneralajn proponojn kaj rekomendojn bazitajn sur la ekzamenado de la raportoj kaj informoj ricevitaj de la subskribintaj ŝtatoj. Tiuj ĝeneralaj proponoj kaj rekomendoj estas inkluditaj en la raporto de la Komitato, akompanate, laŭokaze, de la observoj de la subskribintaj ŝtatoj.

Artikolo 40 / Konferenco de la subskribintaj ŝtatoj

1. La subskribintaj ŝtatoj kunvenas regule en Konferenco de la Subskribintaj Ŝtatoj por ekzameni ĉian demandon pri aplikado de tiu ĉi Konvencio.
2. Plej malfrue ses monatojn post ekvalido de tiu ĉi Konvencio, la Konferenco de la Subskribintaj Ŝtatoj estas kunvokata de la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj. Ĝiaj postaj kunvenoj estas kunvokataj de la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj ĉiujn du jarojn aŭ laŭ decido de la Konferenco de la Subskribintaj Ŝtatoj.

Artikolo 41 / Deponprenanto

La Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj estas la deponprenanto de tiu ĉi Konvencio.

Artikolo 42 / Subskribo

Tiu ĉi Konvencio estas malferma al subskribo de ĉiuj ŝtatoj kaj de la organizaĵoj de regiona integriĝo en la sidejo de la Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko ekde la 30-a de marto 2007.

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

Artikolo 43 / Konsento esti ligita

Tiu ĉi Konvencio estas submetita al ratifo de la ŝtatoj kaj al formala konfirmo de la organizaĵoj de regiona integriĝo kiuj subskribis ĝin. Ĝi estos malferma al aliĝo de ĉiu ŝtato aŭ organizaĵo de regiona integriĝo kiu ne subskribis ĝin.

Artikolo 44 / Organizaĵoj de regiona integriĝo

1. Per „organizaĵo de regiona integriĝo” oni komprenas ĉian organizaĵon starigitan de suverenaj ŝtatoj de ia regiono, al kiu ĝiaj membroŝtatoj transigis kompetentojn en la kampoj regataj de la Konvencio. En siaj instrumentoj de formala konfirmo aŭ aliĝo, tiuj organizaĵoj indikas la amplekson de sia kompetento en la kampoj regataj de la Konvencio. Poste ili sciigas al la deponprenanto ĉian gravan modifon de la amplekso de sia kompetento.
2. En tiu ĉi Konvencio la referencoj al „subskribintaj ŝtatoj” aplikiĝas al tiuj organizaĵoj en la limo de ilia kompetento.
3. Por la celoj de la paragrafo 1 de la artikolo 45 kaj de la paragrafoj 2 kaj 3 de la artikolo 47, la instrumentoj deponitaj de la organizaĵoj de regiona integriĝo ne estas kalkulataj.
4. La organizaĵoj de regiona integriĝo disponas, por uzi sian voĉdonrajton en la Konferenco de la Subskribintaj Ŝtatoj en la kampoj kiuj koncernas ilian kompetenton, pri nombro de voĉoj egala al la nombro de iliaj membroŝtatoj subskribintaj al tiu ĉi Konvencio. Ili ne uzas sian voĉdonrajton, se iliaj membroŝtatoj uzas la sian, kaj inverse.

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

Artikolo 45 / Ekvalido

1. Tiu ĉi Konvencio ekvalidas la tridekan tagon post depono de la dudeka instrumento de ratifo aŭ aliĝo.
2. Por ĉiu ŝtato aŭ ĉiu organizaĵo de regiona integriĝo kiu ratifos aŭ formale konfirmos la Konvencion aŭ aliĝos al ĝi post la depono de la dudeka instrumento de ratifo aŭ de aliĝo, la Konvencio ekvalidos la tridekan tagon post la depono de tiu ŝtato aŭ de tiu organizaĵo de sia instrumento de ratifo, de aliĝo aŭ de formala konfirmo.

Artikolo 46 / Rezervoj

1. Rezervoj malkongruaj kun la temo kaj la celo de tiu ĉi Konvencio ne estas allasataj.
2. Rezervoj retireblas ĉiumomente.

Artikolo 47 / Amendoj

1. Ĉiu subskribinta ŝtato povas proponi amendon al tiu ĉi Konvencio kaj submeti ĝin al la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj. La Ĝenerala Sekretario komunikas la amend-proponojn al la subskribintaj ŝtatoj, petante ilin sciigi al li ĉu ili favoras kunvokon de konferenco de la subskribintaj ŝtatoj por ekzameni tiujn proponojn kaj esprimi sin pri ili. Se, en la kvar monatoj kiuj sekvas la daton de tiu komuniko, almenaŭ triono de la subskribintaj ŝtatoj esprimas sin favore al kunvoko de tia konferenco, la Ĝenerala Sekretario kunvokas la konferencon sub la alta protektado de la Unuiĝintaj Nacioj. Ĉia amendo adoptita per plimulto de du trionoj de la ĉeestaj kaj voĉdonantaj subskribintaj ŝtatoj estas submetota por aprobo al la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj, poste por akcepto al ĉiuj subskribin-

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

taj ŝtatoj.

2. Ĉia amendo adoptita kaj aprobita konforme al la paragrafo 1 de tiu ĉi artikolo ekvalidas la tridekan tagon post la dato en kiu la nombro da instrumentoj de akcepto atingas la du trionon de la subskribintaj ŝtatoj je la dato de ĝia adopto. Poste, la amendo ekvalidas por ĉiu subskribinta ŝtato la tridekan tagon post la depono, fare de tiu ŝtato, de ĝia instrumento de akcepto. La amendo ligas nur la subskribintajn ŝtatojn kiuj akceptis ĝin.
3. Se la Konferenco de la Subskribintaj Ŝtatoj decidas tiel per interkonsento, amendo adoptita kaj aprobita konforme al la paragrafo 1 de tiu ĉi artikolo kaj koncernanta ekskluzive la artikolojn 34, 38, 39 kaj 40 ekvalidas por ĉiuj subskribintaj ŝtatoj la tridekan tagon post la dato en kiu la nombro da instrumentoj de akcepto atingis la du trionon de la nombro da subskribintaj ŝtatoj je la dato de ĝia adopto.

Artikolo 48 / Malaligho

Ĉiu subskribinta ŝtato povas malaliĝi de tiu ĉi Konvencio per skriba sciigo adresita al la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj. La malaliĝo ekvalidas unu jaron post la dato en kiu la Ĝenerala Sekretario ricevis la sciigon.

Artikolo 49 / Alirebla formato

La teksto de tiu ĉi Konvencio estas disvastigota en alireblaj formatoj.

Artikolo 50 / Aŭtentaj tekstoj

La angla, araba, ĉina, franca, hispana kaj rusa tekstoj de tiu ĉi Konvencio estas same aŭtentaj. Atestante tion, la sub-

Konvencio pri la rajtoj de handikapitoj

skribintaj plenrajtuloj, dece rajtigitaj de siaj respektivaj registaroj, subskribis tiun ĉi Konvencion.

NOTO

- a. En la araba, ĉina kaj rusa, la esprimo „jura kapablo” signifas la „kapablon uzi rajtojn” pli ol la „kapablon agi”.

Unuiĝintaj Nacioj

La Alta Komisariejo pri Homrajtoj AKUNHR

Dua nedeviga protokolo rilate al la Internacia Traktato pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, celanta aboli la mortpunon

Adoptita kaj proklamita de la Ĝenerala Asembleo en sia rezolucio 44/128 de la 15-a de decembro 1989

La ŝtatoj partoj de tiu ĉi Protokolo,

Konvinkitaj ke la abolo de la mortpuno kontribuas subteni la homan dignon kaj la iom-post-ioman disvolviĝon de la homrajtoj,

Memorigante la artikolon 3 de la Universala Deklaro de la Homrajtoj adoptita la 10-an de decembro 1948, kaj la artikolon 6 de la Internacia Pakto pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj adoptita la 16-an de decembro 1966,

Notante ke la artikolo 6 de la Internacia Pakto pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj referencas al la abolo de la mortpuno en esprimoj kiuj senambigue sugestas ke la abolo de tiu puno dezirindas,

Konvinkitaj ke ĉiuj disponoj tuŝantaj la abolon de la mortpuno konsiderendas kiel progreso rilate la uzadon de la rajto je vivo,

Dua nedeviga protokolo rilate al la Internacia Traktato pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, celanta aboli la mortpunon

Dezirantaj fari, per tiu ĉi Protokolo, la internacian sendevigon aboli la mortpuno,

Interkonsentis pri la sekvo :

Artikolo 1

1. Neniu persono sub la jursistemo de ŝtato parto de tiu ĉi Protokolo estos ekzekutata.
2. Ĉiu ŝtato parto faros ĉiajn volatajn disponojn por aboli la mortpunon en la kampo de sia jursistemo.

Artikolo 2

1. Ne akcepteblas ajna rezervo pri tiu ĉi Protokolo, escepte de la rezervo formulita dum la ratifo aŭ dum la aliĝo kaj kiu ebligas la aplikon de la mortpuno en tempo de milito post kondamno pro gravega krimo de armea karaktero farita en tempo de milito.
2. La ŝtato parto kiu formulas tian rezervon komunikos al la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj, dum la ratifo aŭ la aliĝo, la tiurilatajn dispoziciojn de sia interna leĝaro kiuj aplikiĝas en tempo de milito.
3. La ŝtato parto kiu formulis tian rezervon sciigos al la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj la proklamon aŭ la finon de la militŝtato sur sia teritorio.

Artikolo 3

La ŝtatoj partoj de tiu ĉi Protokolo indikos, en la raportoj kiujn ili prezentas al la Komitato pro Homrajtoj kaŭze de la artikolo 40 de la Pakto, disponojn kiujn ili estos adoptintaj por efektivi tiun ĉi Protokolon.

Dua nedeviga protokolo rilate al la Internacia Traktato pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, celanta aboli la mortpunon

Artikolo 4

Koncerne la ŝtatojn partiojn de la Pakto kiuj faris la deklaron laŭ la artikolo 41, la agnoskata kompetento de la Komitato pri Homrajtoj ricevi kaj ekzameni komunikaĵojn en kiuj ŝtato parto asertas ke alia ŝtato parto ne plenumas siajn devojn, etendiĝas al la dispozicioj de tiu ĉi Protokolo, escepte se koncernata ŝtato parto estas farinta deklaron en la kontraŭa senco dum la ratifo aŭ aliĝo.

Artikolo 5

Koncerne la ŝtatojn partiojn de la unua nedeviga Protokolo rilate al la Internacia Pakto pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj adoptita la 16-an de decembro 1966, la agnoskata kompetento de la Komitato pri Homrajtoj ricevi kaj ekzameni komunikaĵojn devenaj de privatuloj dependaj de ilia jursistemo etendiĝas al la dispozicioj de tiu ĉi Protokolo, escepte se koncernata ŝtato parto estas farinta deklaron en la kontraŭa senco dum la ratifo aŭ aliĝo.

Artikolo 6

1. La dispozicioj de tiu ĉi Protokolo aplikiĝas kiel aldonaj dispozicioj de la Pakto.
2. Sen tuŝi la eblecon formuli la rezervon menciitan en la artikolo 2 de tiu ĉi Protokolo, la rajto garantiita en la paragrafo 1 de la artikolo 1 de tiu ĉi Protokolo ne submetebblas al ajna sendevigo celataj en la artikolo 4 de la Pakto.

Artikolo 7

1. Tiu ĉi Protokolo estas malfermita por subskribo de ĉiu ŝtato kiu subskribis la Pakton.

Dua nedeviga protokolo rilate al la Internacia Traktato pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, celanta aboli la mortpunon

2. Tiu ĉi Protokolo estas submetita al ratifo de ĉiu ŝtato kiu ratifis la Pakton aŭ kiu aliĝis al ĝi. La instrumentoj de ratifo deponendas ĉe la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj.
3. Tiu ĉi Protokolo estos malfermita por aliĝo de ĉiu ŝtato kiu ratifis la Pakton aŭ kiu aliĝis al ĝi.
4. La aliĝo fariĝos per depono de aliĝ-instrumento ĉe la Ĝenerala Sekretaria de la Unuiĝintaj Nacioj.
5. La Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj informos ĉiujn ŝtatojn kiuj subskribis tiun ĉi Protokolon aŭ kiuj aliĝis al ĝi pri la depono de ĉiu ratifa aŭ aliĝa instrumento.

Artikolo 8

1. Tiu ĉi Protokolo ekvalidos tri monatojn post la dato de la depono ĉe la de la deka instrumento de ratifo aŭ de aliĝo.
2. Por ĉiu el la ŝtatoj kiuj ratifos tiun ĉi Protokolon aŭ kiuj aliĝos al ĝi post la depono de la deka instrumento de ratifo aŭ de aliĝo, tiu Protokolo ekvalidos tri monatojn post la dato de la depono fare de tiu ŝtato de sia instrumento de ratifo aŭ de aliĝo.

Artikolo 9

La dispozicioj de tiu ĉi Protokolo aplikiĝas, sen limigo nek ajna escepto, al ĉiuj konsistigaj unuoj de la federaciaj ŝtatoj.

Dua nedeviga protokolo rilate al la Internacia Traktato pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, celanta aboli la mortpunon

Artikolo 10

La Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj informos ĉiujn ŝtatojn celatajn en la paragrafo 1 de la artikolo 48 de la Pakto :

- a) Pri la rezervoj, komunikaĵoj kaj sciigoj ricevitaj laŭ la artikolo 2 de tiu ĉi Protokolo ;
- b) Pri la deklaroj faritaj kaŭze de la artikoloj 4 aŭ 5 de tiu ĉi Protokolo ;
- c) Pri la subskriboj faritaj sub tiu ĉi Protokolo kaj pri la instrumentoj de ratifo kaj de aliĝo deponitaj konforme al la artikolo 7 de tiu ĉi Protokolo ;
- ĉ) [alilingve: d] Pri la dato en kiu tiu ĉi Protokolo ekvalidos konforme al ties artikolo 8.

Artikolo 11

1. Tiu ĉi Protokolo, kies tekstoj angla, araba, ĉina, franca, hispana kaj rusa estas same aŭtentaj, estos deponita en la arĥivoj de la Unuiĝintaj Nacioj.
2. La Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj transdonos legitimitan kopion de tiu ĉi Protokolo al ĉiuj ŝtatoj celataj en la artikolo 48 de la Pakto.

© Alta Komisariejo de la Unuiĝintaj Nacioj pri la Homrajtoj

Ĝenevo, Svislando

Dua nedevisa protokolo rilate al la Internacia Traktato pri la
Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, celanta aboli la mortpunon

Adresu viajn komentojn kaj proponojn al :

webadmin.hchr@unug.ch

OHCHR-UNOG

8-14 Avenue de la Paix

1211 Ĝenevo 10, Svisio

Telefonnumero: (41-22) 917-9000

Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj, 1989 (n-ro 169)

Kunvokita en Ĝenevo de la Estraro de la Internacia Labor-Oficejo, kaj tie kunveninte la 7-an de junio 1989, en sia 76-a sesio;

Notante la internaciajn normojn eldiritajn en la konvencio kaj la rekomendoj pri indiĝenaj kaj tribaj popoloj, 1957;

Memorigante la tekston de la Universala Deklaro pri Homrajtoj, de la Internacia Traktato pri ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj, de la Internacia Traktato pri civilaj kaj politikaj rajtoj kaj de la multaj internaciaj instrumentoj koncernantaj la antaŭmalhelpon de diskriminacio;

Konsiderante ke, pro la evoluo de la internacia juro post 1957 kaj la evoluo okazinta en la situacio de la indiĝenaj kaj tribaj popoloj en ĉiuj regionoj de la mondo, necesas adopti novajn internaciajn normojn pri la demando cele al forigi la orientiĝon de la antaŭaj normoj kiuj celis asimiladon;

Notante la aspiron de la koncernaj popoloj regi siajn proprajn instituciojn, vivmanierojn kaj ekonomian disvolviĝon kaj konservi kaj disvolvi siajn identecon, lingvon kaj religion en la kadro de la ŝtatoj en kiuj ili vivas;

Notante ke, en multaj mondpartoj, tiuj popoloj ne povas ĝui fundamentajn homrajtojn samgrade kiel la resto de la

Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj, 1989 (n-ro 169)

loĝantaro de la ŝtatoj en kiuj ili vivas kaj ke iliaj leĝoj, valoroj, kutimoj kaj perspektivoj ofte suferis erozion;

Atentigante pri la aparta kontribuado de la indiĝenaj kaj tribaj popoloj al la kultura diverseco kaj al la socia kaj ekologia harmonio de la homaro kaj al internaciaj kunlaborado kaj interkompreniĝo;

Notante ke la ĉi-sekvaj dispozicioj estis starigitaj kunlabore kun la Unuiĝintaj Nacioj, la Organizaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj pri Nutrado kaj Kampkulturo, de la Organizaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj pri Edukado, Scienco kaj Kulturo kaj de la Monda Organizaĵo pri Sano kaj de la Interamerika Indiĝensciencia Instituto, sur la konvenaj niveloj kaj por la respektivaj kampoj, kaj ke estas planite daŭrigi tiun kunlaboradon por antaŭenigi kaj certigi ilian aplikadon;

Post esti decidinta adopti diversajn proponojn koncerne partan revizion de la konvencio (n-ro 107) pri la indiĝenaj kaj tribaj loĝantaroj, 1957, demando kiu konsistigas la kvaran punkton de la tagordo de la sesio;

Post esti decidinta ke tiuj proponoj alprenos la formon de internacia konvencio revizianta la konvencion pri indiĝenaj kaj tribaj loĝantaroj, 1957,

adoptas, ĉi tiun dudek-sepan de junio mil naŭcent okdek naŭ, la ĉi-sekvan konvencion, kiu estas nomata Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj, 1989.

PARTO I. ĜENERALA POLITIKO

Artikolo 1

1. Tiu ĉi konvencio aplikiĝas

PARTO I. ĜENERALA POLITIKO

a) al la tribaj popoloj en sendependaj landoj kiuj distingiĝas de la ceteraj sektoroj de la nacia komunumo per siaj sociaj, kulturaj kaj ekonomiaj kondiĉoj kaj kiuj estas komplete aŭ parte regataj de kutimoj aŭ tradicioj kiuj estas propraj al ili aŭ de speciala leĝaro;

b) al la popoloj en sendependaj landoj kiuj estas konsiderataj indiĝenaj ĉar ili devenas de loĝantaroj kiuj priloĝis la landon, aŭ geografian regionon al kiu apartenas la lando, en la epoko de la konkero aŭ koloniiĝo aŭ de la stariĝo de la nunaj ŝtatlimoj, kaj kiu, kia ajn estas ilia jura statuso, konservas siajn proprajn sociajn, ekonomiajn, kulturajn kaj politikajn instituciojn aŭ iujn el ili.

2. La sento de indiĝena aŭ triba aparteno konsiderendas kiel baza kriterio por determini la grupojn al kiuj aplikiĝas la dispozicioj de tiu ĉi konvencio.

3. La uzo de la termino popoloj en tiu ĉi konvencio neniel interpreteblas kiel havanta ian ajn implikiĝon pri la rajtoj kiuj povas ligiĝi kun tiu termino kaŭze de la internacia juro.

Artikolo 2

1. Estas la tasko de la registaroj, kun partopreno de la koncernataj popoloj, disvolvi kunordigitan kaj sisteman agadon por protekti la rajtojn de tiuj popoloj kaj garanti la respektadon de ilia integreco.

2. Tiu agado devas enteni disponojn kiuj celas:

a) certigi ke la membroj de tiuj popoloj ĝuu, egalece, rajtojn kaj eblecojn kiujn la nacia leĝaro donas al la aliaj membroj de la loĝantaro;

b) antaŭenigi la plenan realigon de la sociaj, ekonomiaj kaj kulturaj rajtoj de tiuj popoloj, en la respekto de ilia socia kaj kultura identeco, de iliaj kutimoj kaj tradicioj kaj de iliaj institucioj;

Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj, 1989 (n-ro 169)

- c) helpi la anojn de tiuj popoloj elimini la elementojn de soci-ekonomia evoludiferenco kiuj povas ekzisti inter indiĝenaj membroj kaj aliaj membroj de la nacia komunumo, en maniero kongrua kun iliaj aspiroj kaj ilia vivmaniero.

Artikolo 3

1. La indiĝenaj kaj tribaj popoloj devas plene ĝui la homrajtojn kaj fundamentajn liberecojn, sen ajna malhelpo nek diskriminacio. La dispozicioj de tiu ĉi konvencio aplikendas sendistinge al la geanoj de tiuj popoloj.
2. Nenia perforto aŭ truddispono uzeblas kontraŭa al la homrajtoj kaj al la fundamentaj liberecoj de la koncernataj popoloj, inkluzive de la rajtoj eldiritaj en tiu ĉi konvencio.

Artikolo 4

1. Specialaj disponoj farendas, laŭ la bezono, por konservi la homojn, la instituciojn, la havaĵojn, la laboron, la kulturon kaj la medion de la koncernataj popoloj.
2. Tiu specialaj disponoj devas ne esti kontraŭaj al la libere esprimataj deziroj de la koncernataj popoloj.
3. Tiuj disponoj devas neniel atenci la ĝuadon, sendistinge, de la tutaĵo de la rajtoj ligitaj kun la civitaneco.

Artikolo 5

Aplikante la dispoziciojn de tiu ĉi konvencio, necesas:

- a) rekoni kaj protekti la valorojn kaj la sociajn, kulturajn, religiajn kaj spiritajn praktikojn de tiuj popoloj kaj de ĉe konsideri la econ de la problemoj kiujn ili havas kiel grupoj kaj kiel individuoj;

PARTO I. ĜENERALA POLITIKO

- b) respekti la integrecon de la valoroj, praktikoj kaj institucioj de tiuj popoloj;
- c) adopti, kun partopreno kaj kunlaborado de la tuŝitaj popoloj, disponojn por mildigi iliajn malfacilaĵojn por alfronti novajn viv- kaj labor-kondiĉojn.

Artikolo 6

1. Aplikante la dispoziciojn de tiu ĉi konvencio, la registaroj devas:
 - a) konsulti la koncernatajn popolojn, per taŭgaj proceduroj, kaj speciale per iliaj reprezentaj institucioj, ĉiam kiam oni planas leĝdonajn aŭ administrajn disponojn kiuj povas tuŝi ilin rekte;
 - b) disponigi la rimedojn per kiuj tiuj popoloj povu, almenaŭ egalece kun la aliaj sektoroj de la loĝantaro, libere kaj ĉiunivele partopreni en la decidadoj en la laŭelektaj institucioj kaj la administraj kaj aliaj organismoj kiuj respondecas pri la politikoj kaj programoj kiuj koncernas ilin;
 - c) disponigi la rimedojn kiuj ebligas plene disvolvi la instituciojn kaj iniciatojn proprajn al tiuj popoloj kaj, laŭokaze, liveri al ili la necesajn resursojn por tio.
2. La konsultoj farataj per apliko de tiu ĉi konvencio farendas bonintence kaj en formo adaptita al la cirkonstancoj, por atingi interkonsenton aŭ konsenton pri la planataj disponoj.

Artikolo 7

1. La koncernataj popoloj devas havi la rajton decidi pri siaj propraj prioritatoj koncerne la procezon de disvolvado, en la mezuro laŭ kiu tiu havas efikon sur ilia vi-

Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj, 1989 (n-ro 169)

vo, iliaj kredoj, iliaj institucioj kaj ilia spirita bonfarto kaj sur la teroj kiujn ili okupas aŭ uzas alie, kaj kiom eble plej kontroli sian propran ekonomian, socian kaj kulturan disvolviĝon. Krome, tiuj popoloj devas partopreni en la ellaborado, realigo kaj taksado de la planoj kaj programoj de nacia kaj regiona disvolvado kiuj povas tuŝi ilin rekte.

2. La plibonigo de la viv- kaj labor-kondiĉoj de la koncernataj popoloj, kun ties partopreno kaj kunlaborado, devas esti unuaranga en la planoj de tutaĵaj ekonomiaj disvolvoplanoj de la regionoj en kiuj ili loĝas. La apartaj disvolvoprojektoj de tiuj regionoj devas ankaŭ konceptiĝi tiel ke ili favoru tian plibonigon.
3. La registaroj devas agi tiel ke, laŭokaze, fariĝu esploradoj kunlabore kun la koncernataj popoloj, por pritaksi la eventualajn sociajn, spiritajn, kulturajn kaj mediajn efikojn de la planataj disvolv-agadoj sur ili. La rezultoj de tiaj esploradoj konsiderendas kiel baza kriterio por la realigo de tiuj agadoj.
4. La registaroj devas fari disponojn, kunlabore kun la koncernataj popoloj, por protekti kaj flegi la medion en la teritorioj kiujn ili priloĝas.

Artikolo 8

1. Aplikante la nacian leĝaron pri la koncernataj popoloj dece konsiderendas iliaj kutimoj aŭ ilia kutimjuro.
2. La koncernataj popoloj devas havi la rajton konservi siajn kutimojn kaj instituciojn se tiuj ne estas malkongruaj kun la fundamentaj rajtoj difinitaj de la nacia jursistemo kaj kun la homrajtoj rekonataj sur internacia nivelo. Necesas starigi procedurojn, tiom kiom necesas, por solvi la eventualajn konfliktojn kaŭzitaĵn de la aplikado de tiu principo.

PARTO I. ĜENERALA POLITIKO

3. La aplikado de la paragrafoj 1 kaj 2 de tiu ĉi artikolo devas ne malhelpi la anojn de tiuj popoloj uzi la rajtojn rekonitajn al ĉiuj civitanoj kaj alpreni la respondajn devojn.

Artikolo 9

1. En la mezuro kongrua kun la nacia jursistemo kaj kun la homrajtoj rekonitaj internacinivele, respektendas la metodoj kiujn la koncernataj popoloj uzas laŭkutime por subpremi deliktojn de iliaj membroj.
2. La institucioj kaj la tribunaloj taskita decidi en punaferoj devas tiukampe konsideri la kutimojn de tiuj popoloj.

Artikolo 10

1. Kiam pun-sankcioj laŭ la ĝenerala leĝaro estas trudataj al membroj de la koncernataj popoloj, necesas konsideri iliajn ekonomiajn, sociajn kaj kulturajn ecojn.
2. Necesas preferi formojn de sankcio aliajn ol malliberigon.

Artikolo 11

La deviga liverado de personaj servoj, ĉu kompensataj aŭ ne, trudata iel ajn al membroj de la koncernataj popoloj, malpermesendas leĝe punende, escepte en okazoj kiujn la leĝo disponas por ĉiuj civitanoj.

Artikolo 12

La koncernataj popoloj devas ĝui protekton kontraŭ malrespekto de iliaj rajtoj kaj povi leĝe procesi, individue aŭ per interveno de iliaj reprezentaj organoj, por certigi la efektivan respekton de tiuj rajtoj. Disponoj farendas por certigi ke, en ĉiu leĝa proceduro, la anoj de tiuj popoloj povu

kompreni kaj komprenigi, laŭbezzone per buŝtradukisto aŭ per aliaj efikaj rimedoj.

PARTO II. TEROJ

Artikolo 13

1. Aplikante la dispoziciojn de tiu ĉi parto de la konvencio, la registaroj devas respekti la specialan gravecon por la kulturo kaj la spiritaj valoroj de la koncernataj popoloj de ilia rilato kun la teroj aŭ teritorioj, aŭ kun ambaŭ, laŭ la kazo, kiujn ili okupas aŭ uzas alie, kaj speciale la kolektivajn aspektojn de tiu rilato.
2. La uzado de la termino teroj en la artikoloj 15 kaj 16 entenas la koncepton de teritorioj, kiu kovras la tutaĵon de la medio de la regionoj kiujn okupas la koncernataj popoloj aŭ kiujn ili uzas alie.

Artikolo 14

1. La rajtoj de proprieto kaj de posedo pri la teroj kiujn ili tradicie okupas rekonendas al la koncernataj popoloj. Krome, farendas disponoj en koncernaj okazoj por protekti la rajton de la koncernataj popoloj uzi la terojn ne ekskluzive okupatajn de ili, sed al kiuj ili havas tradicie aliron por siaj tradiciaj kaj vivtenaj agadoj. Aparta atento necesas tiurilate por la popoloj nomadaj kaj vagantaj terkulturistoj.
2. La registaroj devas laŭbezzone fari disponojn por identigi la terojn kiuj la koncernataj popoloj tradicie okupas kaj por garantii efikan protekton de iliaj rajtoj je proprieto kaj je posedo.

PARTO II. TEROJ

3. Necesas starigi taŭgaj procedurojn kadre de la nacia jursistemo por decidi pri la postuloj pri teroj venantaj de la koncernataj popoloj.

Artikolo 15

1. La rajtoj de la koncernataj popoloj pri la naturriĉaĵoj troviĝantaj sur iliaj teroj estas speciale konservendaj. Tiuj rajtoj entenas tiun, por tiuj popoloj, partopreni en la uzado, mastrumado kaj konservado de tiuj riĉaĵoj.
2. En la okazo en kiu ŝtato havas la proprieton de la mineraloj aŭ de la naturriĉaĵoj de la subgrundo aŭ de aliaj resursoj kiujn posedas tiuj teroj, la registaroj devas starigi aŭ daŭrigi procedurojn por konsulti la koncernatajn popolojn kun la celo determini ĉu kaj kiom la intereso de tiuj popoloj estas minacataj, antaŭ ol realigi aŭ permesi ĉian programon de esplorado aŭ ekspluatado de la resursoj kiujn havas tiuj teroj. La koncernataj popoloj devas, ĉiam kiam eblas, partopreni en la avantaĝoj devenantaj de tiuj agadoj kaj devas ricevi justan kompensajon por ĉia damaĝo kiun ili eventuale suferas pro tiaj agadoj.

Artikolo 16

1. Kun rezervo pri la sekvaj paragrafoj de tiu ĉi artikolo, la koncernataj popoloj devas ne esti delokataj el la teroj kiujn ili okupas.
2. Kiam delokado kaj reinstalado de tiuj popoloj estas juĝataj esceptokaze necesaj, ili devas okazi nur kun ilia konsento, donita libere kaj kun plena kono de la afero. Se tiu konsento ne atingeblas, ili fareblas nur post konvena proceduro starigita de la nacia leĝaro kaj kiu enhavu, laŭokaze, publikajn enketojn en kiuj la koncernataj popoloj havu la eblecon esti efike reprezentataj.

Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj, 1989 (n-ro 169)

3. Ĉiam kiam eblas, tiuj popoloj devas havi la rajton reveni al siaj tradiciaj teroj, ekde kiam la kialoj kiuj motivis ilian delokadon kaj ilian reinstaladon ĉesas ekzisti.
4. Kiam tia reveno ne eblas, ĉu determinite per interkonsento aŭ, en foresto de tia interkonsento, per rimedoj de taŭgaj proceduroj, tiuj popoloj devas ricevi, en kiom eble plej alta mezuro, terojn de kvalito kaj de jura statuso almenaŭ egalaj al tiuj de la teroj kiujn ili antaŭe okupis kaj kiuj ebligas al ili vivteni sin por la momento kaj certigi sian estontan disvolviĝon. Kiam la koncernataj popoloj esprimas preferon por mona aŭ natura kompensaĵo, ili devas esti sendamaĝitaj tiel, kun rezervo pri tiurilataj garantioj.
5. La tiel delokitaj kaj reinstalataj personoj devas esti plene sendamaĝigitaj je ĉia perdo aŭ je ĉia damaĝo suferata de ĝi pro tio.

Artikolo 17

1. La reĝimoj de transdono de rajtoj pri tero inter iliaj membroj starigitaj de la koncernataj popoloj respektendas.
2. La koncernataj popoloj konsultendas kiam oni ekzamenas ilian kapablon aliproprigi siajn terojn aŭ alie transdoni siajn rajtojn pri tiuj teroj ekster sian komunumon.
3. La personoj kiuj ne apartenas al tiuj popoloj estas malobligendaj uzi la kutimojn de tiuj popoloj aŭ la nescion de iliaj membroj koncerne la leĝon por akiri proprieton, posedon aŭ ĝuadon de teroj kiuj apartenas al ili.

Artikolo 18

La leĝo devas dispozicii taŭgajn sankciojn por ĉia ne permesita eniro sur la terojn de la koncernataj popoloj, aŭ por

PARTO II. TEROJ

ĉia ne permesita uzado de tiuj teroj, kaj la registaroj devas fari disponojn por malebligi tiujn leĝrompojn.

Artikolo 19

La naciaj kampkulturaj programoj devas garantii al la koncernataj popoloj kondiĉojn ekvivalentajn al tiuj kiujn ĝuas la aliaj sektoroj de la loĝantaro koncerne:

- a) la disponigon de kromaj teroj kiam la teroj kiun disponas tiuj popoloj ne sufiĉas por certigi al ili la elementojn de normala ekzistado, aŭ por alfronti sian eventualan numeran kreskadon;
- b) la disponigon de rimedoj necesaj por ekspluati la terojn kiuj tiuj popoloj jam posedas.

PARTO III. REKRUTADO KAJ DUNGOKONDIĈOJ

Artikolo 20

1. La registaroj devas, en la kadro de la nacia leĝaro kaj kunlabore kun la koncernataj popoloj, fari specialajn disponojn por certigi al la laboristoj apartenantaj al tiuj popoloj efikan protekton koncerne la rekrutadon kaj la dungokondiĉojn, laŭ la mezuro en kiu ili ne estas sufiĉe protektataj de la leĝaro aplikenda al la laboristoj ĝenerale.
2. La registaroj devas fari ĉion kion ili povas por malebligi ĉian diskriminacion inter la laboristoj apartenantaj al la koncernataj popoloj kaj la aliaj laboristoj, nome koncernante:

Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj, 1989 (n-ro 169)

- a) aliron al dungo, inkluzive de kvalifikitaj dungoj, kaj la disponojn de promocio kaj postenaltiĝo;
- b) egalan salajron por laboro de egala valoro;
- c) kuracan kaj socian helpadon, sekurecon kaj sanon ĉe laboro, ĉiajn prestadojn de socia sekureco kaj ĉiajn aliajn dungodevenajn avantaĝojn, kaj loĝadon;
- ĉ) [*alilingve: d*] la rajton je asociiĝo, la rajton je ĉiaj ne kontraŭleĝaj sindikataj agadoj kaj la rajton fari kolektivajn konvenciojn kun dungantoj aŭ kun dunganto-organizaĵoj.

3. La deciditaj disponoj devas speciale celi al tio ke:

- a) la laboristoj apartenantaj al la koncernataj popoloj, inkluzive de sezonaj, okazaj kaj migraj laboristoj dungitaj en kampkulturo aŭ en aliaj aktivecoj, same kiel tiuj dungitaj de laborist-pruntistoj, ĝuu la saman protekton kiun la naciaj leĝaro kaj praktikoj donas al la aliaj laboristoj de tiuj kategorioj en la samaj sektoroj, kaj ke ili estu plene informitaj pri siaj rajtoj kaŭze de la laborleĝaro kaj pri la eblecoj de jura helpo kiun ili povas aliri;
- b) la laboristoj apartenantaj al tiuj popoloj ne estu submetitaj al laborkondiĉoj kiuj endanĝerigas ilian sanon, speciale pro elmetiĝo al pesticidoj aŭ al aliaj venenaj substancoj;
- c) la laboristoj apartenantaj al tiuj popoloj ne estu submetitaj al sistemoj de truddeviga rekrutado, inkluzive de ĉia servuto pro ŝuldo;
- ĉ) [*alilingve: d*] la laboristoj apartenantaj al tiuj popoloj ĝuu la egalecon de ŝancoj kaj de traktado inter viroj kaj virinoj en la dungo kaj protekton kontraŭ seksa ĉikanado.

4. Aparta atento necesas por kreado de taŭgaj servoj de

PARTO III. REKRUTADO KAJ DUNGOKONDIĈOJ

laborinspektado en la regionoj kie laboristoj apartenantaj al koncernataj popoloj plenumas salajratajn aktivecojn, en maniero por certigi la respekton al la dispozicioj de tiu ĉi parto de la konvencio.

PARTO IV. PROFESIA FORMADO, METIO KAJ KAMPARAJ INDUSTRIOJ

Artikolo 21

La membroj de la koncernataj popoloj devas povi ĝui rimedojn de profesia formado almenaŭ egalajn al tiuj disponigataj al la aliaj civitanoj.

Artikolo 22

1. Disponoj farendas por instigi al libervola partopreno de la membroj de la koncernataj popoloj en la programoj de profesia formado kun ĝenerala aplikado.
2. Kiam la ekzistantaj programoj de profesia formado kun ĝenerala aplikado ne respondas al la propraj bezonoj de la koncernataj popoloj, la registaroj devas, kune kun ties partopreno, fari tiel ke specialaj programoj kaj rimedoj de formado estu al ili disponigataj.
3. La specialaj programoj de formado devas baziĝi sur la ekonomia medio, la socia kaj kultura situacio kaj la konkretaj bezonoj de la koncernataj popoloj. Ĉiu tiurilata esplorado farendas kunlabore kun tiuj popoloj, kiuj konsultendas pri la organizado kaj funkciado de tiuj programoj. Kiam eblas, tiuj popoloj devas iom post iom alpreni la respondecon de la organizado kaj funkciado de tiuj specialaj programoj de formado, se ili tiel

decidas.

Artikolo 23

1. La metioj, la kamparaj kaj komunumaj industrioj, la aktivecoj de vivtena ekonomio kaj la tradiciaj aktivecoj de la koncernataj popoloj, kiel ĉasado, fiŝkaptado, kaptilĉasado kaj kolektado, rekonendas kiel gravaj faktoroj de konservado de ilia kulturo kaj de ilia ekonomiaj sendependeco kaj disvolviĝo. La registaroj devas, kun partopreno de tiuj popoloj, kaj, laŭ okazo, agi tiel ke tiuj strukturoj estu fortigitaj kaj valorigataj.
2. Laŭ peto de la koncernataj popoloj donendas al ili, kiam eblas, taŭga teĥnika kaj financa helpo kiu konsideru la tradiciajn teĥnikojn kaj kulturajn ecojn de tiuj popoloj kaj la gravecon de daŭrigebla kaj egalrajta disvolviĝo.

PARTIO V. SOCIA SEKURECO KAJ SANO

Artikolo 24

La reĝimoj de socia sekureco devas esti etendataj iom post iom al la koncernataj popoloj kaj esti sendistinge aplikataj al ili.

Artikolo 25

1. La registaroj devas fari tiel ke taŭgaj sanservoj estu disponigataj al la koncernataj popoloj aŭ devas doni al ili la rimedojn kiuj ebligu al ili organizi kaj liveri tiajn servojn sub siaj propraj respondeco kaj kontrolo, tiel ke ili povu ĝui kiom eble plej altan nivelon de korpa

PARTIO V. SOCIA SEKURECO KAJ SANO

kaj mensa sano.

2. La sanservoj organizendas kiom eble plej sur komunuma nivelo. Tiuj servoj planendas kaj administrendas kunlabore kun la koncernataj popoloj kaj devas konsideri iliajn ekonomiajn, geografiajn, sociajn kaj kulturajn kondiĉojn kaj iliajn tradiciajn metodojn de antaŭmalhelpaj metodoj, praktikoj de kuracado kaj kuracilojn.
3. La sansistemo devas doni la unuan rangon al formado kaj dungado de sanpersonaro de la lokaj komunumoj kaj koncentriĝi sur la primara sanprizorgo, kaj samtempe resti en densa rilato kun la aliaj niveloj de sanservoj.
4. La liverado de tiaj sanservoj kunordigendas kun la aliaj sociaj, ekonomiaj kaj kulturaj disponoj farataj en la lando.

PARTO VI. EDUKADO KAJ KOMUNIKILOJ

Artikolo 26

Disponoj farendas por certigi al la membroj de la koncernataj popoloj la eblecon akiri ĉiunivelan edukadon almenaŭ surbaze de egaleco kun la resto de la nacia komunumo.

Artikolo 27

1. La programoj kaj edukservoj por la koncernataj popoloj disvolvendas kaj realigendas kunlabore kun ili por respondi al iliaj apartaj bezonoj kaj kovrendas ilian historion, iliajn konojn kaj iliajn teĥnikojn, iliajn valor sistemojn kaj iliajn ceterajn sociajn, ekonomiajn kaj kulturajn aspirojn.
2. La kompetenta instanco devas agi tiel ke la formado de la membroj de la koncernataj popoloj kaj ilia partopreno en la formulado kaj funkciigo de la edukprogramoj estu certigitaj, por ke la respondeco pri funkciigo de tiuj programoj povu iom post iom transdoniĝi al tiuj popoloj, laŭ la okazo.
3. Krome, la registaroj devas rekoni la rajton de tiuj popoloj krei siajn proprajn instituciojn kaj edukrimedojn, kondiĉe ke tiuj institucioj respondu al la minimumaj normoj starigitaj de la kompetenta institucio konsulte kun tiuj popoloj. Por tio liverendas al ili taŭgaj resursoj

Artikolo 28

1. Kiam tio realigeblas, donendas al la infanoj de tiuj popoloj instruado por lernigi al ili legi kaj skribi en ilia propra indiĝena lingvo aŭ en la lingvo kiu estas plej ordinare uzata de la grupoj al kiuj ili apartenas. Kiam tio ne realigeblas, la kompetentaj instancoj devas fari konsultadojn kun tiuj popoloj por adoptado de disponoj kiuj ebligu atingi tiun celon.
2. Taŭgaj disponoj farendas por certigi ke tiuj popoloj havu la eblecon akiri la regadon de la nacia lingvo aŭ de unu el la oficialaj lingvoj de la lando.
3. Disponoj farendas por konservi la indiĝenajn lingvojn de la koncernataj popoloj kaj subteni ilian disvolvadon

PARTO VI. EDUKADO KAJ KOMUNIKILOJ

kaj praktikadon.

Artikolo 29

La edukado devas celi doni al la infanoj de la koncernataj popoloj ĝeneralajn konojn kaj kapablojn kiuj helpas ilin plene kaj egalece partopreni la vivon de sia propra komunumo kaj tiun de la nacia komunumo.

Artikolo 30

1. La registaroj devas fari disponojn adaptitajn al la tradicioj kaj kulturoj de la koncernataj popoloj kun la celo konigi al ili iliajn rajtojn kaj devojn, speciale koncerne laboron, ekonomiajn eblecojn, demandojn de edukado kaj sano, sociajn servojn kaj la rajtojn kiuj rezultas el tiu ĉi konvencio.
2. Por tio oni uzas, se necese, skribajn tradukojn kaj la rimedojn de amaskomunikiloj en la lingvoj de tiuj popoloj.

Artikolo 31

Edukecaj disponoj farendas en ĉiuj sektoroj de la nacia komunumo, kaj aparte en tiuj kiuj estas plej rekte en kontakto kun la koncernataj popoloj, por elimini la antaŭjuĝojn kiujn ili eventuale havas pri tiuj popoloj. Por tio necesas klopodi por certigi ke la libroj pri historio kaj aliaj pedagogiaj materialoj donu justan, ĝustan kaj dokumentitan prikskribon de la socioj kaj kulturoj de la koncernataj popoloj.

PARTO VII. KONTAKTOJ KAJ KUNLABORADO TRA LA LIMOJ

Artikolo 32

La registaroj devas fari taŭgajn disponojn, inkluzive per internaciaj interkonsentoj, por faciligi la kontaktojn kaj kunlaboradojn inter la indiĝenaj kaj tribaj popoloj tra la landlimoj, inkluzive en la ekonomia, socia, kultura, spirita kaj media kampoj.

PARTO VIII. ADMINISTRACIO

Artikolo 33

1. La registara instanco respondeca pri la demandoj traktataj en tiu ĉi konvencio devas certigi ke institucioj aŭ aliaj koncernaj meĥanismoj ekzistu por administri la programojn kiuj tuŝas la koncernatajn popolojn kaj ke ili disponu pri la necesaj rimedoj por plenumi siajn funkciojn.
2. Tiuj programoj devas inkludi:
 - a) planadon, kunordigadon, realigadon kaj pritaksadon, kunlabore kun la koncernataj popoloj, disponojn preskribitajn en tiu ĉi konvencio;
 - b) submetadon al la kompetentaj instancoj de proponoj de leĝaj kaj aliaj disponoj kaj la kontroladon de la aplikado de tiuj disponoj, kunlabore kun la koncernataj popoloj.

PARTO IX. ĜENERALAJ DISPOZICIOJ

PARTO IX. ĜENERALAJ DISPOZICIOJ

Artikolo 34

La eco kaj la atingopovo de la disponoj farendaj por efektiviĝi tiun ĉi konvencion determinendas elaste, konsidere al la apartaj kondiĉoj de ĉiu lando.

Artikolo 35

La aplikado de la dispozicioj de tiu ĉi konvencio devas ne atenci la rajtojn kaj avantaĝojn garantiatajn al la koncernataj popoloj kaŭze de aliaj konvencioj kaj rekomendoj, de internaciaj instrumentoj, de traktatoj aŭ de leĝoj, verdiktoj, kutimoj aŭ naciaj interkonsentoj.

PARTO X. FINAJ DISPOZICIOJ

Artikolo 36

Tiu ĉi konvencio revizias la konvencion pri la indiĝenaj kaj tribaj loĝantaroj, 1957.

Artikolo 37

La formalaj ratifoj de tiu ĉi konvencio estas komunikotaj al la Ĝenerala Direktoro de la Internacia Oficejo pri Laboro kaj de tiu registrotaj.

Artikolo 38

1. Tiu ĉi konvencio ligos nur la Membrojn de la Internacia Organizaĵo pri Laboro kies ratifo estos registrita de la Ĝenerala Direktoro.

Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj, 1989 (n-ro 169)

2. Ĝi ekvalidos dek-du monatojn post kiam la ratifoj de du Membroj estos registritaj de la Ĝenerala Direktoro.

3. Poste tiu ĉi konvencio ekvalidos por ĉiu Membro dek-du monatojn post la dato en kiu ĝia ratifo estos registrita.

Artikolo 39

1. Ĉiu Membro kiu ratifis tiun ĉi konvencion povas malratifi ĝin ĉe la fino de dek jaroj post la dato de la komenca ekvalidiĝo de la konvencio, per akto komunikenda al la Ĝenerala Direktoro de la Internacia Oficejo pri Laboro kaj de tiu registrita. La malratifo ekvalidos nur unu jaron post ĝia registriĝo.

2. Ĉiu Membro kiu ratifis tiun ĉi konvencion, kiu, ene de unu jaro post la fino de la dekjara periodo menciita en la antaŭa paragrafo, ne uzos la eblecon de malratifo menciitan en tiu ĉi artikolo estos ligita por nova dekjara periodo kaj, poste, povos malratifi tiun ĉi konvencion ĉe la fino de ĉiu dekjara periodo en la kondiĉoj menciitaj en tiu ĉi artikolo.

Artikolo 40

1. La Ĝenerala Direktoro de la Internacia Oficejo pri Laboro sciigos al ĉiuj Membroj de la Internacia Organizaĵo pri Laboro la registriĝon de ĉiuj ratifoj kaj malratifoj kiuj estos al li komunikitaj de la Membroj de la Organizaĵo.

2. Sciigante al la Membroj de la Organizaĵo la registradon de la dua ratifo komunikita al li, la Ĝenerala Direktoro atentigos la Membrojn de la Organizaĵo pri la dato je kiu ekvalidos tiu ĉi konvencio.

PARTO X. FINAJ DISPOZICIOJ

Artikolo 41

La Ĝenerala Direktoro de la Internacia Oficejo pri Laboro komunikos al la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj nacioj, cele al registrado, konforme al la artikolo 102 de la Ĉarto de la Unuiĝintaj nacioj, kompletajn informojn pri ĉiuj ratifoj kaj ĉiuj malratifoj kiujn li estos registrinta konforme al la ĉi-antaŭaj artikoloj.

Artikolo 42

Ĉiufoje kiam ĝi juĝas tion necesa, la Estraro de la Internacia Oficejo pri Laboro prezentos al la Ĝenerala Konferenco raporton pri la aplikado de tiu ĉi konvencio kaj ekzamenos ĉu necesos enskribi en la tagordon de la Konferenco la demandon de ĝia kompleta aŭ parta reviziado.

Artikolo 43

1. Kaze ke la Konferenco adoptas novan konvencion kun kompleta aŭ parta revizio de tiu ĉi konvencio, kaj escepte se la nova konvencio disponos alie:
 - a) la ratifo, fare de Membro, de la nova revizia konvencio sekvigos plenrajte, senkonsidere la ĉi-supran artikolon 39, tujan malratifon de tiu ĉi konvencio, kun la rezervo ke la nova revizia konvencio ekvalidis;
 - b) ekde la ekvalidodato de la nova revizia konvencio, tiu ĉi konvencio ĉesus esti malfermita al ratifado de la Membroj.
2. Tiu ĉi konvencio restus ĉiukaze valida en sia formo kaj ligus tiujn Membrojn kiuj ratifis ĝin kaj kiuj ne ratifus la revizian konvencion.

Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj, 1989 (n-ro 169)

Artikolo 44

La franca kaj angla versioj de la teksto de tiu ĉi konvencio estas egale aŭtentaj.

Postparolo de la tradukinto

Tiu ĉi traduklaboro, kaj ĝia libroforma apero, estas dediĉita al la 60-a datreveno, en 2008, de la Universala Deklaro de Homrajtoj, kaj precipe al tiuj homoj, bedaŭrinde preskaŭ ĉiuj en la nuntempa mondo, kiuj ankoraŭ ne ĝuas ĉiujn ĉi rajtojn, kvankam iliaj registaroj solene devontigis sin certigi ilin al ĉiuj homoj de la landoj pri kiuj ili respondecas.

La solene promesitaj rajtoj ne estas garantiitaj de la pape-ro sur kiu ili staras, nek de la registaroj kiuj subskribis ilin, sed ili estas certigeblaj nur per la homoj mem kaj ilia insistado. Scii kaj konscii, ke ili ja ekzistas skribe kaj jure asertitaj, estas unu el la plej gravaj kondiĉoj por trudi ilin. Tiel mi pensas ke ilia apero ankaŭ nialingve ne estas tute senutila por venkigi ilin.

Temas ĉi tie pri tradukoj kiujn mi faris en la lastaj jaroj ĉefe pro la deziro de membroj de la Monda Asembleo Socia (MAS) disponi pri ili nialingve, interalie por referenci ilin ĉiujn en la statuto de MAS, kiu ĝis nun referencas „nur” al la *Universala Deklaro de Homrajtoj*. Mankas ankoraŭ pluraj tekstoj de internaciaj traktatoj same indaj aperi en Esperanto, mi menciuj kiel ekzemplon nur tiujn pri la rajtoj de la virino kaj tiujn de la Ĝenevaj Konvencioj. Ili aperu espereble en estonta eldono de tiu ĉi libro.

Esperantistoj povus senti mankon ĉi tie de teksto pri lingvaj rajtoj. Kvankam lingvaj rajtoj ja aperas en kelkaj ĉi tekstoj, ne ekzistas traktato aŭ konvencio kiu okupiĝas aparte pri ili. Ekzistas ja nialingve la „Deklaracio de lingvaj rajtoj”, farita en Barcelono, estiĝinta sub impulso de membroj de la Esperanta Civito. Sed ni rezignis represi ĝin ĉi tie, ĉar ĝi ne

Postparolo de la tradukinto

estas agnoskita de la registaroj de la UN-membroŝtatoj, kaj krome ĉar ĝi ja ekzistas libroforme kaj ankaŭ rete elŝutebla.

Ŝajnas al mi necese, por estonta eldono de tiuj ĉi tekstoj, ricevi la konsilojn de la legantoj, pri eventualaj eraroj kompreneble, sed ankaŭ pri pli oportunaj esprimoj en diversaj okazoj.

Mi petas kaj antaŭdankas la legantojn pro tiuj konsiloj kaj deziras al ni ĉiuj bonan sukceson en la disvastigado de la konscio pri la fundamentaj rajtoj de la tuta homaro.

Vilhelmo Lutermano, Pedro Betancourt, 2009

Monda Asembleo Socia (MAS) ...

... estas asocio fondita en la jaro 2005 de Esperantistoj kiuj, inspiritaj de la artikoloj de *Le Monde diplomatique en Esperanto* <http://eo.mondediplo.com> volas ne nur legi, sed ankaŭ diskuti kaj agi.

Ĝi estas strikte bazdemokratia, travidebla (por siaj membroj), progresema organizaĵo, kiu funkcias nur pere de retroŝto kaj Interreto. Ĝi partoprenas en la Mondaj kaj laŭeble regionaj Forumoj kaj referencas en sia statuto por sia agado la tekstojn kunigitajn en tiu ĉi libro. Aliĝo kaj membreco estas senpagaj. Ĝia retejo: <http://mas-eo.org> enhavas ĉiujn interesajn informojn pri MAS, kaj krome multajn legindajn artikolojn, tradukitajn aŭ memverkitajn de la membroj.

Ĉiu membro rajtas ne nur publikigi en la retejo de MAS siajn tekstojn, sed ankaŭ publikigi librojn en la eldonejo de MAS, kondiĉe ke li havas aŭ trovas la rimedojn por presado - ĉar aliĝo kaj membreco estas senpagaj, MAS ĝenerale ne disponas pri la rimedoj pagi al verkemuloj la eldonadon de libroj.

Tamen, ĝis nun eldoniĝis jam pluraj libroj:

– **C. F. Ramuz: Aline** (novelo de la franclingva svisa aŭtoro en traduko de nia fama René de Saussure, reeldonita post la unua eldono en 1911), 2007

– **Arturo Ŝniclo: Rondo (Dek dialogoj); La fianĉino (Skizo), kun eseoj pri verkoj de Ŝniclo de Hartmut Scheible**, en trad. de V. Lutermano, 2007

– **Karlo Markso: Salajro, prezo kaj profito** (prelego pri bazaj ekonomiaj fenomenoj antaŭ internaciaj delegitoj de la laborista movado), en traduko de V. Lutermano, 2007

– **Kubaj infanrakontoj**, trad. de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kun ilustraĵoj de Danny Daniel Pereyra, 2007

– **GBEGLO Koffi: Esperantujismo**, originale verkita, 2008

– **Johano Besada: Eseoj**, originale verkitaj, 2008

– **Karlo Markso: Nerefuteblaj citaĵoj**, trad. V. Lutermano, 2008

- **Fidel Castro Ruz: Dialogo de civilizacioj** (2 paroladoj), trad. Amparado Cisnero, 2009

- **Dominique Vidal: Kiel Israelo elpelis la palestinanojn**, en trad. de V. Lutermano, 2009

- **Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, Universala Deklaro de Homrajtoj, Konsilantaro pri Homrajtoj, Internacia Traktato pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, Internacia Traktatoj pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, Konvencio pri la Rajtoj de la Infano, Konvencio pri la Rajtoj de Handikapitoj, Protokolo pri abolo de mortpuno, Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj** - Tekstoj Esperantigitaj de Vilhelmo Lutermano, 2009 (tiu ĉi libro)

La libroj de MAS akireblas ĉe la kutimaj librovendejoj en Esperantujo, precipe ĉe tiu de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj de Flandra Esperanto-Ligo (FEL).

*Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj;
Universala Deklaro de Homrajtoj;
Konsilantaro pri Homrajtoj;
Internacia Traktato pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj;
Internacia Traktatoj pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj;
Konvencio pri la Rajtoj de la Infano;
Konvencio pri la Rajtoj de Handikapitoj;
Protokolo pri abolo de mortpuno;
Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj*

Esperantigitaj de Vilhelmo Lutermano,

Monda Asembleo Socia (MAS), Embres-et-Castelmaure

ISBN 978-2-9529537-9-5

Enpaĝigita de la Monda Asembleo Socia (MAS)
per OpenOffice 3.0.0 sub Mandriva Linux 2009.0

Presita en Germanio en la jaro 2009